# HISTORIO
# DE
# S.A.T.

SENNACIECA ASOCIO
TUTMONDA

1921 - 1952

— 1953 —

Ĉiuj rajtoj rezervitaj por ĉiuj landoj
inkluzive de Sovetlando

Copyright by SAT 1953

KONTROLITA DE LA LITERATURA KOMITATO

# ENKONDUKO.

Oni povas distingi ĉe la SAT-anaro du tendencojn manifestiĝantajn depost la ekiro de SAT ĝis la nuna tago, tendencoj nature fontantaj el la stadio, en kiu nuntempe troviĝas la homa evoluo. La unua celadis enkonduki en SAT la disputpunktojn, kiuj disigas sur la politika tereno la laboristojn laŭ diversaj partioj ; la dua persiste klopodas unuecigi, harmoniigi la mensan strebadon de la membraro konforme al la statuta formulo *« per komparo de faktoj, ideoj, per libera diskutado ĝi (t. e. SAT) celas malebligi ĉe siaj membroj la dogmiĝon de la instruoj, kiujn ili ricevas en siaj apartaj medioj ».*

La kreskado de la juna Asocio estis ofte perturbata de la sintrudemaj, iafoje bruaj manifestadoj de reprezentantoj de la unua tendenco. Tamen, post pli ol tridek jaroj ni povas tiri la ĝojigan bilancon, ke la dua tendenco, la unueciga, la harmoniiga, triumfis dank' al la saĝeco de multaj gekamaradoj, kiuj praktikante Esperanton konstante, sindonante kun fervoro al la taskoj starigitaj de SAT antaŭ ili, ekkonis, ke la SAT-idealo sin trudos venke nur dank' al sintezo de laborista pensado, kiu estas esprimita en la titolo de la Asocio per la vorto *« sennacieca »* kaj kiu rilatas same ankaŭ al la ideo de superpartieco.

La legado de tiu ĉi Historio estu instrua kaj instiga por hezitantoj, ne-informitoj, por spiritoj serĉantaj vojon aŭ apogon. Ĝi firmigu nin ĉiujn en nia volo, en nia obstina klopodo elakiri pozitivajn rezultojn sur la vojo antaŭsignita, kondukonta al Libero kaj Socialismo.

# Enhavo de Historio de SAT 1921-1952

Enkonduko…………………………………………………………. 3

**Unua Periodo : 1921-1931**

Kialo de la naskiĝo de SAT………………………………………… 5
« For la Neŭtralismon ! »…………………………………………... 8
Sennacieca strukturo……………………………………………….. 18
La personeco de E. Lanti…………………………………………... 19
Nur de malsupre, ne de supre venos la venko !…………………. 22
La aŭtoritato de Lanti en la unua kongreso de SAT…………….. 23
Lanti kun misio al Moskvo………………………………………… 24
Estonta antagonisto de superpartia SAT…………………………. 25
La dua kongreso de SAT en Frankfurto (1922)…………………. 26
SAT sub la influo de la Rusa Revolucio……………………….... 26
La strukturo de SAT……………………………………………….. 27
La 3-a Kongreso de SAT en Kaselo……………………………….. 27
Akurata administrado en Lejpcigo……………………………..... 29
Plifirmigo de la idea bazo………………………………………….. 30
Konkludo pri idistoj kaj aliaj mondlingvistoj……………………. 31
Laborist-esperantistoj ĉe neŭtrala Esperanto-kongreso donas sian apogon al SAT…………………………………………………... 32
Semajna gazeto decidita en Bruselo (1924)…………………….. 32
Redakciaj problemoj……………………………………………… 34
La 5-a Kongreso en Vieno (1925)……………………………..... 36
Memstareco de la propagandaj aparatoj………………………… 37
Kontraŭ lingva novigemo !……………………………………….... 37
Propra lernolibro ………………………………………………….. 38
Al Leningrado ! (1926)…………………………………………… 38
La ekzekutiva Komitato konfirmas la devizon «For la Neŭtralismon ! »……………………………………………………………... 40
Lanti pri la supertendenceco…………………………………..... 41

La abonantaro ne sufiĉe pliiĝas………………………………... 43
La 7-a SAT-Kongreso en Liono (1927)……………………….... 43
Helpanto mallong-tempa…………………………………….... 44
Grandioza projekto : La « Plena Vortaro »…………………... 45
La 8-a Kongreso de SAT en Gotenburgo, Svedio (1928)……….. 47
Martelfrapoj…………………………………………………….. 49
Deklaro pri supertendenceco…………………………….…..... 50
9-a Kongreso de SAT en Lejpcigo (1929……………………..... 51
La « krimoj » de la SAT-gvidantoj…………………………..... 52
La 10-a Kongreso okazos en Londono !……………………... 54
Fulmotondroj ankaŭ en Londono
(10-a SAT-Kongreso, 1930)…………………………………… 57
Ŝanĝita politika bildo………………………………………… 59
La Centra Komitato de Sovetlanda Esp. Unio decidas…………. 60
Voje al skismo……………………………………………….... 62
La Direkcio akceptas la inviton de Amsterdamo por 1931…….. 63
En Nederlando ekkreskas la movado !……………………….. 64
La batalkongreso de Amsterdamo (11-a SAT-Kongreso, 1931)... 66

## Dua Periodo : 1932-1939

Delegit-sistemo en SAT-Kongresoj ?………………………... 74
La kongrestagoj en Ŝtutgarto (1932)………………………… 75
Ŝanĝoj kaj reduktoj…………………………………………… 76
La « cigna kanto » de Lanti…………………………………... 77
La SAT-administracio transkondukiĝas al Parizo……………..... 78
La aŭstriaj lab. esperantistaj gvidantoj fondas sian Internacion… 79
La 13-a Kongreso en Stokholmo (1933)……………………... 79
Nova eldonpolano de SAT…………………………………..... 81
La 14-a Kongreso de SAT en Valencio (1934)…………………. 82
Starigi la kreaĵon super la persono !………………………….. 83
Preludo al la pariza kongreso (1935)…………………………. 84
La 15-a SAT-Kongreso en Parizo (1935)…………………….. 86

Person-ŝanĝoj en la Plenum-Komitato………………………….. 88
SAT tenas sian 16-an Kongreson en Manĉestro (1936)………… 89
Nova danĝero : La Devaluo (Aŭtuno 1936)…………………….. 91
La Roterdama SAT-Kongreso (1937)………………………….. 92
La taskoj de Organiza Kongres-Komitato……………………… 93
La opozicio perdas pli kaj pli la grundon………………………. 94
La 18-a Kongreso de SAT en Bruselo (1938)………………….. 95
Sub la signo de l'mortanta Paco ……………………………... 96
La Interhelpa Tasko…………………………………………….. 98
La 19-a Kongreso de SAT en Kopenhago (1939)……………… 98

## Tria periodo : Septembro 1939 ĝis 1952

La Milito……………………………………………………….. 101
Perditaj kaj retrovitaj kontaktoj……………………………... 103
Reaperas monata organo ekde Januaro 1946………………….. 105
Malnovaj demandoj en nova tempo…………………………… 105
Morto de k-do Lanti…………………………………………... 106
La Laborista Solidareco……………………………………….107
Problemoj de gvidado kaj redaktado…………………………... 108
La unua postmilita SAT-Kongreso en Arhuzo (1947)………… 110
Periodo de kreskado ; SAT sur la ĝusta vojo………………….. 112
La 21-a Kongreso en Amsterdamo (1948)…………………….. 113
Redakcio kaj Gvid-instanco kunigitaj en unu loko……………. 115
Novaj libroj ĉe SAT…………………………………………… 116
La Akademio de Esperanto ricevas proteston…………………. 117
La 22-a SAT-Kongreso en Parizo (1949)……………………… 118
Niaj rilatoj al la neŭtrala movado……………………………… 120
Profesianoj en Fakoj…………………………………………… 122
La 23-a Kongreso de SAT en Torino (1950)………………….. 122
Tridek Jarojn SAT-Movado……………………………………. 125
La jaro 1952…………………………………………………… 126

**Aneksaĵoj**

La Plenum-Komitatoj de SAT de 1921-1951 ………………….. 129
Kreo de sennacieca Himno ……………………………………. 131
La Propagandaj Asocioj Laborist-Esperantistaj ………………. 133
Historio de LEA-Komitato de SAT ……………………………. 138
Apera Sekvo de la SAT-gazetoj ………………………………. 140
Jenan literaturon publikigis SAT ekde 1922 ………………….. 143
K-do Lanti lasis nin orfaj ……………………………………… 146
Lingva notoj …………………………………………………… 152

# UNUA PERIODO : 1921-1931

## *Kialo de la naskiĝo de SAT.*

SAT elkreskis sur la sama trunko kiel la ceteraj Esperanto-Movadoj ; ĝi estas frukto sur la arbo plantita de d-ro Zamenhof. Ĝi estas frukto de Racio kaj Progreso. Ĝi estas infano de nia Teknika Epoko. Unu rezultato de la teknika progreso estas la konstanta, okulfrapa malvastiĝado de la Teraj interspacoj, dank' al la rilatigiloj : fervojo, gazetaro, radiofonio, kino, telefono kaj telegrafo, aŭtomobilo, vaporŝipo kaj aviadilo.

Konsiderante unu el tiuj periloj : la gazetaro, ni konstatas, ve ! ke la presaĵoj estas multlingvaj. La diverslingveco estas ĥaoso, kiu minacas detrui ĉiujn esperojn kaj revojn de la homaro celanta al paca kaj komuna kunvivado, al socia idealo.

La fino de l'pasinta jarcento vidis efektivigitan la revon de protagonistaj scienculoj, kiaj estis Lajbnic (Leibnitz) kaj Kartezio (Descartes) : D-ro Zamenhof donacis al ni esperanton. Idealisto li luktis por la realigo de siaj revoj : interpacigo de la dividitaj popoloj, helpe de la dinamika forto entenata en la lingvo esperanto kiel komuna esprimilo inter homoj. Li luktis kontraŭ la tendenco sin manifestanta jam en la frua epoko de esperanto, kaj reprezentata de homoj kiel Bofron (Beaufront), vidi en esperanto nur lingvon utiligindan kiel helpa faktoro por diversaj praktikaj bezonoj, ĉefe en komerco kaj turismo.

La ĝenevano Hektoro Hodler, filo de la fama pentristo Ferdinando Hodler, komprenis ĝuste la aspirojn de Zamenhof kaj de multaj aliaj, por kiuj esperanto signifis pli ol nuran ilon por diversaj interŝanĝoj, kiujn necesigas nia nuntempa civilizo surtera. Li kreis kaj vivigis la tutmondan *Universala Esper-*

*anto-Asocio* (1908) kun la celo servigi la aparaton al la praktika aplikado sen interveno de naciecaj konsideroj.

Tio estis io tute nova. Eĉ en la Laborista Esperanto-Movado oni antaŭ 1914 ne konis tiun organizmanieron, tiun spiritostaton. Rutinemo regis ĉe la anaro : oni sekvis skeme la modelojn de la ceteraj laboristaj organizoj ne-esperantistaj ; oni ne havis apartajn aspirojn. La tiamaj LEA-oj (laborist-esperantistaj organizoj) estis simplaj propagandaj societoj por popularigo de esperanto inter la Laboristaro. La per-esperanta laboro por Socialismo estis nekonata tereno. La broŝuro de k-do *G. P. de Bruin,* kiu aperis ĉe SAT en 1936 sub la titolo « Laborista Movado antaŭ la Mondmilito » (*), priskribas tre detale tiun evoluon, la stariĝon de la unuaj laboristaj esperanto-grupoj (en la jaroj 1905-10) en diversaj grandurboj kaj la sekvan laŭnacian grupiĝon en Laboristaj Esperanto-Asocioj. Parte tiuj asocioj eldonis regulajn ampleksajn bultenojn : en Ĉeĥio « Kulturo », en Francio « Le Travailleur Espérantiste », en Germanio « Antaŭen », en Nederlando « Arbeider Esperantist ».

Internaciskale ekde 1906 funkciis internacia Asocio « Paco-Libereco » kun Fi-Blan-Go kaj R. Louis kiel iniciatintoj. En 1910 ĝi kuniĝis kun alia organizo « Esperantista Laboristaro ». De tiam la komuna organizo portis la nomon « Liberiga Stelo ».

En Parizo, poste en Amsterdamo aperis de 1907 ĝis 1914 « Internacia Socia Revuo », en monataj kajeroj. Ĝi fine akiris plurajn centojn da abonantoj.

« Sennacieca Asocio Tutmonda », kiu ekĝermis post la unua mondmilito el la antaŭa « Liberiga Stelo », pruntis verdire nenion el la antaŭ-milita periodo. Pli ĝuste, ĝi inspiriĝis de la

(*) Havebla ĉe SAT Parizo; 0.20 dol.

ideala verko, kiun kreis H. Hodler en Ĝenevo, kaj kiu precize atingis sian kulminon kaj ekhalton en la momento de la starigo de SAT, kun la frua morto de la eminenta Ĝeneva pioniro.

Du kaŭzoj kondukis al la fondo de SAT, kiun iniciatis kelkaj parizaj kamaradoj, laborist-esperantistoj ; inter ili elstaras la ne-ordinara figuro de Eŭgeno Adam, konata kaj famiĝinta ĉefe sub la pseŭdonimo E. LANTI (*).

La unua kaŭzo estis la nete klasbatala situacio, kiu rezultis el la unua mondmilito kaj kondukis al leviĝo de revoluciaj movadoj en aro da eŭropaj landoj, interalie al kompleta ŝanĝo de reĝimo en Rusio. La dua kaŭzo estas nomebla filozofia kaŭzo, rezulto de rezonado pri la rolo de lingvo en la homara historio, koncepto kiu esprimiĝas eĉ en detaloj, ekzemple en la esperantigo de propraj nomoj.

Ambaŭ tiuj kaŭzoj plue efikadis tra ĉiuj jaroj de la ĝisnuna Historio de SAT. En la unua periodo la historia kaŭzo de la klasbatala situacio postmilita estis la pli influhava, dum en la sekvanta periodo, ni diru depost 1932, la dua kaŭzo, tiu pri la revolucieca rolo de MONDlingvo, penadis superregi pli kaj pli en la mensoj de la SAT-anoj kaj doni unuecan aspekton al niaj klopodoj sur kultura tereno.

La sennaciisma teorio estas frukto, kiu povis kreski nur sur la arbo de SAT. Fakte la historio de SAT estas la historio de esence revolucia movado en la homara evoluo ; ĝi montras la klopodojn de pioniroj senantaŭjuĝaj, ja aŭdacaj, kiuj volas trabati vojon larĝan, ne malhelpantan al Progreso, laŭ maniero

---

(*) En la unua tempo li subskribis siajn artikolojn per « Lanty » sed poste decide li forĵetis la literon fremdan al la esperanta alfabeto. Konforme al la principo, kiun li adoptis : esperantigi laŭeble ĉiujn proprajn nomojn. La nomo *Lanti = l'anti = tiu, kiu kontraŭas, estis donita al li en franca medio ĉar dum kunveno li regule kutimis ekstari por eldiri sian opozician vid-punkton.*

ĝis tiam nekonita. Tiuj kamaradoj, kiuj asertas, ke tio estas troigo aŭ memtrompo, ke SAT tendencas esti fermita sekto aŭ io simila, pripensu nur, a) ke la dinamismo de movado kiel la nia ne esprimiĝas per la grando de la membrokvanto, b) ke la tempo, la epoko de l'teknika disvolviĝo, laboras por nia afero ; ĝi kondiĉas kvazaŭ la lingvan unuiĝon kaj la iom-post-ioman formalaperon de la naciaj apartaĵoj.

« For la Neŭtralismon ! »

Sub tiu ĉi devizo startis elsalte nia movado. Kun tiu ĉi titolo aperis – kaj ĝi estis poste dufoje reeldonita – broŝuro, kiu entenas la bazajn principojn de SAT, tiel kiel E. Lanti skizis ilin per pluraj artikoloj publikigitaj de « Esperantista Laboristo » (en 1919 kaj 1920).

Tiu ĉi gazeto, monata, komence estis du-lingva : franca kaj esperanta ; ĝi servis do grandparte al la propagando de la laborista esperantismo en franclingvaj regionoj. Nur ekde oktobra numero 1920 ĝi estas la oficiala organo de « Liberiga Stelo », sub kiu nomo stariĝis societo en Parizo, jam en la jaro 1910, kun statutaj celoj : « batali por la malstarigo de la kapitalista socio, batali kontraŭ la religio, propagandi liberigajn ideojn » (*).

En tiu numero (kaj jam en la antaŭaj) la pariza kolektiveto fiksas sian pozicion rilate la organizan demandon kaj ankaŭ rilate la mondlingvan problemon ĝenerale, ĉar la ido-movado tiutempe ankoraŭ ekzistas kaj propagandas en laboristaj medioj. Oni trovas tie opinidiferencon kun kamarado el Germanio : ASO (k-do A. Sproeck), subtenanto de la internacia organizmaniero, skribas : « La estonteco pruvos, ke spite la

(*) Detalojn trovu en la jam citita broŝuro de *G. P. de Bruin* (SAT, 1936).

sennaciecon de Liberiga Stelo fondiĝos naciaj sekcioj. » Tiu profetaĵo de ASO ne realiĝos.

En la sama tempo la parizanoj akceptas firman pozicion pri la nova landnoma sufikso -i iniciatita de UEA (H. Hodler) : ili mem komencas apliki konstante kaj konsekvence la *io*-formojn, lasante tamen liberon al la ceteraj kunlaborantoj elekti inter la du sufiksoj.

De tiu epoko la laborista movado esperantista komencas havi memstaran vivon en monda skalo.

La novembra numero de « Esp. Laboristo » entenas la alvokon al la « Verdruĝuloj », kiu difinas celon kaj rimedojn de la nova organizo :

*« ... Ĉiuj internaciistoj, pacifistoj, homaramantoj celas forigi el la mondo la militon kaj krei harmonian staton. – Eĉ plej furiozaj militistoj deklaras, ke ili militadas por pacigi kaj ordigi la mondon. Ne mankas do interkonsentantoj pri la unua punkto (t. e. la celo* – Kompil.). *Sed pri la dua (t. e. la rimedoj uzotaj* – Kompil.) *la opinioj estas plej diversaj kaj eĉ ofte kontraŭaj.*

*«* Liberiga Stelo *deziros klarigi kaj, se eble, pravigi sian propran vidpunkton meze de la opinidiverseco.*

*« Unue, ĝi deklaras, ke, en sociologiaj tezoj, neniu kapablas demonstri, kia estas la plej bona el la rimedoj uzotaj por pacigi la mondon. Nur la praktika provado povas aŭ ne pravigi iun ajn tezon.*

*« Jam la historia eksperimento instruis al ni :* 1°) *ke la ofte citita kaj aplikita proverbo* si vis pacem para bellum *neniam donis al la mondo daŭran kaj efektivan pacon ;* 2°) *ke la dogmaj religioj, eĉ havantaj alian efikon, estis senpovaj por interfratigi la homojn. – Militojn eĉ okazigis plurfoje la fanatikeco de la kredantaro.*

*« Konsiderinte tiajn faktojn,* Liberiga Stelo *forpuŝas el sia mezo militistojn kaj dogmajn religiulojn. Ĝi opinias, ke por pacigi la mondon estas unue necese naskigi en ĝi justecon. Justeco devas regi la rilatojn inter la individuoj ; justeco devas prezidi ĉe la rilatoj inter iuj ajn homgrupiĝoj, ĉu teritoriaj, ĉu profesiaj, ĉu alispecaj.*

*« Dedukte,* Liberiga Stelo *kondamnas la senjustan principon de la kapitalista sistemo vortigebla jene : kiu havas monon, tiu manĝas. Tiel oni povas vidi personojn, kiuj nenion utilan faras, sed tamen abundege konsumas, tial ke ili havas monon !*

*«* Liberiga Stelo *estas kontraŭkapitalista.*

*« Al tia maljusta principo ĝi oponas jenan : nur tiu (sana) manĝas, kiu laboras. Tiu lasta postulato estas la bazo mem de la socialismo, aŭ komunismo.*

*« Do,* Liberiga Stelo *estas socialista.*

*« Ĝi tute diferenciĝas je la nure pacifistaj asocioj, kiuj ne celas unue regigi justecon inter la homoj kaj kontentiĝas per vanaj paroloj prediki pacon al la popoloj. La pacifistoj estas eble bonkoraj homoj, sed ili fermas la okulojn por ne vidi la verajn militkaŭzojn. La milito latente ekzistas ĉiam inter ekspluatantoj kaj ekspluatatoj. Veran pacon povas nur havi socia ordo bazita sur justeco, egaleco, aŭ, se oni preferas, sur ekvivalenteco. Ĉar maljusteco estas ĉe la fundamento de la nuna socia sistemo, estas do tute logike, ke maljusteco ankaŭ regu la rilatojn inter la homaj grupiĝoj, ĉu naciaj, ĉu ŝtataj, kaj okazigu militojn. Tial la nure pacifista movado estas tute iluziplena kaj pro tio povas eĉ esti danĝera.*

*« Dirinte tion por montri nian komprenon pri la sociaj fenomenoj, temas nun difini la pozicion de* Liberiga Stelo

*rilate al la diversaj organizaĵoj, kiuj havas similan koncepton kaj batalas por renversi la kapitalistan ordon.*

*« Kiel jam ni diris, neniu povas havi absolutan certecon pri la plej trafaj rimedoj uzotaj. Konsekvence, ĉar nia tasko ne estas senpere batali kontraŭ la materiaj fortoj de la nuna socio, ni ne intencas elekti inter la diversaj partioj, organizaĵoj aŭ tendencoj.*

*«* Liberiga Stelo *alvokas la sincerulojn, bonvolulojn el ĉiuj samcelaj partioj.*

*« Kia do estos la tasko de la* liberigstelanoj ? *Ĝi estos batali kontraŭ la spiritaj, moralaj fortoj, kiuj subtenas la senjustan, ĥaosan reĝimon kapitalistan. La tasko de* Liberiga Stelo *estos zorgi pri la kreado de spiritstato, kiu harmonios kun la estonta socio – kiam la perforto nuna, la ekonomiaj, lingvaj kaj ŝtataj landlimoj ne plu ekzistos.*

*« La ideala socio ne devenos tute preta el la Revolucio, kiun kelkiuj prezentas al si kiel panaceon. Oni anstataŭigas bone ion nur metante je ĝia loko alion pli perfektan. Estas do nepre necese sin prepari, sin ekzercadi por la tasko de mondcivitano, forigante el si mem la nenaturajn naciajn ecojn, kiujn la ŝtata edukado metis dum nia infanaĝo en niajn kapojn kaj korojn.*

*« Ni ne devas malatenti la teruran spertadon de la mondmilito. Ĉu do la spektaklo travivita, ekzemple en Parizo kaj Berlino, komence de Aŭgusto 1914, ne estas instrua ? Kial la patriota febro estis tiom forta, tiom akra, ke eĉ la plimulto el la t. n. internaciistoj entuziasmege kantaĉis militemajn kantojn ? Nur unu respondo estas akceptinda : tiuj individuoj ne sufiĉe estis antaŭe penintaj forigi el si mem la naciece malamindan edukadon enlandan.*

*« Oni jam riproĉis al* Liberiga Stelo, *ke ĝi « fermas la okulojn kaj obstine ne volas vidi ion, kio ekzistas. Ekzistas nacioj ! »*

*« Ne, tute ne, ni ne fermas la okulojn. Kontraŭe, estas pro tio, ke ni tiel malfermokule kaj enfunden rigardadis la malbonfaron de la nacioj, ke ni deziras krei organismon, kies esenca celo estos produkti antidoton kontraŭ la nacieco. Estas vere, ke nacio kaj naciemo ne havas tute saman signifon. Nu, ĉu tamen oni povas nei, ke naciismo eliras tute nature el nacio, kiel veneno el la gorĝo de vipuro, kiel fanatikeco el la dogmaj religioj, kiel ŝovinismo el patriotismo ?*

*« La demando estas jena : ĉu la nacioj estas la lasta grado de la evoluo ĉe la homaj socioj ? Ĉu do, kiam unu sola helpa lingvo estos parolata de ĉiuj en la mondo, oni devos tamen ankoraŭ konservi la nunan formon por la rilatoj inter la homgrupiĝoj ? Kiu aŭdacus respondi jese ?*

*« Ni opinias, ke la estontaj organizaĵoj estos profesiaj aŭ fakaj kaj tutmondaj, ne internaciaj. La nacio en tiu estonta tempo estos rigardata proksimume kiel estas nune la provincoj en la nacioj.*

*« Pro tiuj konsideroj ŝajnas al ni, Esperantistoj, nepre necese tuj komenci la starigon de organizaĵo, funkcianta kiel plej eble estos laŭ la direkto montrita al ni de la historia evoluado ĉe la socioj. Oni trafe agas – eĉ senbrue – kiam oni klopodas laŭdirekte de la estonto. Sed kiuj marŝas negvidate de la liberiga stelo montranta la estonton, tiuj samloke paŝadas kaj senkonscie malhelpas la antaŭeniradon.*

*« Tial ke ekzistas nuntempe nacioj kaj ŝtatoj, ni bone scias, ke la naciaj societoj estas necesaj por difinite mal-*

*ampleksaj celoj.* Liberiga Stelo *ne intencas do malhelpi la fondon de naciaj organizaĵoj aŭ detrui la ekzistantajn. Sed, ĉar ni estas samlingvanoj, ni volas tuj profiti tiun rimedon por kvazaŭ embrie funkciigi societon, kiel povos estonte funkcii la universala socio. Pro tio ke la naciaj asocioj estas nun necesaj, el tio ne sekvas, ke ili devas esti la ĉelo de tutmonda asocio de samlingvanoj. Ni deziras, de nun, krei sennaciecan popolon. Ni volas, ke ĝi senprokraste kutimiĝu al eksternacia agado-, pens- kaj sentkapablo.*

*« Malgraŭ ĉiaj obstakloj la homaro marŝas al unueco. Ĉu oni devas timi, ke tiu unueco estos unutona, samkolora ? Tute ne ! La etnikaj, klimataj fortoj daŭrigos la agadon sur la individuojn kaj malhelpos unutonecon. La indiĝenoj ĉiam konservos siajn originalaĵojn.*

*« Timo pri ebla unutoneco, eĉ se ĝi estus pravigita, ne povas cetere forgesigi al ni la nune realan malbonon : la nacioj elirigas el siaj poroj venenigan naciemon, kiu estas grava obstaklo al la dezirinda universaleco.*

« Praktikeco : *... Tial ke oni emas pensi pri sia propra propagando, en sia propra medio, oni tuj prezentas al si grupon en sia urbo, federacion de grupoj en sia nacio kaj federacion de nacioj en iu internacio !*

*« Tio ŝajnas al ni arkaisma kaj ne konforma al nia celo.*

*« Ni kontraŭe vidas centron – ĉiam alilokigebla – al kiu rekte, senpere direktiĝos la viva fluido ; centron, kiu konservos la unuecon de la organismo ».*

En la fino de tiu Alvoko, subskribita SENNACIULO (por la Centra Komitato de « Liberiga Stelo ») troviĝas la noto : « Pri la definitivaj formoj ni decidos, proksiman jaron, en Praha (Prago). En Esperantio la antaŭenemuloj ne povas resti pli

longe sen domo. Ĝi estu firme bazita, fortike konstruita, aeroplena kaj enirebla nur al vere indaj mondcivitanoj ! ».

En la januara numero denove troviĝas la insista devizo, tuj sub la titolo : « Ni deziras krei sennaciecan popolon. Ni volas senprokraste kutimiĝi al *eksternacia* pens-, sent- kaj agad-kapablo ».

En la dua paĝo samnumere karakteriza noto, titolita « 1921 » : « Tre respektemaj pri tradicioj ni ne estas. La novjaraj bondeziroj plej ofte estas hipokritaj – almenaŭ senutilaj. Ni tamen bondeziru, sed sincere : ĉiu partiano de l'kapitalista sistemo ne lernu esperanton ; li pli utile rompu al si la kapon. Ĉiu socialisto, komunisto, anarkisto ellernu la lingvon kaj abonu nian gazeton… (ĉe la fino) Ni deziras ankaŭ, ke ili havu sufiĉe da mono por veturi Pragon, kie ni fondos sennaciecan asocion tutmondan – mallongigite : SAT – Aniĝante al SAT ili fariĝos satanoj kaj konsekvence feliĉuloj. Tiel estu ! ».

Por la unua fojo ni renkontas ĉi tie la sugeston pri la nomo de la fondota organizo, nomo kiu transvivos la jardekojn…

En la numero de Aprilo-Majo 1921 aperas tagordo por la fondkongreso de SAT. El la punktoj reliefiĝas : Diskuto pri la provizora statuto, kaj redaktado de la definitiva, submetota al ĝenerala voĉdono (celo, principoj, difino de la agadkampo, alinomigo de la Asocio, grupo kaj izolulo, kotizo, diversaĵoj. Direktaj organoj: a) Direkta Komitato, – b) Administra Komisiono. Oficiala gazeto : ĝia titolo, ĝia funkciado. Kongreso. Servoj. Jarlibro).

En la junia n-ro ni trovas respondon de k-do Lanti al rusa kamarado, kiu dezirus, ke SAT sekvu nur la vojon de la Tria Internacio (komunista) : « … Mi ne laciĝos ripeti, ke ni devas precipe celi praktikecon. Se ni jam enŝovas la ĉi-tiu-tempajn

partiajn pasiojn en nia tendaro, ni iros certe al bela fiasko. Unu el niaj taskoj estas la eldono de bona literaturo konforma al nia idealo. Nu, ĉu do ne estas eble por nesampartianoj, sed samcelanoj, interkonsenti pri verkoj de M. Gorki, de Tolstoj, de R. Roland k. a. aŭtoroj, kiuj staras super la partioj kaj eĉ super la nuntempo ? »

« … Nia Asocio ne devas esti politika organizaĵo, laŭ la mallarĝa senco de l'vorto. Ĝi estu eduka, kleriga, helpa, realiga ; tiele ĝi estos pli revoluciiga ol la politikaj partioj, kiuj celas precipe fari partianojn, ne konsciajn revoluciulojn, t. e. homoj en kies menso formalaperis la malnovaĵoj kaj eniris ecoj ebligantaj novan socisistemon ».

La priorganizaj problemoj traktitaj de Lanti en la diversaj numeroj de 1920 kaj 1921 estas, kiel jam dirite, legeblaj ankoraŭ hodiaŭ en la broŝuro « For la Neŭtralismon ! », kies aperon fama revoluciulo, Henriko Barbus (Barbusse) akompanis per jenaj paroloj : « La burĝaj kaj mondumaj esperant-



*Partoprenantoj de la unua SAT-kongreso (Prago) 1921*

istoj estos pli kaj pli mirigataj kaj terurigataj de ĉio povanta eliri el tiu talismano : instrumento donanta al ĉiuj ajn homoj la eblon interkompreniĝi ».

Lanti korespondis kun Barbus, R. Roland kaj aliaj famaj verkistoj, esperante ke ilia aŭtoritata aprobo favore influos la varbadon. Sed fakte mankis, por esti efika, io en tiu aprobo : la praktiko. Neniu el tiuj famuloj konsentis dediĉi la necesan tempon por ellerni esperanton ; ilia apogo do estis pure platona. Poste Lanti forlasis tiujn klopodojn kaj fidis plu nur al la propraj fortoj de la sinceraj laboristaj esperantistoj, kiuj aŭdis la vokon kaj, lerninte la lingvon, entuziasmiĝis por la ideo de laŭ strukturo kaj enhavo sennacieca organizo.

Relegante nuntempe tiun broŝuron kaj aliajn artikolojn aperintajn en tiu epoko en « Esperantista Laboristo », oni respiras la aeron de l'jaroj 1919-21, jaroj funde revoluciecaj, en kiuj la tutmonda Laboristaro inspirite de la venkinta revolucio en Rusio provis ekakiri la politikan potencon, detronigi la burĝaron kaj transpreni la regadon sur la eŭropa kontinento.

Tiu ondego venis vere el la fundo de abismo kaj skuis la amasojn agitiĝantajn kvazaŭ en febro. La jam malnovaj ideoj de Marks kaj Engels, aplikitaj en Rusio de Lenin kaj Trocki, popularaj popolgvidantoj, ĉirkaŭitaj de stabo da spertaj « kompetentuloj », laŭ la praktika kiel laŭ la teoria flanko, trovis entuziasmajn porbatalantojn en la tuta mondo.

En tia situacio okazis la fondkongreso de SAT en Prago (Praha), en Aŭgusto 1921. Laŭ la protokolo partoprenis ĝin 79 gekamaradoj el 15 nacioj. La rezultoj de tiu unua kongreso estas fiksitaj en jena Gvidrezolucio :

*I*

*Konsiderante,* unuaflanke :

*a) Ke nur per faktoj ni sukcesos veki veran intereson pri esperanto ĉe niaj klasbatalaj organizoj ;*

*b) Ke la sperto jam montris, ke UEA estas la sola organizo, kiu en la praktiko montriĝis fruktodona ;*

*c) Sed, ke ĝin politika neŭtraleco malpermesas, ke ĝi povu efike labori sur nia proletara kampo.*

*II*

*Konsiderante,* duaflanke :

*a) Ke la ĉefa tasko de nia Asocio povas neniel esti politika, ĉar jam ekzistas klasbatalaj organizoj ;*

*b) Ke samkiel antaŭ 20 aŭ 30 jaroj estis nepre necese, ke ĉiuj praktikantoj de esperanto – ĉu pastroj, ĉu anarkistoj, ĉu policanoj – ariĝu por montri per faktoj, ke artefarita lingvo povas esti uzata en la praktiko, estas nun necese, ke ĉiuj esperantistoj, anoj de diversaj klasbatalaj organizoj, ariĝu en unu solan Asocion por montri al la proletaro, per imponaj faktoj, kiom utilega estas esperanto por la batalo kontraŭ la kapitalisma sistemo.*

*III*

*Konsiderante,* triaflanke :

*a) Ke la kunlaborado kun la t. n. burĝaj esperantistoj povas per tia kompromiso nur malutili al nia propagando ;*

*b) Ke jam multaj faktoj montras klare, ke niaj klasaj kontraŭuloj tute ne deziras, ke esperanto disvastiĝu en niaj proletaj rondoj ;*

*Pro la ĉi-supre diritaj motivoj, la I-a Kongreso de SAT :*

*Konfesas, ke oni devas profiti je la sperto jam farita ĉe la neŭtrala Asocio UEA ;*

*Deklaras, ke nur je teknika vidpunkto nia Asocio povas kontakti kun aliaj esperantistaj asocioj ;*

*Petegas ĉiujn klaskonsciajn batalantojn, ke ili dediĉu sian tutan energion al kreskado de la unua klasbatala esperanta Asocio tutmonda ;*

*Sendas al ĉiuj esperantistaj proletoj sian elkoran saluton, kaj petas, ke ili aniĝu la Asocion, por ke, per komuna, frata kaj sindonema kunlaborado, ni metu, kiel eble plej rapide en la manojn de ĉiuj proletoj la ilon, kiu permesos al ili la forrenversiĝon de la lingvaj baroj ;*

*For la hipokritan neutralismon, for la kapitalismon, vivu SAT !*

*Sennacieca Strukturo.*

En la unua SAT-Kongreso k-do Banje (Bannier), nuntempe la prezidanto de SAT, tiutempe la intima kunlaboranto de k-doj Lanti kaj Glodo en la preparado de la nova organizo per du grandaj geografiaj kartoj klarigis la planon de administraciaj sektoroj de SAT. La protokolo daŭrigas : « Tio tre interesis la kamaradojn. Estis decidite eldoni skemon de tiu plano » [1].

Nu, tiu sistemo de disdivido de la terglobo laŭ sektoroj, laŭ horzonoj, kiuj proksimume identas kun la meridianoj, estis reproduktata kaj klarigata en la Jarlibroj de SAT, ekde 1922 ; ĝi havas pli edukan, sennaciigan celon ol administran. Sur tiu sistemo baziĝas la plej alta instanco de SAT, la Ĝenerala

(1) Vidu sub « Aneksaĵoj » tian mapon (p. 151)

Konsilantaro, kiu estas prezentata laŭ horzonoj kaj estas elektata de la tuta anaro.

Estus maljuste, se ni ne mencius ĉi-loke la klopodojn de sciencema irkutska k-do M. Krjukov (intertempe malaperinta) pri popularigo de la sennacieca horzona sistemo de SAT. Al li ni ŝuldas desegnon de la mondkarto presita en jarlibroj 1949, 1950/51 kaj eksplikon de la sistemo laŭ maniero serioza kaj rigore ekzakta :

*« Por esti sendependa de ŝtataj kaj geografiaj limoj, ĉiu sennaciulo apartenu al tiu zono, kies tempon li uzas. Por ricevi numeron de via zono, ni determinu la diferencon inter la tempo de Grinviĉ kaj la tempo de via horloĝo. La diferenco ĉiam estas plenhora, senminuta, sen-ona kaj senpere montros la numeron de nia zono. La tempokalkulo evoluis jene : antaŭ ĉio estis aparta loka tempo por ĉiu hom-grupo, poste nacia tempo komuna por ĉiu aparta nacio, kaj nun ni venis al la tria ŝtupo de l'evoluo, al sennacieca laŭzona tempokalkulo. La samo okazas en evoluo de la mezuriloj, de la popoloj, de la ŝtatoj kaj de la homlingvo ».*

*La personeco de E. Lanti.*

Ĉe la starigo de SAT kaj en la argumentado por pravigi ĝian ekziston Lanti ludis gvidan rolon. Li gardos tiun rolon tra la tuta historio de la juna movado ; liaj pensoj kaj konsiloj havos influon sur la organizan disvolviĝon eĉ post lia eksiĝo de la direktanta instanco, eĉ post komenco de lia tramonda vagado, kiu finiĝos tragike, per memmortigo pro nekuracebla malsano, en Januaro 1947, en Meksiko.

Dum ĝis 1914 la revoluciema asocio « Liberiga Stelo » fakte estis nur franca propaganda asocio esperantist-laborista,

kiu adoptis internacian titolon, en fino de 1918, Lanti, Banje, Glodo kaj kelkaj aliaj adeptoj sur la franca teritorio provis doni al la organizo internacian vivon. Tiam Lanti havis la ideon starigi socion similan al UEA, sed kun socialisma celo kaj statuto spegulanta la aspirojn de la klasbatala laborantaro. Li rimarkis, ke la strukturo de UEA permesis al ĝi rezisti al la



*E. Lanti*

naciista ondo, kiu senbridiĝis okaze de la unua mondmilito kaj perturbis ĉiujn internaciajn movadojn, inkluzive la laboristajn. UEA sub la spirita gvidado de H. Hodler trankvile sekvis sian vojon dum tiu milito, sendante sian supernaciecan gazeton regule al legantoj en inter si malamikaj tendaroj. Tio estis ebla pro la sidejo de UEA en la neŭtrala Svisio.

Banje, Glodo kaj aliaj aktivuloj tute hazarde renkontiĝis kun Lanti en la stratoj de Parizo aŭ ĉe la Centra Esperantista Oficejo. Okaze de kunvenoj en la urbdomo de la 15-a kvartalo Lanti faris, en neŭtrala grupo, sian unuan paroladon, timeme kaj balbute. Certe en tiu tempo la dinamisma karaktero de Lanti ankoraŭ ne influis la prolet-esperantistaron, kiel en la sekvo, ĉefe dank' al la sagacaj, klarvidaj artikoloj, kiuj aperis en « Esperantista Laboristo » kaj pli malfrue en « Sennacieca Revuo ».

E. Lanti (Adam) naskiĝis la 19-an de julio 1879 en normanda vilaĝo ; li tie ricevis nur elementan instruadon ; sian ampleksan scion li akiris al si kiel aŭtodidakto kaj kiel fervora vizitanto de vesperaj kursoj por plenkreskuloj, ankaŭ en Parizo, ĉe la kursoj de la liceoj Charlemagne kaj Condorcet. La patro intencis, ke li fariĝu terkulturisto kaj transprenu iam lian farmon, sed la juna Lanti deziris ellerni metion kaj migri, konatiĝi kun la mondo. Li ekposedis la lignaĵistan metion, kaj la precizlaboro en tiu artmetio reflektiĝis ankaŭ en lia intelekta kreado kaj en liaj labormetodoj. Li verkis singarde, atenteme, neniam supraĵe ; li estis ŝparema rilate siajn dirojn, sed kion li publikigis, tio neniel estis banala aŭ triviala ; ĝi havis fundon kaj sukon. Partopreno, postfronte, en la unua milito, inter flegist-soldatoj, montras lin jam senigita de patriota iluzio. Li estis unu el la malmultaj, kiuj jam tiutempe klare vidis la mistifikadon de la naciismo. Tio ne estas hipoteza aludo, sed

atestita per la Notlibro, kiun li verkis dum sia militservo, kaj kiun Banje trovis inter la « paperoj », kiujn Lanti lasis al li en 1936, forironte por sia ĉirkaŭmonda vojaĝo. En tiu Notlibro – parte inka, parte krajona, jen franclingva, jen esperanta – oni trovas ege kuriozajn rimarkojn pri la milito, la soldatoj, la oficiroj, la pastroj, la civiluloj kaj … la virinoj. Li konatiĝis kun la anarkistaj agitistoj kaj verkistoj kaj ekŝatis Johanon Grave kaj Sebastianon For (Faure). Li havis la bezonon kredi en Idealo, kaj li fariĝis fervora kredulo en Anarkio.

Nur la esperantista aktiveco faris el li tiun originalulon, kia ni konas lin per liaj verkoj kaj lia personeco, kaj bone ellerninte la lingvon li ĝue verkadis en esperanto ; kaj SAT ekhavis la profiton el tiu lingva lertiĝo, sen kiu la organizo ne vivus propran vivon kun al ĝi propra dinamiko. Mankis al li oratora kapablo, kaj li neniel penis por akiri tiun kapablon, sed per la plumo li sciis lerte batali kaj konvinki. La rigida logikeco de lia rezonado, la klareco kaj neteco, per kiu li prezentis kaj pravigis siajn tezojn, devis altiri multajn sincerulojn. Ĉiu artikolo lia en *Esperantista Laboristo* frapis la legantojn, igis ilin mediti kaj fervoriĝi por la novaj ideoj. Dank al enviinda obstino, volo kaj metodeco, Lanti fariĝis suverena majstro super la lingvo. Finrezulte neniu tiel bone akiris kiel li senton pri la lingvaj ecoj kaŝitaj en esperanto, pri ĝia delikata kaj multnuanca esprim-kapablo. Oni atentu nur pri la lerta adapto de la Volter-a « Kandid » (Candide) al la esperanta lingvo !

*Nur de malsupre, ne de supre venos la venko !*

Iom post iom, kun la spertoj, perdiĝis iluzioj. Ankaŭ Lanti havis multajn. Li kredis taŭga propagando varbi gravajn mondkonatajn personojn por la revolucia esperantismo : verkistoj, politikistoj kiel Henriko Barbus (Barbusse), Romano

Roland, Alberto Ejnŝtejn k. s. Kelkaj jaroj da interŝanĝo de leteroj kaj ideoj kun tiuj personoj montris al li, ke li vane perdas siajn tempon kaj energion en tia korespondado ; tiuj nomoj neniam donis al nia movado pli ol sian noman apogon : ili neniam kuraĝis ellerni la lingvon. De tiam Lanti ne laciĝis prediki nur al la simplaj proletoj mem, martelante en iliajn cerbojn la reliefajn verojn pri la neceso de komuna lingvo por la socia liberigo.

*La aŭtoritato de Lanti en la unua kongreso de SAT.*

Miskomprenoj regis inter la ĉeestantoj en Prago (Aŭgusto 1921) pri la organiza demando. La kamaradoj konsideris unuafoje tiun ĉi aspekton de la problemo. Tiam Lanti stariĝis kaj diris : « La Parizaj k-doj metis en la projekton de statuto ĉion, kio estas en ili plej bona : sian sperton, sian scion, eĉ iom da sia koro. Se oni ne akceptas tiun statuton laŭ ĝiaj ĝenerala enhavo kaj spirito, la Iniciatanta Komitato rezignos ĉiun oficon. Ni sekvos, sed ni ne volas stari ĉe la direktilo, se ni konscias, ke la vojo sekvenda ne estas la plej bona. » [(1)] Post tiu deklaro la voĉdono ne renkontis barojn. La bazo de SAT estis starigita.

Pri la lingva flanko en la gazeto de SAT, Lanti esprimis, ke lia sintenado estas « lasi liberecon al la verkantoj. La vivo mem – kaj nur la vivo – povas solvi la demandon pri evoluo aŭ ŝtoniĝo de nia lingvo ».

---

(1) Kongresa protokolo, *Sennacieca Revuo*, Okt. 1921, p. 3. – Jam tiutempe la celo estis tute klare fiksita por la iniciatantoj, kaj ili estis firme decidintaj venki super la oportunismaj internaciistoj, kiuj ne komprenis aŭ ŝajnigis ne kompreni la unikan signifon de l'*sennacieco.*

*Lanti kun misio al Moskvo.*

En Aŭgusto 1922, dum la SAT-anoj kongresis la duan fojon, ĉi-jare en Frankfurto-ĉe-Majno, Lanti vojaĝis al Moskvo por savi la esperantismon en komunista medio. K-do Gihenef legis lian redakcian raporton en la kongreso ; tiu raporto finiĝas per jena espero : « Ni esperu, ke SAT fariĝos sufiĉe multanara, sufiĉe monhava por certigi vivrimedojn al « Sennacieca Revuo » ebligantaj ĉiudusemajnan aperadon kaj dungon de *ĉef-redaktoro.* Tiun tagon mi kun plezuro eksiĝos kun ioma fiereco pro la venkitaj malfacilaĵoj… ». « Sennacieca Revuo » eliris en Oktobro 1921, sekvante al « Esperantista Laboristo ».

Lanti estis bonakceptita en Moskvo de rondo de aktivuloj, k-doj Demidjuk, Futerfas, Nekrasov kaj Rozenblat, kiuj kvar-ope aliĝis al SAT, dum la altranga ŝtatoficisto Ernesto Drezen aliĝis nur kiel « aspiranta membro ». Ili formos pli malfrue kernon de SAT en Sovetio kaj komencis eldoni, en junio 1922, revuon ĉefe literaturan « La Nova Epoko ». En la tria kajero de tiu gazeto ni legas pri la vizito de Lanti, ke li « venis komisiite de SAT por esplori la faktan staton de la demando pri Lingvo Internacia ĉe Komintern, ĉar dum la lasta tempo idistoj multe fanfaronis en tutmonda komunista gazetaro, ke « ido estas akceptita en Komintern ». Laŭ la oficialaj informoj, ricevitaj de k-do Lanti ĉe la Sekretariaro, « la *studkomisiono* [1] estis antaŭ kelkaj monatoj *likvidita* kaj Komintern akceptis *neniam decidon* rilate al L. I. … ».

Okaze de tiu restado en Moskvo Lanti plifirmigis la amikajn rilatojn kun la redaktantoj de « La Nova Epoko », al kiu li baldaŭ poste kontribuis per verkaĵo, kiu montras la rilaton de SAT al la ideo de *sennaciismo*.

(1) Temas pri Komisiono, kiu devis pristudi la eblojn de adopto de Lingvo Internacia ĉe Komintern. – *Kompil*.

Pri siaj impresoj en Sovetio ni legis en sekvantaj numeroj de « Sennacieca Revuo » interesegan raporton, kies konkludo estis pesimista. « *Nenia politika motivo povas trudi al mi la devon silenti pri la malbonaj impresoj, kiujn mi kunportis el Rusio* ». Plua seniluziiĝo sur lia vivovojo, unu el la plej amaraj.

Fine Lanti kunportis dokumentojn el Komintern, per kiuj Rakoŝi deklaris, ke la tiel nomata « studkomisiono por alpreno de helpa lingvo en la 3-a Internacio », starigita dum la 2-a kongreso, jam ne plu funkcias.

*Estonta antagonisto de superpartia SAT.*

Ernesto Drezen, kiu havis en tiu tempo gravan postenon, ĉe la Tutrusia Ekzekutiva Komitato de Sovetoj, sperta esperantisto, interesata pri la lingvaj temoj kaj scienco (li verkos poste plurajn traktaĵojn prilingvajn kaj « Historion de la Mondolingvo », posedanto de ampleksa esperantlingva biblioteko, kiun Lanti admiris okaze de vizito al Kremlo, ne kaŝis sian malkonsenton pri la principoj de SAT. Li riproĉis al la Asocio, ke ĝi ne estas pure komunista ; li ne volis kunlabori kun anarkistoj kaj socialdemokratoj. Tamen li estis prezidanto de Sovetlanda Esperanto-Unuiĝo, en kiu troviĝis plej aŭtentaj eks-burĝoj el la cara epoko, freŝe baptitaj revoluciuloj ; li mem estis eksoficiro de la cara armeo.

Evidente la celo de E. Drezen estis meti la Laboristan Esperanto-Movadon sub la kontrolon kaj regadon de la Komunista Internacio. En la giganta lukto, kiu estiĝos en la sekvontaj jaroj inter unuflanke la iniciatintoj de SAT kaj la ne-ortodoksaj SAT-anoj, sub gvido de Lanti, kaj aliflanke la ortodoksaj komunistoj-esperantistoj, sub gvido de Drezen, kaj kiu fine kondukos al skismo (1931), SAT pene konservos sian ekvilibron. Sed ĝi venkos dank' al la firmeco de sia principaro kaj al la nerefutebleco de la Lanti-a argumentado.

Dank’ ankaŭ al la sindonemo de la membroj, kiuj formas de la komenco la kernon de SAT kaj kiuj konsistigis veran gvardion.

*La dua kongreso de SAT en Frankfurto (1922).*

La Kongreson partoprenis 232 gekamaradoj ; ĝi konstatis la pligraviĝon de « Sennacieca Revuo », kiu eliradis monate en amplekso de 20 paĝoj, kvinmil-ekzemplere. Ĝi decidis per plimulto de 90 voĉoj kontraŭ 29 kaj 78 sindetenoj, ke SAT-ano ne rajtas esti samtempe membro de iu burĝa kaj t. n. neŭtrala esp. organizo, nek de iu kontraŭlaborista organizo, escepte en urbo, kie ne ankoraŭ ekzistas proleta esperantista grupo, kaj escepte en okazo, kiam la kunlaborado povos doni profiton al nia afero. Ĝi eksigis du policistojn el Aŭstrio, kiuj aliĝis al la Asocio.

Romano Roland, leginte pri tiu decido en la franca komunista organo « La Homaro », deklaris sian malsolidariĝon kun tiu statuta « malpermeso », kiu *« pruvas, ke la revoluciaj esperantistoj tute ne konscias pri la grandeco de Esperanto. Esperanto estas, per si mem, revolucio multe pli efika ol ĉiuj t. n. revoluciaj kongresoj, ĉar ĝi kreas, ĝin esprimante* (1)*, pensmanieron internacian, sennaciecan, tutmondan ».*

La gvidrezolucio de la kongreso substrekis, ke la Asocio jam transpaŝis la konstruan periodon kaj nun staras sur principe firmaj bazoj kaj ke la vivpovo de SAT dependas ĉefe de la konstanteco kaj seriozeco de la intermembraj rilatoj.

*SAT sub influo de la Rusa Revolucio.*

Ne nur la detalaj priskriboj de Lanti pri lia vojaĝo en Sovetio plenigas en tiu tempo la paĝojn de « Sennacieca

(1) Traduko neklara de la penso de R. R., kiun ni trovis tiel en « Sennacieca Revuo ». – *Eld.*

Revuo », sed ankaŭ aperas, en pluraj numeroj de la jaro 1923, la kompleta teksto de la « Konstitucio de Ruslanda Socialista Federacia Soveta Respubliko ». Estas ekster dubo, ke per la legado de la SAT-gazeto multaj ĝis tiam neŭtralaj esperantistoj varbiĝis por la revolucia esperantismo, kaj eĉ por la Rusa revolucio…

*La strukturo de SAT.*

La fikso kaj konfirmo de la principoj de SAT (individua aliĝo, sennacieca organizformo) okaze de la du unuaj kongresoj ne senkuraĝigis la opozicion, kiu venis unuavice el social-demokrataj esperantistaj rondoj. K-do Sproeck (« Aso ») formulis ŝanĝojn en formo de tri proponoj al la tria (Kasela) kongreso, kies akcepto signifus radikalan struktur-ŝanĝon, eĉ ŝanĝon en la celo. Li volis fari propagandan organizon el SAT, fondi propagandajn sekciojn kaj elekti delegitojn kun grupaj mandatoj por la kongresoj. SAT do ne plu profitus el la unulingveco de sia membraro per nova organiza strukturo, kiu permesas la senperan intermembran kontakton, sed ĝi imitus la multlingvajn « internaciojn », kies membroj bezonas perantojn, teknikistojn, por aranĝi la organizan vivon.

*Alvenis la 3-a Kongreso de SAT, en Kaselo*, mezaŭguste *1923*, kun proks. 300 ĉeestantoj, certe malgranda nombro kompare al la ĵus antaŭirinta Nuremberga Kongreso de la neŭtralaj esperantistoj, kiu kunvenigis preskaŭ tri mil zamenhofanojn. Sed gravaj estis la laboroj kaj la decidoj de tiu SAT-kongreso, en kiu la fondintoj luktis sur du frontoj por la triumfo de la principoj, sur kiuj estis starigita la Asocio. Fine fiaskis ĉiuj provoj aliigi la karakteron de SAT, unuflanke tiuj de socialdemokrataj SAT-anoj, simpatiaj al ideo de Internacio laŭ konata modelo, aliflanke tiuj de komunistfrakcianoj, kiuj vidis

unuafoje eblon kaj trovis intereson aneksi la organizon al la 3-a Internacio.

Tiuepoke nia movado estis sufiĉe serioze priatentata de la gvidantoj de la bolŝevika revolucio. Ni atingis, ke M. Kalinin, la unua prezidanto de l'Soveta Respubliko, verku specialan antaŭparolon al la libro eldonita de SAT sub titolo « Dokumentoj de Komunismo » (10-a Julio 1923).

E. Drezen unuafoje atakas, post interkonsento kun frakcianoj en komunistfrakcia kunsido, kie Lanti, tiam ano de la partio, bremsas la partiecajn aspirojn kaj admonas al supertendenceco. Tiu unua interbatalo inter Lanti kaj Drezen finiĝas per malvenko de Drezen, kiu kredis, ke li povos regi la kongreson.

Menciinda okazaĵo : Individuo fremda al la organizo, eĉ ne membro, kiel montris la sekvanta esploro, sed ano de komunista partio, provante utiligi la kongreson por komercista celo, estas senmaskigata de k-do T. Veder, tamen unue protektata de Drezen, kiu protestas kontraŭ tio, ke « senpartia [1] publiko juĝu pri k-doj, kiuj eble plenumas partian komision en iu ajn formo ». Tipa sinteno !

Ankaŭ idistaj komunistoj kredis la momenton oportuna por fuŝreklami sian propran idiomon : sur grandaj afiŝoj gluitaj dise tra la urbo ili laŭdis sian projekton, mis-uzante la nomon de Trocki, kiu neniam esprimis tiurilatan favoron.

Kun vervo dume la kongreso laboras kaj prizorgas la SAT-aferon. La administracio transiris en Junio 1923 de Parizo al Lejpcigo, kie k-do R. Leĥner (Lerchner) estas dungita salajre. La gazeto presiĝas jam de Januaro 1922 ĉe komunista kooperativa presejo en Lejpcigo. SAT-eldonfako kooperativa naskiĝas en Duseldorfo ; la kongreso sankcias tiun fondon. Oni

(1) T. e. nepartiana. – *Eld.*

akceptas devigan abonon de ĉiuj aktivaj SAT-anoj al « Sennacieca Revuo ».

Malakceptinte la proponojn de k-do Sprek (Sproeck), la Gvidrezolucio substrekas, ke

*« nia peresperanta organizo devas konservi kaj eĉ akcenti sian kulturan, teknikan, laboristservan karakteron ; aliel ĝi ne estus vivpova kaj eĉ ne havus vivpravecon, vivrajtecon ;*

*« malaprobas, konsekvence, ĉian emon enŝovi en nia Asocio la disputpunktojn, kiuj disigas nuntempe la diversajn klasbatalajn organizojn…*

*« malaprobas ĉian aktivan partoprenon en la t. n. neŭtrala esperanta movado. (Ni ne konsideras la lernadon de esperanto ĉe neŭtrala rondo kiel aktivan partoprenon)…*

*« La Kongreso konsilas, ke en ĉiu loka grupo, sufiĉe multanara, kelkaj k-doj sin tute dediĉu al la SAT- laboro, kiu konsistu :*

*« 1-e en interrilatoj kun alilandanoj ;*

*« 2-e en tradukado de artikoloj el S. R. por la lokaj aŭ fakaj gazetoj kaj verkado de raportoj por S. R. ;*

*« 3-e en organizado de kunvenoj, celantaj eduki kaj klerigi la membrojn ;*

*« 4-e en klopodoj por k-doj petantaj informojn aŭ trapasantaj la urbon ktp. ».*

*« ... la Kongreso malaprobas ĉian tendencon fari el SAT poresperantan organizon, – kio kaŭzus nur konfuzon kaj maltrafon... ».*

*Akurata administrado en Lejpcigo.*

Tre sentebla fariĝas la disvolviĝo de nia movado, la rapida kreskado, de kiam la lejpcigaj kamaradoj transprenis en sian sinon la administracion kune kun la gazet-eldono kaj -ekspedo.

En la Kolmstrato k-do Lerĥner instalas sian oficejon, kie ofte renkontiĝas libervolaj helpantoj por plenumi la konstante pligrandiĝantan labortaskon.

La kontakto kun la « Ekzekutivo » (1) en Parizo estas bona, kaj jam tiutempe la fizionomio de la Asocio konturiĝas tia, kia ĝi estas hodiaŭ, – ne nur en la teoriaj prezentoj de Lanti en la gazeto, sed eĉ jam en la praktiko ĉiutaga de la SAT-anoj.

La *Direkcio* (1)(1) konsistas plue en Parizo el la sama kolektiveto ; la transkonduko de l'administracio al Lejpcigo estis paŝo absolute necesiĝinta, kiam la laboro fariĝis tro peza por ne-salajrata funkciulo.

*Plifirmigo de la idea bazo.*


Estas fakto, ke la klarvideco de Lanti savis la infanaĝan SAT el devojiĝo. Kaj Lanti argumentis tiom pli konvinkite kaj konvinke, ke li antaŭ nelonge proprokule vidis Moskvon, enspiris la tiean atmosferon kaj juĝis konklude jene :

> *« Falinte de ia alta idealeca : turo, kie mi kutimis karesi kaj luli mian revon, mi sentas min hodiaŭ treege kontuzita. Dolora estas mia spiritostato. Tamen sur la ruinaĵo de miaj kredoj staras sendifekta iu ideo : la internaciismo. La ĉiutaga vivo montras la pravecon de tiu ideo. Estas okulfrape, ke malgraŭ ĉiuj baroj la homaro iras, en sango kaj perforto, al pli kaj pli intima unueco… Ju pli da internaciemo regas en la mondo, des pli bonfartas la homaro ; ju pli da naciemo, des pli da malamo, da malbono ».*

(1) Titolo poste ŝanĝita en Plenum-Komitato.

*Konkludo pri idistoj kaj aliaj mondlingvistoj.*

La idistoj speciale ĝenis tiutempe la revoluciemajn mediojn. La laboristaj esperantistoj estis do devigataj paroli en siaj gazetoj pri tiuj skismuloj por averti mis-informitojn kaj bari al mensogo kaj blufo. Ni trovas ankoraŭ post la fama vojaĝo de Lanti al Moskvo notojn aŭ artikolojn koncerne al ido kaj idistoj en « Sennacieca Revuo », tiel ekz. tutkolona klariga verkaĵo de C. Ragje (Raguier) en februara numero 1923 pri enkonduko de ido-kursoj ĉe la parizaj komunist-infanaj kluboj (kiu provo fiaskis pro manko de instruantoj). En la sama n-ro iu k-do Robin predikas « forĵeti ĉian fanatikecon » kaj ekzameni ankaŭ aliajn sistemojn de lingvo internacia, por alproprigi al si la plej bonon el ili.



*Kresko de la SAT-anaro*

K-do Lanti tre trafe juĝas pri idistoj kaj aliaj reform-emuloj de la lingvo en artikolo « Zigzage… » de « S. R. », Junio 1923 : li dividas la propagandistojn de aliaj mondlingvaj projektoj en tri kategoriojn: 1) blindaj fanatikuloj; 2) sinceruloj trompitaj, preskaŭ nenion konantaj pri la esperanto-movado ; 3) mallojalaj personoj havantaj kaŝitan motivon por kontraŭbatali esperanton. – Donante sian opinion

pri ĉiuj el ili, li konkludas : « La ĉefa afero estas la enfaktigo de esperanto en la vivo. Ni kreu faktojn, ĉar faktoj parolas pli elokvente ol rezonoj. Tio estas SAT-aneca laboro ».

*Laborist-esperantistoj ĉe neŭtrala Esperanto-kongreso donas sian apogon al SAT.*

Tia estas la esenco de l'Rezolucio, kiun faris 150 laboristaj esperantistoj el 15 landoj, kiuj aparte kunvenis en Nurembergo, okaze de la 15-a Universala Kongreso de Esperanto: « Konsiderinte la gravecon kaj utilecon de esperanto por la proletaria movado, konsiderinte la historiajn devojn plenumendajn de la tutmonda laborista movado, spertinte la sekvojn de ŝovinismo kaj militarismo, la ĉeestintoj ekkonis kaj esprimis la necesecon de la koncentriĝo de ĉiuj fortoj de la klaskonsciaj laboristoj esperantistaj, por ke ni povu labori por kaj per esperanto. Ni konsideras la unuiĝon de SAT kiel la plej taŭgan kaj utilan fundamenton kaj bazon por tia koncentriĝo… ».

La redaktoro de « S. R. » faras jenan komenton, por motivigi neenpreson de la tuta raporto pri tiu kunveno :

> *« Ni ne povas enpresi tiun raporton unue tial ke loko mankas, due tial ke ni ne aprobas la agadon de tiuj laboristoj, kiuj elspezis tempon kaj monon por partopreni tiun neŭtralan kongreson – dum ilia klasa devo estis simple ĉeesti en Kaselo la kongreson de SAT. Ni ĝojas, ke la laboristoj kunvenintaj en Nürnberg ne estas tute senigitaj je klaskonscio – kaj esperas, ke tiu klaskonscio pli kaj pli akriĝas, firmiĝos kaj tiel malhelpos, ke ili faru estonte ĉian ajn neutilan kompromison ».*

*Semajna gazeto decidita en Bruselo (1924).*

Jam en la redakcia raporto, kiun Lanti faris por la Frankfurta kongreso, li esprimis la deziron esti anstataŭata, kiel redaktoro,

de alia kompetenta kamarado. Neniu anoncis sin, ankaŭ ne en Kaselo. Tamen Lanti, post korespondado kun k-do Bartelmes, decidis viziti ĉi tiun en lia hejmurbo, Duseldorfo, por trakti kun li pri eventuala transpreno de la redaktlaboro.

Cetere estis la tempo de grandaj projektoj, la tempo de alfluado kontinua de novaj membro-amasoj al la organizo, kiuj liveris la necesajn monrimedojn por novaj efektivigoj. Unu el tiuj planoj estis la eldono de semajna gazeto.

Lanti anoncas ĝin en la julia numero de « Sennacieca Revuo » ; en la sekvanta numero li asertas, ke « la dinamika stato de nia movado nepre bezonas semajnan presorganon por povi normale malvolviĝi… *Sennaciulo* estos tia, kia ĝin faros la kompetentaj kaj laboremaj SAT-anoj el ĉiuj sektoroj (*) ».

La Brusela kongreso kun unuanimeco sankcias la proponon pri aperigo de l'semajna SAT-gazeto, ekde la 1-a de Oktobro 1924 sub redaktado de Bartelmes en Lejpcigo, kie tiutempe troviĝis administrejo kaj presejo.

« Sennacieca Revuo » travivas metamorfozon : ĝi daŭre aperos monate, sed en malgranda formato, kiel Literatur-Scienca Revuo de SAT. Jam la Kasela kongreso decidis, ke ĝi anstataŭu per sia titolo la « Nova Epoko »-n en Moskvo, sed ke ĝiaj redaktantoj restu la samaj fervoraj kaj kapablaj moskvaj kamaradoj, kiuj ĝis tiam prizorgis « LNE ». Tiel do okazis.

En « Sennacieca Revuo », dum la tempo kiam ĝi estis la oficiala organo de SAT, oni estis elimininta la literaturan parton, ĉar tiun parton oni ekskluzive lasis al « La Nova Epoko », en kiu ne presiĝis informoj pri la movado.

Tiel unu organo kompletigis la alian.

---

(*) Per « sektoroj » oni nomis la nunajn « horzonojn » – geografiaj, ne politikaj subdividoj de la terglobo. Vidu detalojn p. 151 – *Kompil.*

Sed nun, en Oktobro 1924, la semajna « Sennaciulo » fariĝis la oficiala asocia organo, kaj la nova serio de « Sennacieca Revuo » eldoniĝis en sia malgranda « novepoka » formato kun ruĝa kovrilo, redaktita en Moskvo, presita en Lejpcigo : SAT jen disponas pri du periodaĵoj, kiel en la antaŭa jaro, sed kun la diferenco ke nun la oficiala organo fariĝis ĉiusemajna.

En la praktiko, kiel sur la intelekta kampo, SAT konis plu neniajn naciajn limigojn. La sennacieco simboliĝis en la tri-urba aktiveco por la komuna idealo, en la aktiveco de la kolektivoj el Parizo, Lejpcigo kaj Moskvo.

La *Brusela, 4-a SAT-Kongreso* (1924) etiketis sin ankoraŭ per neesperantista, sed esperantema « honorprezidanto » : Ernesto Toller, tiutempe enkarcerigita en Bavaria malliberejo kiel ribelulo, atentinda proleta verkisto, kies vivo finiĝis pli malfrue en Novjorko, per memmortigo.

SAT nombris 2 671 membrojn la 1-an de Aŭgusto 1924. Jam tiutempe okazis grava oscilado ; en iuj landoj konsiderinde plialtiĝis la membronombro, en aliaj ĝi falis (ofte pro la politika reĝimo).

La Kongreso voĉdonis pri modifo de la severa 2-a statut-paragrafo, kiu malpermesis al SAT-anoj ankaŭ esti membroj de iu neŭtrala esperantista organizo. Sed tiu rigoreco restos aplikata al la estraro. K-do Mark Starr disvolvis temon pri utiligo de esperanto kaj interrilatoj de SAT kun laboristaj organizoj internaciaj kaj montris praktikajn rimedojn, kiujn la Kongreso unuanime akceptas.

*Redakciaj problemoj.*

« Vi tute eraras pri la motivo, kiu igis nin mallongigi vian artikolon », skribis Lanti en iu n-ro de « S. R. ». « Estis ja en la parto forstrekita nenio polemika, kaj volonte ni estus ĝin publikigintaj, se… se nia Revuo estus 40-paĝa ! ».

Tia restis la problemo ĝis la nuna tago, pro la malmulta spaco disponebla. Tamen Bartelmes, en la tempo en kiu li memstare, sen interveno de Lanti aŭ de la tiama Direkcio, redaktis la unuajn numerojn de « Sennaciulo » ne ĉiam trafe elektis la materialon. Li estis mem tro influita de la komunista tendenco, de partiaj konsideroj, por enkonduki la veran SAT-spiriton en la paĝoj de « Sennaciulo ». Sekve aperis ofte tute sensignifaj kaj tendencaj tradukoj, alvokoj, pritraktoj, en kiuj nenio reflektis la originalan karakteron de SAT kaj de ĝia principaro. Ankaŭ redakci-teknikaj mankoj estis multaj en tiuj numeroj, ĉar Bartelmes ankoraŭ ne regis sian fakon. Evidentiĝis la malbonstato de redakcio troviĝanta distance disigita de la gvid-instanco. Tio kondukis al miskomprenoj, malĝustaj interpretoj kaj riproĉoj.

Post la 32-a numero de « Sennaciulo », en Majo 1925, Lanti ne plu konsentas, ke lia nomo aperu kiel gvidanto de la gazeto. La tiama Ekzekutiva Komisiono de SAT en Parizo (poste nomata Direkcio, kaj fine Plenum-Komitato) transprenis tiun rolon laŭnome. Artikolo aperinta frunte de la 32-a numero, laŭ sia enhavo ne kongruas kun la ideoj de SAT ; ĝi estas verkita laŭ partipolitikeca, tre tendenca maniero de la bolŝevisto Radek, kiu celas inciti la polajn laboristojn al konkero de popola « sendependeco » – konforma al la sovetiaj politiko kaj ambicio.

Cetere tio ne signifis, ke Lanti rifuzis sian pluan kunlaboradon al la SAT-gazetoj ; en la sekvantaj numeroj aperas pluraj tradukoj kaj originaloj el lia plumo.

Iom pli malfrue taktikaj konsideroj instigas Lanti-n ankaŭ eksiĝi el la Direkta Komitato de SAT ; ĉefe decida por tiu paŝo estis certe la eksiĝo de anarkistoj el SAT kaj fondo de aparta anarkista esperantista organizo tutmonda (TLES). Krome

ekzistis privataj kaŭzoj : la sekvoj de malsano kaj operacio. Laŭ peto de kamaradino Noël, la 5-a Kongreso en Vieno insiste petis k-don Lanti repreni sian lokon en la Direkcio.

Ĉe la 52-a numero de « Sennaciulo » Bartelmes ne plu signas kiel redaktoro de la gazeto kaj forlasas, eksigite de la Direkcio, la postenon. Kelkajn semajnojn poste anoncas sin kiel respondeca pri la redaktado naŭmembra redakci-komisiono el Lejpciganoj, el kiuj du estas anarkistoj, du socialdemokratoj, la ceteraj komunistoj, partianoj aŭ eksterpartiaj.

« Se vere la « unuflankismo » de la redakcio kaŭzis tion, ke multaj k-doj ne reabonis, ĉesis propagandi », skribas la Ekzekutiva Komisiono, « do nun la certeco, ke ĉiu tendenco estas egale atentata, devas kaŭzi pli grandan viglecon de nia entrepreno ».

Fakte la 10-an de decembro 1925 « Sennaciulo » sciigas, ke el la redakta komisiono eksiĝis la du anarkistaj k-doj. Ili ne trovis anstataŭantojn. Kaj la aspekto de la gazeto restas same komunista, kia ĝi estis sub la redaktado de Bartelmes. Estas dirende, ke fakte en tiu epoko la komunistoj estis la plej viglaj kaj agemaj kunlaborantoj al SAT kaj al ĝia gazeto.

*La 5-a Kongreso en Vieno (1925).*

Kvankam nur 150 anoj partoprenis tiun ĉi kongreson, restas memorinda el la ĉeestintoj la impona manifestacio propaganda, kiu moviĝis tra la stratoj de la laborista kvartalo Floridsdorf al la Popoldomo (la kongresejo.). Ĉefa aktivulo kaj kongres-komitatano estis tiam junaĝa k-do Jonas, kiu en 1951 fariĝis ĉefurbestro de Vieno protektanta per sia nomo aranĝojn favorajn al aŭ ligitajn kun Esperantismo.

La Kongreso kreis komisionon, kiu devus ellabori kaj prezenti program-projekton en la venonta kongreso : la plimulto esprimis sin favore al la ideo, ke SAT havu programon, same kiel tian havas partioj.

La projekto de la komisiono aperis en la n-ro 78 (26-a de Marto 1926) de « Sennaciulo » kaj utiligis en la ĉapitro-kapoj la tiamajn agitvortojn komunistajn el la militista slango : « Sur frontsektoro de interpopola interligo, sur kultura kampo » kaj « Unueca fronto proleta ». Lanti kun granda amaro kaj persisto kontraŭbatalis tiaspecan Programon, elmontrante ĉiujn ĝiajn malfortajn flankojn kaj senbazajn argumentojn.

*Memstareco de la propagandaj aparatoj.*

Pri la rilatoj de SAT kun la teritoriaj (aŭ landaj) laboristaj esperanto-organizoj (nomataj mallonge LEA-oj) la Kongreso multe debatis. Tiel oni provis fiksi la ekzaktan limon inter la taskaro de SAT kaj tiu de la LEA-oj, celante malebligi, ke unu transprenu iujn taskojn de la alia, aŭ surpaŝu terenon ne propran. « Ne eblas kunfandi la nacilingvan propagandon laŭ tutmonda skalo ». Kialo : la laŭlande variaj propagandaj kondiĉoj.

*Kontraŭ lingva novigemo !*

Longan debaton iniciatis k-do Fejt (Feith) el Vieno pri la pureco de la lingvo en la SAT-eldonaĵoj. Li severe kondamnis la pli kaj pli etendiĝantan uzadon de pseŭdo-sufiksoj (-iv, -oz, k. a.) en la ĝenerala lingvo, kiel ankaŭ aliajn futurismajn formojn, kiuj povus endanĝerigi la lingvan unuecon de la esperantistoj. Se li vivus ankoraŭ, tiu ĉi obstine batalema zamenhofano kun sia firma pozicio, kian atakon li ekrajdus kontraŭ la lingva skolo Kaloĉaja !…

Li triumfis en Vieno, ĉar la Kongreso akceptis tiurilatan proponon kontraŭ neologismoj kaj por uzado de pure fundamenta lingvo, kun instrukcioj al la redaktoroj, kaj metis ĝin ankaŭ en la kongresan gvidrezolucion.

*Propra lernolibro.*

Kvankam ne estas tasko de SAT eldoni instruilojn, tia verkaĵo necesiĝis por landoj, lingvoregionoj, kiuj ne posedis propagand-aparaton nek monrimedojn por eldoni proprajn lernilojn. Pure esperantlingva lernolibro do montriĝis bezonaĵo. K-doj Bartelmes kaj Lerĥner en komuna laboro kreis la unuan eldonon de tiu lernolibro, en laborpaŭzoj, ĉe la administrejo de SAT. « Petro », la historio de laboristido, aranĝita en formo de kursa lernolibro laŭ duon-rekta, miksita metodo, ilustrita, estis entuziasme akceptata en ĉiuj landoj, kie SAT trovis disvastiĝon. Ĝis la dua milito ĝi vidos sep eldonojn.

*Al Leningrado ! (1926).*

E. Drezen, apogante sin sur la favora evoluo de l'esperantismo tiam, en Sovetio, kie ĉiuj sincere strebadis al nova kulturo, al nova vivmaniero kaj al ĝeneraligo tra la mondo de la fratecaj principoj, kiujn inspiras la komunismo en sia teorio, aludis en Vieno, en sia funkcio kiel prezidanto de Sovetlanda Esperantista Unuiĝo, pri eventuala invito de la 6-a SAT-Kongreso al Leningrado ; sekvus post-ekskurso al Moskvo. Tiu invito efektiviĝis nur plurajn monatojn post Vieno : la unua kongresa komuniko aperas en n-ro 81 (14-a Aprilo 1926) ; ĝi elvokas grandan entuziasmon ĉe ĉiuj, junaj kaj pli aĝaj, sen diferenco de partia tendenco, kiuj volus konatiĝi kun la sovetia realo.

Fakte tiu 6-a Kongreso havis pli varban ol organizlaboran karakteron. Ja neniu membro de la Ekzekutiva Komisiono el

Parizo ĉeestis ; nur k-do Lerĥner, la administranto en Lejpcigo representis la estraron. Tamen la raportoj de la Komisiono pariza estis unuanime aprobitaj, kaj la ceteraj raporto en la




tagordo havis pli informan kaj propagandan karakteron ol la tasko elvoki longajn debatojn.

Estis prezentataj raportoj pri esperanto en la lernejoj kaj

laboristaj kluboj, pri esperanto kaj radiofonio, pri internacia laborista korespondado. Komisiono prezentas kaj akceptigas tezojn pri la estonta kunlaborado inter SAT kaj la LEA-oj. Tamen ankoraŭ restas neklaraj la principoj de kunlaboro kaj interligo ; nova pli profunda enketo ĉe la LEA-estraroj estos do farata de dekmembra komisiono, el kiuj la plimulto estas estraranoj de iu landa asocio.

Notinde estas, ke la tiama popolkomisaro por edukado, Lunaĉarski, estis honora prezidanto de nia kongreso, kaj ke la soveta registaro eldonis du poŝtmarkojn memore al ĝi, kiuj surportas tre videble la komencliterojn de nia Asocio. Kun kuriozaj sentoj, certe, rigardas tiujn eldonaĵojn de la sovetia poŝto la esperantistoj en popol-demokratioj, kiuj transvivis la sekvantan periodon, perdis la eblecon utiligi sian esperanto-scion kaj hazarde tenas sub siaj okuloj specimenojn de tiuj poŝtmarkoj… Kaj ankaŭ la « okcident-mondaj » esperantistoj ne povos kaŝi sian miron kaj sian malgajan surprizon antaŭ tiuj pruviloj.



La kongreso semis grandan entuziasmon en la koroj de la partoprenintoj ; ja la aranĝoj estis pompaj ; la kongresejo estis la Taŭra Palaco, – dum la cara epoko la parlamentejo de l'tiama konstitucia « Duma ». 400 kongresanoj alvenis, el 656 aliĝintoj, plejparte per ŝipo.

Post tiu kongreso la SAT-anaro ŝvelis rapide en Sovetio ĝis preskaŭ 2 000 membroj.

*La Ekzekutiva Komitato konfirmas la devizon « For la Neŭtralismon ! ».*

En la n-ro 81 (29-a Aprilo 1926) la E. K. oficiale komunikas

sian pozicion, okaze de polemikado inter unuopaj SAT-anoj kaj la ĵurnalo « Heroldo de Esperanto » :

> *« ... estas tute klare », skribas la E. K., « ke se iu ano preferas aboni, kunlabori, propagandi ktp. por aliaj esp. gazetoj, ol tiuj de SAT, li grave pekas kontraŭ nian statuton kaj pro tio meritas admonojn. Sincera kaj lojala SAT-ano devas ja dediĉi sian tutan energion por kreskigi, plitaŭgigi la asocian aparaton. Kiu agas aliel, tiu povas esti nur perfidulo aŭ burĝspiritulo erare eniĝinta niajn vicojn. Jen tute malkaŝe kia estas nia opinio pri la disputo inter « Heroldo »-anoj kaj « Sennaciulo »-anoj : Ĉu tio signifas, ke ni deziras la malprosperon de la gazeto « Heroldo de Esperanto » ? Certe ne. La fakto, ke ĝi devis ĉesi sian duonsemajnan aperadon neniel ĝojigis nin. Male. Tio nur pruvas, ke nia lingvo ne estas tiom disvastigita en neŭtralaj rondoj, kiam estas dezirinde. Ni ja estas konvinkitaj, ke la aplikado de esperanto iel estas revoluciiga faktoro eĉ en la manoj de nerevoluciuloj. Sed ĉu tio signifas, ke la esp. laboristo povas, neperfidante siajn klasajn interesojn, ial kunhelpi, ial subteni neŭtralan ĵurnalon ? La simpla saĝo respondas : NE. La energio foruzata profite al tia ĵurnalo vole nevole malprofitigas la SAT-organojn. Hodiaŭ kiel antaŭ kelkaj jaroj la agitvorto « For la Neŭtralismon » restas ĝusta kaj aplikenda ».*

*Lanti pri la supertendenceco.*

En n-roj 93 kaj 94 (Julio 1926) de « Sennaciulo » Lanti respondas al k-do Zilberfarb (anarkiema k-do el Ukrainio, kaj kies traduko de *La Internacio* estis elektita kiel la plej bona) pri « front-unueco ». Li donas klarigon pri la kialo de la krizo en SAT :

*« La krizon okazigas tio, ke jam [(1)] ne ekzistas* ia *spirito-stato, sufiĉe forta, kiun mi nomos* sataneca… *la partieco iafoje superas la junan satanecan spiriton… Komunistoj (ne ĉiuj !) deziras, ke SAT estu pure komunista… same dirite pri la aliaj tendencoj ».*

Ekde la 95-a n-ro la gazeto estas presata en Parizo… Tamen « Sennaciulo » restas semajna. Lanti ree transprenis la redaktadon, ripetante akcente, ke « la organoj de nia Asocio estos tiaj, kiaj faros ilin la SAT-anoj mem », substrekante tiel la demokratecan karakteron de la organizo. Ĉefa zorgo de la gvidantoj de SAT estas nun bridi la troajn aspirojn regemajn de la frakcioj el SAT-anoj [(2)], difini ilian signifon kaj elmontri, ke ilia rolo kuŝas ekster la statuto de SAT. Ankaŭ la Direkcio avertas kontraŭ la iluzio, ke SAT povus rapide fariĝi « amas-organizo ».

*« Ni ne havu ia esperon », skribas Lanti, « ke tuj la amaso forlasos la rutinan marĉon, en kiu ĝi vadas. Ni entreprenis longan vojaĝon. Estus nesaĝe kredi, ke baldaŭ ni atingos la celon. Necesas nur ne senkuraĝiĝi ; sufiĉas paŝi senhezite kun la firma certeco, ke ni sekvas la ĝustan vojon ».*

Fakte tiu ĉi reveno de l'redakcio al Parizo finas la ĉapitron de plurmembra diversfrakciana redakcia komitato, kiu en la praktiko rezultigis neniujn bonajn fruktojn. La Direkcio en Parizo akiris la impreson, ke la Lejpciga kerno sub la influo de E. Drezen klopodas kapti la gazeton por sia politika tendenco,

(1) Lanti volis diri « ankoraŭ ».
(2) La nuntempe funkciantaj frakcioj el SAT-anoj, laborantaj konforme al la rolo difinita al ili, donas neniam motivon por plendi pri uzurpemo. – *Kompil.*

por poste kapti la asocion mem. Pro tio la decido de la Direkcio estis saĝa kaj ĝustatempa ; tion pruvis la sekvonta evoluo.

*La abonantaro ne sufiĉe pliiĝas.*

Komence de Januaro 1927 Lanti povas iom ekspiri : la gazeto fariĝas dusemajna, pro financaj konsideroj, nesufiĉa pliiĝo de l'abonantaro kaj malfavore efikanta revaloriĝo de l'franca franko. Tamen ekde la 30-a de Aprilo samjare la semajneco estas reatingita. Lanti ofte mem verkas la frunt-artikolojn. Liaj teknikaj helpantoj ne donas kontentigon. En sia raporto al la 7-a Kongreso (Liono, Francio) la Ekz. Komisiono serĉas kompetentan redaktoron.

*La 7-a SAT-Kongreso en Liono (1927).*

El 349 aliĝintoj ĉeestas proksimume 200 kamaradoj en Liono. La moskvaj redaktoroj ne sendis raporton pri « Sennacieca Revuo », kiu aperas tre malakurate. Lanti mem devas raporti, – negative. Li tamen senkulpigas la ĉefan respondeculon, k-don Nekrasov, dirante, ke « N. laboras kiam la muzo inspiras lin ». Li ne deziras, ke la kongreso mallaŭdu tiun k-don, kiu en la komenca tempo faris multon por SAT. La abonantnombro al « Sennacieca Revuo », laŭ la raporto estas 1 200. La komisiono pri rilatoj inter SAT kaj LEA-oj re-akceptigas la tezojn de la Leningrada kongreso kun kelkaj aldonoj (praktikaj reguloj).

La program-projekto ne prosperas. La komisiono venis al konkludo, ke pro la diversaj tendencoj ekzistantaj en SAT, la alpreno de rigida programo kiel deviga afero, ne estas nun rekomendinda. La celo en la Statuto jam sufiĉe klare difinas nian laboron. – La kongreso elektas seskapan komisionon por

studi dum la sekvanta jaro la jam publikigitan projekton de programo.

Konata bulgara esperantisto, Krestanoff, konfesas sian definitivan konvertiĝon al la SAT-ideoj, post senreviĝoj en la burĝaj medioj ; Lanti vokos lin nelonge post la kongreso por redakti « Sennaciulo »-n.

Antaŭ li k-do Scheithauer, el Vieno, provis redakti la SAT-organon en Parizo, sub gvido de k-do Lanti. Sed tiu kamarado mem ekkonsciis pri la modesteco de siaj kapabloj kaj baldaŭ rezignis.

*Helpanto mallong-tempa…*

En n-ro 157 (6-a Oktobro 1927) ni legas sub la plumo de la nova redaktoro, Ivan Krestanoff, noton pri la malbonaj okuloj de k-do Lanti, al kiu tiu stato ne permesas korekti fuŝe skribitajn manuskriptojn. En la sekvantaj numeroj aperas felietone Lanti-a verkaĵo pri Patriotismo – Internaciismo – Sennaciismo, pli poste libroforme eldonita sub titolo « Naciismo ».

Sed jam en la 164-a n-ro Lanti komunikas, ke li mem devis redakti la numeron plejgrandparte, pro tio ke la dungita redaktoro senaverte forlasis sian oficon la 4-an de Novembro 1927. Cetere oni ekscias, ke tiu « sindonemulo » dediĉis nur parton de sia tempo al la SAT-laboro kaj en la cetera tempo laboris por bulgaraj gazetoj kaj por sia « doktoriĝo ». Al la helpvoko de k-do Lanti respondis fine Bartelmes, ke li estas preta denove transpreni tiun postenon.

Depost februaro 1928 Bartelmes redaktas la gazeton sub gvido de k-do Lanti ; li loĝas en lia pariza hejmo, kie mastrumas la kunulino de Lanti, k-dino Limuzin (Limousin).

Lanti nun tamburas en la gazeto, vokas al grandskala varbado:

*« Nunjare ni eldonos la ducentan numeron de S-ulo. Tiu fakto estas sufiĉe atentinda kaj ĝojiga. Sed ĉu ne estas plorinde, ke nun ni havas apenaŭ 3 000 abonantojn… ».*

*Grandioza projekto : la « Plena Vortaro ».*

La Direkcio de SAT eklaboras por ĝia efektivigo ; en Aprilo 1928 (n-ro 185 de « Sennaciulo ») aperas fruntpaĝe grava alvoko kun informo pri tiu planita eldono kaj kun peto prunti monsumojn. Ĝi estas la iama revo de Zamenhof. SAT realigus tiun revon. Lanti apogas la projekton per jena eldiro de Anatolo Frans (France) : « La Vortaro estas la plej bona, la plej havinda libro ; ĝi entenas ĉiujn aliajn librojn ; sufiĉas nur ke la studanto sciu eltiri ilin ».

Lanti venigis al sia hejmo la fakulojn, kiuj verkos la Plenan Vortaron : Groĵan-Mopen (Grosjean-Maupin), la vortaristo, s-roj Eselin kaj Grenkamp, fine nia kamarado Varingien (Waringhien), kiu per sia lingva kompetento ankoraŭ en la nuna tempo tiel grave servas al nia Asocio rilate verkadon kaj konsiladon [(1)].

Ne facile estis al la iniciatantoj (k-doj Banje, Glodo, Lanti) varbi la aŭtorojn de la Plena Vortaro ! En la Akademio Esperantista regis tiam la opinio, ke ne ankoraŭ alvenis la tempo por entrepreni verkadon de kompleta vortaro ; – ke oni devas lasi al la uzado de la lingvo la zorgon liveri la materialon, ktp. Nu, ĉefe gravis do varbi por la entrepreno personon aŭtoritathavan.

---

(1) S-ro Eselin faris nur la duonon de sia laboro ; kun s-ro Grenkamp la ĝenoj estis oftaj. Groĵan kaj Varingien portis fakte la ĉefan penon de la kompila laboro.
Fine de 1958 aperos la 4-a eldono de tiu ĉi ĉefverko, pliriĉigita per suplemento kun novaj terminoj, kiuj enkondukiĝis en la lingvo ; eldono en tre oportuna reduktita formato.

Tia estis la direktoro de la Sekcio por Komuna Vortaro en la Akademio, E. Groĵan-Mopen (Grosjean-Maupin). Iom post iom Lanti sukcesis konvinki tiun kompetentulon pri la neceso de la eldono ; la afero ne pasis sen forta insistado : Lanti diris al Groĵan-Mopen, ke nepre efektiviĝos baldaŭ la plano, eĉ se neniu lingvokomitatano konsentus partopreni en la verkado. Tiam li fine akceptis entrepreni tiun pezan taskon, havante la celon… « eviti malbonon al la esperanta afero », kaj li disponigis al siaj kunlaborantoj la riĉegan kolekton da lingvaj slipoj, kiujn li akumulis dum dudek jaroj.

Estas reliefiginde, ke Lanti en la kreado de tiu kulmina verko kontribuis per siaj plej bonaj fortoj. Li ne nur iniciatis tiun ĉi entreprenon, sed ankaŭ alportis al ĝi sian konstantan helpon, aldonante siajn rimarkojn sur la presprovaĵoj, kiujn li tre zorge korektis. Tiu prizorgo fariĝis dum tiuj jaroj lia ĉefa tasko, aldonita al la multaj aliaj, kiujn trudis al li lia respondeco al SAT. Iniciatinte la Plenan Vortaron, Lanti faris unuarangan servon al la esperanto-movado. La verko aperos en julio 1930.

Kiel kutime, Lanti lasis al sia amiko Banje (Bannier) la financan kaj administran flankon de la afero.

*Konvencio kun propagandaj organizoj* prepariĝas tiutempe sur la organiza kampo. Temas pri kontrakto inter la regionaj Laboristaj Esperanto-Asocioj (= LEA-oj) kaj SAT, kiu poste ricevos la nomon « Gotenburga Konvencio », ĉar pritraktita kaj akceptita ĝi estis dum la 8-a Kongreso de SAT, en Gotenburgo, en Aŭgusto 1928.

*Esperanto-Servo de SAT,* kun centro en Lejpcigo (k-do Besler), raportas pri la unua jaro da laboro plenumita. Ĝi akiris dum tiu jaro 115 reprezentantojn el 33 landoj, kiuj tradukis kaj aperigis en nacilingvaj laboristaj gazetoj la kolektitan raport-materialon de la Servo. 310 raportoj estis dissenditaj dum

1927, kaj tiuj informoj aperis minimume en 1 466 numeroj de gazetoj. Ni permesu al ni ĉi tie kritikan rimarkon pri la valoro de tiuj raportoj kaj informaĵoj : nur eta parto, laŭ ni, meritis disvastigon kaj tradukadon. La pli granda parto konsistis el tendence troigitaj komunikoj pri efektivaj aŭ intence ŝveligitaj skandaloj, aŭ pri lokaj okazintaĵoj, el kiuj ne estis deduktebla instruo por la ĝenerala publiko gazetleganta.

*La 8-a Kongreso de SAT en Gotenburgo, Svedio (1928).*

Veturis tien pli ol 500 kongresanoj, kiuj estis bonvenigataj de la urbestraro. Sub la gvido de E. Drezen la komunistaj SAT-anoj (almenaŭ tiu parto el ili, kiu blinde sekvis la frakciajn instrukciojn), komencis plane organizitan kritikadon speciale pri la redaktmaniero kaj la enhavo de « Sennaciulo ». La de Lanti verkitaj « Inter Ni »-oj, spritaj, ironiaj kaj akraj, vundis la ortodoksulojn, kaj ili ĉe la tribuno ne retenis sian furiozon… Unuafoje la minaco pri skismo en la estonteco reliefiĝis. Kvankam tiu evoluo estis antaŭvidebla de jaroj, en la sekvo de l'politika evoluo de la laboristaj partioj, neniam ĝi saltis tiel klare en la okulojn. La kom-partianojn ankaŭ ĉagrenis la ŝanĝo en la koncepto de k-do Bartelmes, kiu en kunagado konstanta kun k-do Lanti akceptis ties ideojn larĝhorizontajn kaj nedoktrinecajn. Ja en sia interno tiuj anoj de la Unika Partio estis esperintaj, ke la veno de Bartelmes al la pariza redaktejo signifos gajnon de forta pozicio por la 3-a Internacio en la sino de SAT.

Drezen formulas en Gotenburgo signifoplenan minacon, kiun ni citas laŭvorte, el la kongresa protokolo :

*« Mi povas diri tute klare : ni en Sovetio havas diktaturon laboristan ; tiel longe kiel SAT-movado helpas al pliklerigo de*

*nia laboristaro, ni partoprenos en SAT. Eble povas veni momento, kiam ni estos devigitaj foriri el SAT, aŭ el SAT foriros ĉiuj alitendencanoj. Sed tio povas okazi nur, kiam ŝanĝiĝos la cirkonstancoj… Estas bone se Lanti sukcesas trovi mezan vojon por ni ĉiuj, kun zigzagoj jen al unu flanko, jen al alia. Se estas tiel, ni dum kelkaj jaroj havu eblon iri kune… »* (1)

Ĉi tiuj vortoj havas pezon, ĉar Drezen ne estas iu ajn paganta membro, sed sovetia ŝtatfunkciulo alte lokita kaj estro de la Sovetlanda Esperanto-Unio. Apud tiuj vortoj paliĝas la personaj interbataletoj, kiuj okazas inter diverstendencanoj el sur la tribuno kaj kiuj venenos ankoraŭ la atmosferon de la tri sekvontaj kongresoj.

Komisiono pri studo de la rilatoj inter SAT kaj Landaj Esperanto-organizoj (LEA-oj) kunsidis kaj prezentis tekston de *konvencio*, poste sankciita de SAT kaj la LEA-oj. En tiu konvencio la taskoj de SAT (peresperanta organizo) kaj de la LEA-oj (por-esperantaj teritoriaj organizoj) estas precize fiksitaj kaj distinge traktitaj ; en ĝi oni parolas ankaŭ pri la funkciado de lokaj SAT-Rondoj, pri perantoj kaj pri la du malsamaj kotizoj, nome al SAT kaj al la landa organizo. Oni konstatas, ke LEA-oj estas kaj estu la « rezervujoj » de SAT.

La Kongreso akceptas gravan aldonon al la Statuto (paragrafo unua), kiu precizigas celon kaj taskon de SAT, rilate sendogmigon, klerigon, komparon de tezoj kaj ideoj. Tiuj ĉi aldonaj linioj devos ŝirmi la Asocion kontraŭ netoleremuloj, ortodoksuloj kiuj klopodus enkonduki ĉe SAT sian propran starpunkton kaj sekve fuŝus la spiriton de nia Asocio, provokante disputojn.

Pri la « Programo de SAT » nenia progreso estas atingita. Oni voĉdonas kaj akceptas proponon, ke programo principe

(1) Substreko nia. – *Kompil.*

estas kreinda. Sed pri ĝia aspekto la opinioj grave diferencas, kaj okazas vortduelo inter Lanti kaj Drezen, en kiu Lanti konkludas per la konstato : « Pli bone estus eble ne havi programon ». En la protokol-broŝuro pri la 8-a Kongreso suplemente troviĝas la projekto pri Programo de la komisiono 1928 kun la rimarkoj, kiujn k-do Lanti estis komisiita de la Direkcio prezenti al la Kongreso, rimarkoj, kiuj akre kritikas kaj elmontras la multajn mankojn, precipe ideajn, de la komisiona projekto.

*Martelfrapoj.*

Apogante sin sur la aldono de l'nova teksto al la unua statutparagrafo, kaj sentante ke tiu batalo kontraŭ absolutismo kaj ortodokso estas la sola maniero por komprenigi al la SAT-anoj la rolon de ilia organizo kaj ŝirmi ĝin kontraŭ devojiĝoj, Lanti daŭrigas vigle verki kaj aperigi en *Sennaciulo* « Inter Ni »-ojn. Okazoj ne mankas. Li kritikas la aŭtoron de *La Fajro*, Henriko Barbus (Barbusse), ĉar ĉi tiu fama komunista verkisto nur buŝe laŭdis esperanton, sed neniel klopodis ellerni kaj uzadi ĝin. Li profetas la formortadon de l'naciaj lingvoj, sanktaj idoloj ! Pacience ree kaj ree li elmontras la diferencon inter la edukejo SAT kaj la politika agitado de l'partioj. La morto de alĝera SAT-ano, Neĝam Mohamet, igas Lantin verki du pensoriĉajn « Inter Ni »-ojn, en kiuj li pledas por plena spirita liberigo, ankaŭ kaj precipe el patriotaj sentoj. Neĝam partoprenis la Gotenburgan kongreson de SAT kaj post ĝi forĵetis la lastajn ligilojn katenantajn lin al la arabaj religio kaj moroj, sed li ne rezignis la naciliberigan batalon. La sennaciisto Lanti ĉi tie precizigas sian penson, tre kontraŭan al la oficialaj socialistaj kaj komunistaj programoj, nome ke la koloniaj laboristoj « ne per batalo por nacia liberiĝo plibonigos

sian sorton, sed per unuiĝo kun la sammetianoj el la tuta mondo por liberigi sin el sub la kapitalista ekspluatado ».

Lanti tradukas kaj aperigas ankaŭ ideojn de Alen (Alain), franca filozofo, sub titoloj « Pensi-kredi » kaj « Dubi » (ĉi lasta represita en la decembra numero 1950 de « Sennaciulo ». Ĉiuj ĉi kontribuoj plifortigas la malkontenton inter la bolŝevistaj SAT-anoj, kiuj vokas al amasa partopreno ĉe la 9-a Kongreso en Lejpcigo por venki super la « herezuloj » kaj doni alian direkton al la SAT-ŝipo.

Dume la movado kreskas, la gazeto prosperas irante al abonantnombro de 4 000. La Direkcio decidis aperigi ĝin dufoje monate sur dekdu paĝoj ; en la aliaj semajnoj eldoniĝas kiel ĝis nun 8-paĝaj numeroj. En tiaj kondiĉoj la gazeto estas unuaranga varbilo kaj … edukilo.

Ekde la 1-a de Aprilo 1929 « Sennaciulo » estas 12-paĝa ĉiusemajne…

*Deklaro pri supertendenceco.*

En Majo 1929 la Direkcio opinias necesa per longa « deklaro » memorigi al la SAT-anoj pri la supertendenca karaktero de la Asocio, konfirmita jam en la fonda kongreso kaj en ĉiuj sekvantaj. Al akuzoj pri reviziemo la Direkcio respondas, ke k-do Drezen fakte estas la ĉefrevizianto, ĉar en ĵus aperinta ruslingva propaganda broŝuro li donas al SAT la titolon « Internacia Laborista Unuiĝo de Unueca Fronto » (!). Kaj la Direkcio rimarkigas, ke «unuecan fronton » SAT povus fari nur kun UEA (neŭtralaj esperantistoj) aŭ TLES (tiama anarkist-esperantista ligo). La « deklaro » de l'Direkcio finiĝas per jenaj firmaj vortoj :

*« Se la reviziemuloj sukcesus per trompa tendenca informado pri SAT ĉe respondecaj instancoj okazigi skismon en*

*nia movado, ili portu antaŭ la Historio plenan respondecon pro tiu krimo kontraŭ la veraj interesoj de l'Proletaro ! ».*

La pozicioj estas klaraj ; oni sin preparas por Lejpcigo, kaj oni iros tien, unuj kun la intenco transformi SAT en parti-instrumenton, la aliaj por defendi la fundamentajn principojn, sur kiuj la Asocio estas starigita.

*9-a Kongreso de SAT en Lejpcigo (1929).*

Sin anoncis al la Kongreso 1 102 gekamaradoj el 29 landoj ; fakte ĉeestis 662 gek-doj el 22 landoj. Ĝi estas la ĝis tiam plej granda SAT-kongreso. El Sovetio du kamaradoj el 12, kiuj sin anoncis, ricevis la vizon por eniri Germanion : k-doj Drezen kaj Demidjuk. 41 proponoj aperis presite en *Sennaciulo* por esti traktataj en la tagordo, kaj pluraj formiĝis ankoraŭ dum la kongresdebatoj, kiuj estis akraj kaj ofte partipolitikecaj. Tuj post la raportoj prezentitaj de la Plenum-Komitato sekvis furiozaj atakoj kontraŭ la gvidantoj kaj precipe kontraŭ la persono de k-do Lanti, kiu forte defendis la pozicion de la estraro kaj sian propran aktivecon kaj estis subtenata de multaj malnovaj pioniroj.

Vidante ke li ne povos konkeri la fortikaĵon SAT, en tiu ĉi kongreso, E. Drezen serĉis la pacformulon. Lanti en post-kongresaj pripensoj (*Sennaciulo* n-ro 255) rimarkigas pri tio – iom ironie certe, sentante sin la venkinto, morale kaj en efektiveco – ke « se fulmo detruas, okazas ankaŭ iafoje, ke ĝi nur purigas la atmosferon. Tiel okazis en Lejpcigo, en la impone bela salonego de la Popoldomo ».

Kaj poste li demandas : « Se la atmosfero refariĝis pura en SAT, se ni evitis la skisman malsanon, kiu tiom malfortigas la laboristan movadon, ĉu eble ne estas pro tio, ke ni ĉiuj, pli malpli konscie, estas unue esperantistoj kaj nur due partianoj ?

Mi ne provos respondi al tiu demando ; sed en jesa okazo ni neniam konfesu tion en *nacia lingvo…* ».

Certe la estraro de SAT esperegis arde, en tiu perturbo de la spiritoj, ke la esperantisteco superos la partianecon. Almenaŭ la ĉiusemajne ricevata esperanta legaĵo povus kontribui favore en tiu direkto. Kaj la venko de tiu sinteno mensa certigus por ĉiam la funkciadon de SAT.

*La « krimoj » de la SAT-gvidantoj.*

El la debato pri « La Laborista Esperantismo », broŝuro de Lanti aperinta fine de 1928, montriĝis, ke la komunistoj tute aparte riproĉas al la aŭtoro la ĉapitron, en kiu estis dirite, ke en la sino de SAT povis naskiĝi nova tendenco, tiu de la sennaciismo. La nuran elmontron de tiu ismo (eĉ ne propagandon !) en tiu broŝuro E. Drezen titolis krimo. Laŭ tiu politikisto el Moskvo la SAT-gvidantoj faris tri krimojn : politikan (propagando de sennaciismo), taktikan (kulpigo al iuj sovetiaj esperantistoj, ke ili volas komunistigi SAT) kaj personan (la permeso al Lanti publikigi en *Sennaciulo* siajn « Inter Ni »-ojn kun herezaj ideoj) !

Multaj ekstaris por defendi la estraron ; inter ili estis la tiama prezidanto de la Sveda Laborista Esperanto-Asocio, k-do Ernesto Erikson el Stokholmo, kiu montris la senbazecon de la Drezenaj akuzoj : « … komence Drezen parolis pri « krimo », poste pri « kulpo », fine nur pri « eraroj ». Mi opinias, ke ne estas faritaj eraroj… Mi ĉiam trovis la artikolojn titolitajn « Inter Ni » tre leginda literaturo. Ni postulas, ke ni havu la rajton mem pensi. Kaj ĝuste tiuj artikoloj devigis min pensi memstare, ne pensi laŭ iu modelo aŭ formulo… ».

K-do Demidjuk el Moskvo antaŭsentas la dramon, la sekvontan evoluon ; li anticipas la disiĝon for de SAT de pres-

kaŭ du mil anoj en Sovetio. Li komprenis funde la celadon de SAT, ĝian agbazon, ĝiajn principojn, kaj ĝuste tial li timas la rompon. Ankoraŭ li mem konfesas sian simpation por sennaciismo ; « nia celo estas sennacieca socio », li vokas. Kaj li vidas atingota tiun staton pere de la akutiĝo de la klasaj fenomenoj.

Li timas la neeviteblon ankaŭ kiel *persono*. Ĉiam li rilatis amikece, tre kore kun la parizaj gvidantoj kaj kun ĉiuj aktivuloj en SAT ; li estis preta oferi por SAT, alporti sian valoran helpon kiel verkisto kaj redaktisto. Li estis el la frua kolektivo de « La Nova Epoko », kiu transdonis senhezite kaj kun ĝoja koro tiun propran infanon en la manojn de SAT.

La Historio pasis sian vojon, neperturbeble, nekompateme. Hodiaŭ ni demandas nin, kio fariĝis el Demidjuk ? En kiun abismon li formalaperis kun la sennombraj unuaj pioniroj de SAT en Sovetio ?…

En la *gvidrezolucio*, kiu trovis unuaniman akcepton, la program-komisiono, kiu laboris sensukcese dum tri jaroj, estas likvidita. La Direkcio ricevas « la fidon kaj mandaton por plua agado, post kiam ĝi agnoskis kiel « mispaŝon » la manieron, laŭ kiu estis farita la eldono de « La Laborista Esperantismo » de E. Lanti, « kiu povis kredigi, ke la verketo celis fariĝi la oficiala programo de nia Asocio ». La Kontrolkomitato ricevis pli gravan funkcion.

Ankoraŭ karakteriza debato en tiu kongreso : la propono pri venontjara kongresurbo. Multaj kamaradoj pledas por Moskvo, sed… Drezen mem, reprezentanto de la sovetia esperantistaro, diras, ke li ne povas inviti al Moskvo :

> *« Kaŭzo ne estas la sovetaj esperantistoj ; estas multaj malhelpoj kaj ĝenoj en niaj vivoj, ekzemple niaj social-*

*demokrataj kamaradoj eble ne ricevus permeson de siaj partiaj instancoj por ĉeesti kongreson en Moskvo ».*

Amuza la subita zorga atentemo pri la socialdemokrataj kamaradoj, kiuj eble povus konfliktiĝi kun sia parti-estraro, fare de tiu ĉi « unuecfrontano » ! Tiu sama Drezen, kiu ĉi tie elŝutis la plej drastajn akuzojn kontraŭ k-do Lanti, por konkeri la politikan venkon en SAT, – en Leningrado, tri jarojn antaŭe, ĉar tio ŝajnis al li oportuna en tiu tempopunkto proponis:

> *« faciligi la laboron al k-do Lanti kaj pligrandigi liajn rajtojn en la redaktado... Ni devas en la nomo de la kongreso esprimi plenan konfidon al nia meritoplena k-do. Li rajtu rifuzi presigon de artikoloj tro « komunistaj » aŭ tro « anarkistaj », kiuj povas malhelpi al la unueca fronto proletaria de SAT ».*

Jen la tipo de zigzagema oportunisto !

*La 10-a Kongreso okazos en Londono !*

La decidon akcepti la inviton de la Londonaj SAT-anoj por 1930 komunikas la Direkcio en la n-ro 262 (10-a Oktobro 1929). Pro la restarigitaj komercaj rilatoj inter Sovetio kaj Britio oni povas esperi, ke sovetianoj ricevos la permeson partopreni tiun kongreson.

Intertempe plidensiĝas la nuboj ĉe la horizonto. La administranto en Lejpcigo ne plu ricevas monon el Sovetio por la liveritaj varoj (gazetoj, libroj). K-do Demidjuk faras kuraĝan provon de elsaviĝo : li vokas en *Sennaciulo* (n-ro 284, de 13-a Marto 1930) pri donaco al Sovetio de esperantista traktoro partoprenonta en la maŝinigo kaj socialistigo de l'sovetia agrikulturo.(1) Novjorkaj SAT-anoj kolektis dum unu semajno

(1) Estas la jaro, en kiu Komintern faras intensan kampanjon por tiaj donacoj el tutmondo.

57 dolarojn kaj pagis la sumon al la administranto en Lejpcigo por la konto de l'Centra Komitato de SEU. Dank' al pagoj por tiu kolekto la kaso de SAT akiris iom el la ŝuldata mono retenita en Sovetio…

El noto en *Sennaciulo* videbliĝas la iom-post-ioma kresko de la Laborista Esperanto-Movado en Nederlando. Sur la tagordo de la kongreso de l'socialdemokrata partio nederlanda (Aprilo 1930) troviĝas proponoj favore al propagando kaj instruado de esperanto.

Dume en Sovetio homoj kiel Demidjuk kaj Nekrasov, esperas favoran solvon por nia afero ; al kritiko farita pri la sinteno de Krupskaja, la kunulino de Lenin, rilate al esperanto, Demidjuk respondas per longa argumenta artikolo, kiu volas montri, ke Krupskaja evoluis favore al agnosko de la esperanto-movado. Oni vidas, ke li kaj liaspeculoj klopodas ĉiamaniere por savi la esperantismon en Sovetio, sekve … la kontakton kun la Okcidenta mondo kaj kun SAT.

La 24-an de Aprilo 1929 (n-ro 290) *Sennaciulo* frontpaĝe anoncas, ke la 4000-a abonanto estas registrita, kaj samtempe ĝi vokas al plua varbado … la gazeto daŭre aperas dekdu-paĝe ĉiusemajne… Kelkaj SAT-artistoj aŭdas la alvokon pri kreo de afiŝego multkolora, simbole reprezentanta la SAT-idealon. La premiita projekto estis tre longe konservata ĉe la Oficejo de SAT, dum mankis la rimedoj por ĝin eldoni.

Lanti konscie fosas la SAT-sulkon ; en Majo 1929 aperas « NACIISMO, Studo pri deveno, evoluado kaj sekvoj » de tiu fenomeno karakterizanta nian epokon.

Tre simptoma por la evoluo de l'laborista esperantismo en tiu tempo estas la LEA-jarkongreso, en Aprilo 1930, en Eseno, Germanio. Ĝi finiĝas per venko de la bolŝevista alo. Dum la jaro 1929 jam 18 grupoj eksiĝis el la Asocio, pro nekonsento

kun la politika linio de la asoci-estraro. Nun la komunista venko firmiĝas : la estraro troviĝos en Berlino, kun prezidanteco de l'elokventa kaj inteligenta tajloro V. Vildebrand. K-do Deubler, Munkeno, rezignas la redaktorecon de « Arbeiter-Esperantist ». Lin anstataŭas Besler (Bässler), Lejpcigo, konata bolŝevisto.

En tiu periodo aperas en Moskvo pamfleto « sennaciismo kaj internaciismo », pri kiu Lanti diras:

> *« La aŭtoroj mem preferas pri ĝi silenton ; verŝajne ili konscietas, ke estas facile montri, ke ilia tezo estas nek historie, nek logike fundamentita ».* (S-ulo, n-ro 294).

Pri la ĝeneralaj progresoj de esperanto en tiu tempo ni trovas en n-ro 295 jenan konstaton:

> *« La SAT-aparato lamas, same kiel ĉiu alia esperanta organizo. Ni ofte fanfaronas, ke per esperanto ni povas interligi diverslingvajn prolet-organizojn, sed bedaŭrinde en multaj landoj tute forestas SAT-anoj, kaj en multaj aliaj ankoraŭ estas dubinde, ke ili plenumus kontentige koncernajn taskojn, se efektive stariĝus serioze interŝanĝo inter diversnaciaj proletaj organizoj ».*

*Sennacieca Pedagogia Revuo* ekaperas en 1930, dumonate, en Moskvo, redaktata en Parizo, administrata en Lejpcigo. Ĝia intenco estas servi al la nova pedagogio, al la SAT-edukistoj. Ankoraŭ nova organo eldonata de SAT ! Kaj ankoraŭfoje, por la lasta fojo en la SAT-historio, la simbole sennacieca subskribo aperas : PARIZO-LEJPCIGO-MOSKVO, kiel ponto interliganta sur nia kultura tereno la okcidenton kaj la orienton.

La 10-an de Julio 1930, ĵus antaŭ la Kongreso, aperas la Direkcia alarm-artikolo : « Rifo sur la Vojo », kiu klarigas la preskaŭan financan bankroton de la Asocio, pro la reteno de granda monsumo – proksimume cent mil tiamaj francaj frankoj – en Moskvo, sumo ŝuldata al SAT por kotizoj, abonoj kaj libroj liveritaj. La numero (301), en kiu aperas tiu informo, estas nur kvarpaĝa post la 16-paĝa jubilea numero tricenta, kaj la sekvantaj numeroj estas nur 8-paĝaj. La Esperanto-Servo, paĝo redaktita de k-do Besler (komunisto), estas tute forigata pro spacomanko. K-do Besler protestas kaj ne konsentas aperigi propran noton pri tiu likvido.

Dume senlacaj obstinuloj, saturitaj de la sovetia mistiko, faras proponon al la l0-a Kongreso, por ke la 11-a okazu, en la jaro 1931, en Moskvo (propono de Berlinaj SAT-anoj).

Monkolekto estas malfermata sub la devizo « *Por eviti la Rifon* », kiu kontribuos eviti la financan bankroton. La gazeto aperas ĉe alia presisto, en Germanio, nome ĉe k-do Wettig, kiu ankaŭ estas aktiva membro de SAT. Tie aperados la gazeto senpaŭze ĝis la ekrego de Hitler.

*Fulmotondroj ankaŭ en Londono (10-a SAT-Kongreso, 1930).*

La kongreson aliĝis 543 k-doj el 25 landoj (inter ili el Britio 142, el Germanio 117). 45 aliĝis el Sovetio, sed *neniu* trafis Londonon.

Fakte partoprenis 340 k-doj el 16 landoj. Oni manifestaciis tra la londonaj stratoj kun publika kunvenego subĉiela en Hajd-Parko.

La laborkunsidoj estis ŝtormaj. Dum la debatoj kelkfoje aŭdiĝis la vorto « skismo » kiel grava danĝero pendanta en la aero. Unuafoje ne estis trovata kompromiso, kiu akordigus ĉiujn en fina rezolucio. La opoziciuloj luktis per ĉiuspecaj

pretekstoj por malpravigi la gvidadon. Ili luktis ankaŭ per sistema preparado de l'atakoj. Alvenis raportoj laŭ neregula vojo, legotaj ĉe la kongreso. Alvenis eĉ telegramo el Moskvo ĝuste en decida momento kun celo impresi la kongresantojn. En tiu telegramo la CK de SEU [(1)] deklaris, ke ĝi ne juĝis utila sian ĉeeston en Londono, proteste kontraŭ la agoj de la nuna direkcio, kiu « kondukas SAT al rapida skismo » :

> *« Ni esperas, ke la ĉikanantoj kaj subfosantoj estos malhelpataj pluen ĉikani kaj subfosi. Se por la estonta kongreso estos elektita Moskvo, ni faros ĉion por ke ĝi sukcesu ! ».*

Sed en tia kongres-atmosfero ne povis regi la vera SAT-spirito. Tuj kiam leviĝis iu parolonto, oni post la unuaj vortoj sciis, kiun tezon, sekve kiun flankon li defendas. La anaro estis nete dispartigita en du kampoj malamikaj. Denove riproĉoj pri « La Laborista Esperantismo » de Lanti, kies anglalingva eldono ĵus aperis. La opoziciuloj esperis, ke la verketo tute formalaperos el la merkato, por ke la Lanti-aj ideoj pri sennaciismo ne trovu pliajn simpatiantojn…

K-do Lora (Laurat), Parizo, – antaŭe lia pseŭdonimo estis *Revo* – kiu post sia plurjara restado en Moskvo revenis el tie kiel « renegato de l'bolŝevismo », havis speciale malbonan akcepton. K-do Demidjuk letere sendis klarigon, kial oni en Moskvo ekpresigis « Komunistan Bibliotekon » (broŝuretoj agitecaj pli ol informaj), unua ekstera signo pri retiriĝo disde SAT :

*« Mi iniciatis tiun eldonon… ĉar mi konsideris neebla trudi al SAT eldonon de deko da partikomunistaj libroj, dum SAT*

(1) Centra Komitato de Sovetlanda Esperanto-Unio.

*estis akuzata pri troa komunisteco ; aliflanke, sen eldono de tiuj verkoj oni ne povas antaŭenpuŝi la movadon en komunistaj rondoj ».*

Lerte-ruza argumento, kaj nenia vorto de bedaŭro pri la ekfarita rompo al la Gotenburga Konvencio, kiun SEU estis subskribinta.

La *Kontrol-Komitato* (nuna Konflikt-Komisiono) transiris el la rondo de Berlino al tiu de Bruselo (sekretario : Berĵje-Bergiers). Nova regularo por tiu instanco estas akceptita per plimulto da voĉoj.

*Ŝanĝita politika bildo.*

La filmo turniĝas ; ŝanĝiĝas la bildoj sur la ekrano. Kaj ankaŭ la paroloj sonas novaj. Unuafoje en tiu ĉi deka kongreso de SAT aŭdiĝas malfavoraj kritikoj pri la reĝimo en Sovetio. Ĝis tiam tiu lasta staris en la kongresoj ekster ĉia kritiko. Nun venis kamaradoj al la tribuno, kiuj montris la malbonajn flankojn, certe kunlige kun tio, kio prepariĝis kontraŭ la Sovetia SAT-anaro… kies voĉo ne plu estos aŭdebla en nia demokrata organizo. Ankaŭ la ekscitiĝo pri la reteno de granda monsumo en Moskvo (cent mil tiamaj francaj frankoj) agitis la anaron. La ortodoksaj komunistoj rebatis firme kaj neŝanceleble tiujn indigne faritajn kritikojn. K-do Bubu (Boubou) admonis : « Laŭdojn oni povas permesi. Mallaŭdojn oni ne toleru ». Li protestas kontraŭ komparo de soveta kaj faŝisma reĝimo. Io estas ŝanĝita sur la tutmonda tereno ; kaj tiu pozici-ŝanĝo de Sovetio reflektiĝas en la SAT-vivo.

Longa debato okazas pri la invito de Berlinaj SAT-anoj por la kongreso, en 1931, en… Moskvo. La invitantoj apogas sin sur la ĵus ricevita telegramo moskva, kiu entenas kondiĉan

inviton : « forpelu la Direkcion de SAT kaj tiam venu kongresi en Moskvo ! ». Lanti klare diras, ke en tiaj kondiĉoj (minac-invito) ni ne povas akcepti :

> *« Se post la kongreso de SEU ni ricevis decan inviton, ne minacan, kiel tiun, kaj se oni donus al ni la necesajn garantiojn, ke ĉio okazos normale, do tiam ni povis konsenti pri kongreso en Moskvo ; dume ni prokrastu ! ».*

Malgraŭ tio la kongreso esprimis, per voĉdono de plimulto, la principan deziron, ke la 11-a okazu en Moskvo. Tiel forte logis la plimulton de la kongresanoj la ideo povi partopreni mondkongreson en la Kremla urbo – travivi mirindan aventuron, kaj eble ĉe multaj ankaŭ subkonscie regis la penso, ke tiel ili povos kontribui al savo kaj eĉ potencigo de l'Laborista esperantismo en Sovetio.

*La Centra Komitato de Sovetlanda Esp. Unio decidas…*

Unu monaton post la Kongreso la Direkcio estas informita pri skismigaj decidoj de la CK de SEU en Moskvo. Nun el la timsentoj, kiujn elvokis la legado en Londono de la fama moskva telegramo, fariĝas preciza konscio pri la neeviteblo. En la n-ro 310 (de 11-a sept. 1930) la Direkcio publikigas, kun longaj komentoj, la eltiraĵojn el protokolo N-ro 20 de CK de SEU (kunsido de la 7-a de Aŭgusto 1930). Tiu Komitato, ricevinte telegramon el Londono pri la triumfo de Lanti ĉe la SAT-kongreso, decidis : a) plej decide kontraŭbatali la sennaciisman ideologion… c) proponi al la Germana LEA (nun en manoj de komunist-partianoj) kaj ceteraj eksterlandaj LEA-oj organizadon de Akcia Societo por eldoni revoluciajn gazetojn kaj librojn … f) *jam nun*, ne atendante la konformiĝon de la eldonejo, opinii bezona la organizadon ĉe Germ. LEA de speciala aparato, sufiĉe reklamata, por disvastigi en la ekster-

landoj la eldonojn kaj gazetojn de SEU. … g) tutforte peni, ke en la 1931-a jaro okazu en Moskvo Internacia Kongreso de revoluciaj esperantistoj por formi la *novan revolucian organizon* (1).

SEU deklaras sin liberigita de la punkto pri eldono de esperanta literaturo en la Gotenburga Konvencio, kiun ĝi subskribis en 1928.

En Moskvo aperu nova gazeto anstataŭ Sennaciulo, kies redaktoro estu k-do Batta.

Rezulte de referenduma decido, ĉiuj aktivaj membroj de SAT de nun devas esti abonantoj al *Sennaciulo*, escepte de samfamilianoj. Membroj, kiuj aliĝas aŭ rekotizas sen abono, estas konsiderataj nur kiel pasivaj membroj. Mizerstataj kamaradoj povas esti esceptataj de tiu regulo, laŭ la propono de peranto aŭ grupo.

En ĉiu numero de Sennaciulo estas publikigataj monkolektoj « por eviti la rifon », t. e. por ŝirmi la asocion kontraŭ minacanta bankroto pro la subita blokiĝo de granda sumo en Sovetio kaj perdo de mil abonantoj. Ankaŭ aperas ĉiunumere alvokoj por donaci jarabonon al iu sovetia k-do.

Komence de julio 1930 grava manko en la Esperantista Movado estas forigita, dank' al la iniciato de SAT : aperis la longe atendita « Plena Vortaro de Esperanto » (2) en la eldono de nia organizo ; ĝi estas antaŭmendita, antaŭpagita de multaj. Nur kiu konstante manipulas tiun volumon, povas taksi, kiom da diligenta laboro tiu kreaĵo postulis el siaj aŭtoroj kaj ne laste el k-do Lanti, kiu konstante alportis siajn konojn kaj konsilojn, sian nelaciĝantan laboremon.

Kia grava monfonto por SAT en tiu tempo de krizo !

---

(1) Tiu kongreso neniam okazis.

(2) La Historion de ĝia naskiĝo legu sur paĝoj 45-46.

*Voje al skismo…*

Al la Komitata decido de SEU, kies kunven-protokolo trafis, laŭ nerekta vojo, tiel akurate en la manojn de la Direkcio de SAT, sekvis baldaŭ la efektivigoj : en Oktobro 1930 eliras en Moskvo la unua n-ro de skismiga gazeto « Internaciisto », kiu sin titolas, kun senhonta aplombo, … la sola klasbatala… proletesperanto-gazeto. Ĝi estas plena de insultoj kaj kalumnioj kontraŭ la gvidantaro de SAT.

Sed por SAT ekstaras novaj amikoj ! En « Laborista Esperantisto », oficiala organo de la Nederlanda LEA, nelonge post naskiĝo de la nomita opozicia kalumni-gazeto, aperas firma deklaro favore al SAT kaj al strikta obeado al la Konvencio de Gotenburgo :

> *« ... En la kadro de ĉi tiu konvencio estas eble plene kunlabori por celoj laboristaj. La ideo de superpartieco, tie sennaciismo, la plenumota kulturtasko allogis kaj allogus LEA-ojn kaj k-dojn de ĉiuj tendencoj, kiuj antaŭe suspekte rigardis ĝin… Netolerebla estas la eldono de organo konkuranta al* Sennaciulo *kaj la mortigo de SAT per planita starigo de unutendenca internacia organizo… Kontraŭ tiuj, kiuj diras voli la unuecon, sed komencas la skismon, ni alvokas la esperantistan laboristaron plifortigi SAT-on per aktiva membreco, por ke ĝi des pli bone venku la krizon… ».*

En Lejpcigo tiutempe stariĝis, gvidata de k-do Kampfrad, Eldonkooperativo por Revolucia Esperanto-Literaturo, mallonge : EKRELO. Unu el la postuloj de la Centra Komitato de SEU estas tiel plenumata.

Dume kuŝas en Moskvo ses tutpretaj manuskriptoj de libroj, kiuj povus aperi sub la nomo de SAT, kiu lasta komisiis ilian presadon ; la preskostoj malpliigus grave la ŝuldatan monsu-

mon retenitan en Moskvo. Unu manuskripto (pri Kosmopolita Ideo) estas tie jam de 20 monatoj.

Ukraina SAT-ano skribas al SAT, ke kiam li postulis de SEU la redonon de la sumo, kiun li destinis al SAT, oni prokrastis la resendon rekomendante aboni al « Internaciisto ».

Ĉi tiuj informoj en *Sennaciulo*, kun konformaj komentoj, kontribuas krei malbone spireblan atmosferon, plenan de angoro kaj veneno.

Sed la SAT-gazeto aperas regule ĉiusemajne, malgraŭ la grava amputo !

*La Direkcio akceptas la inviton de Amsterdamo por 1931.*

En la n-ro 324 (18-a dec. 1930) la Direkcio konstatas, ke post 4 monatoj ankoraŭ ne venis kongres-invito el Moskvo, dum skismigaj decidoj tie estis faritaj kaj parte jam efektivigitaj. La Amsterdama SAT-anaro intertempe invitis kaj ankaŭ la Pariza. La Direkcio akceptis la Amsterdaman inviton.

En la sama numero la Kontrol-Komitato Brusela proponas (per 2 voĉoj kontraŭ 1) al la Plenumkomitato de SAT, ke ĝi eksigu la anojn Drezen, Besler kaj Riĥter ; ĉi du lastaj, el Lejpcigo, partoprenis en la moskva kunsido, en kiu la skismigaj decidoj estis faritaj.

Dume la opozicio preparas « voĉdonilon » dissendotan al ĉiuj SAT-anoj, por ke ili esprimu sian voĉon kontraŭ la nuna Direkcio de SAT kaj por kongreso en Moskvo ! La nunaj SAT-gvidantoj estu eksigataj el SAT ! La Direkcio siavice aranĝas ĝeneralan voĉdonon pri du kongresproponoj kaj … pri fido aŭ malfido al la nuna estraro.

En la n-ro 334 la Direkcio anoncas *Varb-konkurson* kun premioj por plej bonaj abonvarbantoj ; tiun konkurson ne iniciatis la Direkcio, sed anonima SAT-ano, kiu deponis kun la

projekto pri varbado samtempe la necesan monsumon por garantii la elpagon de la premioj sen ia elspezo por SAT, escepte de libroj.

Por memorigi al la SAT-anaro la fazojn de la skismo ĝis la tiama stato, aperas kronologia citado pri ĉiuj elpaŝoj, fruntpaĝe, en la n-ro 337 (19-a Marto 1931). La artikolo finiĝas per vortoj trankviligaj, firmigaj pri la refortiĝo de SAT post trapaso de tiu ĉi krizo. – Aliflanke en la konkludo troviĝas la decido, ke estu eksigataj el SAT ĉiuj respondecaj gvidantoj de la opozicio, krome ĉiuj aliaj subskribintoj de « Deklaro de la opozicio », kiuj en tempodaŭro de 2 monatoj ne estos deklarintaj sian malaprobon al la lastaj elpaŝoj de la opozicia gvidantaro, kaj tiuj, kiuj post apero de tiu ĉi komuniko solidariĝos kun la opozicio. – Subskribis tiun ĉi gravan dokumenton la tuta Plenum-Komitato kaj la Kontrol-Komitato.

En la n-ro 340 estas reproduktita faksimilo de la banderolo, sub kiu estis senditaj pluraj ekzempleroj de *Sennaciulo* al k-do E. Izgur en Kremenĉug (Ukrainio), – registrite. Ĝi revenis al la sendinto en Lejpcigo. La aŭtoro de « Nur Volu ! » kaj « Je la Nomo de l’Vivo » ne plu rajtis legi la SAT-gazetojn, laŭ la volo de la cenzuro !

Al la kamaradoj, kiuj skribis por demandi kiel ili rilatu al la ŝajn-referendumo aranĝita de la opozicio, la Direkcio nete respondis, ke tia kontraŭstatuta aranĝo havas absolute nenian valoron en la okuloj de ĉiu serioza kaj honesta homo.

En la n-ro 342 aperas la nomoj de naŭ eksigitaj opoziciaj gvidantoj : Drezen, Besler, Riĥter Fr., Kampfrad, Bata, Volf, Riĥter Gg., Muravkin kaj Vildebrand.

*En Nederlando ekkreskas la movado !*

La 12-an de Aprilo 1931 okazis jarkunveno de Nederlanda LEA en Roterdamo, kun preskaŭ 300 partoprenantoj (kontraŭ

125 en la pasinta jaro). La prezidanto de la asocio, k-do Faulhaber, instigis tie al SAT-aniĝo. Oni povas antaŭvidi gravan SAT- kongreson en Amsterdamo.

Aperis interesa originala eldonaĵo de SAT :

Kiu volas instruiĝi pri la ideoj de SAT, trovas de nun valoran kompilaĵon el plej interesaj artikoloj de k-do Lanti en libro titolita « Vortoj de Kamarado Lanti ». La perfekte klara kaj konciza stilo estas frapa kaj konvinka. Oni trovas en tiu libro la plej karakterizajn « Inter Ni »-ojn. Estas tuta arsenalo da argumentoj kaj dokumentoj favore al la starigo de SAT kaj ĝia ekzistorajto. En tiu momento *(Majo 1931)* ĝi estas armilo en la manoj de la sinceraj SAT-anoj.

Kaj ankaŭ iuj socialdemokratoj, kvankam lojalaj ĝis nun al SAT, opinias, ke por ili ne povas esti interese resti en tia supertendenca organizo, se la komunistoj foriĝis kaj fondis apartan organizon. Almenaŭ tian opinion eldiris la kunveno de la Aŭstria LEA (ALLE) en Aprilo 1931. Ĝi montras absolutan miskomprenon pri la rolo de SAT, aŭ, pli vere, ĝi spegulas la intiman deziron de tiuj kamaradoj, ke funkciu organizo internacia bazita sur naciaj sekcioj, laŭ la modelo de la ekzistantaj laboristaj internacioj, kiuj ne posedas komunan lingvon kaj sekve ne povas apliki sennaciecan organizmanieron.

Oni vidas, ke en tiu momento la tuta konstruaĵo de SAT estis minacita de disfalo kaj pereo. Kvankam tra la periodo de dek jaroj grava eduka laboro estis farita, ĝi ne estis jam sufiĉa por garantii la pluvivon de la organizo, se internaciistoj ĉiukoloraj eksiĝus. Forta estos la skuiĝo, forta la elprovado.

Dume en *Sennaciulo* aperas de tempo al tempo *Voĉoj el Sovetio*… La tieaj membroj skribas ; ilia koro ribelas kontraŭ la verdikto de forbariĝo. Ili volas resti en SAT, volas plue legadi la gazetojn de SAT. Sed ili ne povas page kontribui… Nenia

monsumo plu transvenas, post la lasta negrava partpago, antaŭ longaj monatoj, al la (komunista) presejo Peuvag, por la konto de SAT : ja ĉe la Peuvag-filio en Lejpcigo *Sennaciulo* estas presata ĝis la skismo.

Komence de Junio L. Berĵje (Bergiers), kiu sekretariis por la Kontrol-Komitato, eksiĝas el tiu instanco, ĉar li deziris entrepreni intertraktojn kun la opozicio, kion liaj du kolegoj malaprobis, kaj ĉar li ne konsentis kun pluaj eksigoj de opoziciuloj, sekve de ilia necedema sinteno. Tio estis teatreca festo instigita de la opoziciuloj, kiuj lerte eluzis la ambicieman karakteron de Berĵje.

Sed ĉi tiu facil-animulo faris ankaŭ rimarkon, ke « la persono de k-do Lanti estas malsimpatia al multaj anoj, kaj ekzistas nur du eliroj : aŭ eksiĝi aŭ pruvi per klara referendumo, ke la granda plimulto estas favora ».

Al la Direkcio Lanti konfesas, ke jam delonge li deziris liberiĝi el la gvidposteno por dediĉi sin al studado kaj verkado, kaj ke li nun volas bonuzi tiun okazon por efektivigi sian intencon. Sed la Direkcio, kaj ankaŭ la ceteraj plenumkomitatanoj insiste petas Lanti-n resti ĉe sia posteno : « eksiĝo aspektus kiel malkuraĝo antaŭ ŝakalaj atakoj ».

### *La batalkongreso de Amsterdamo (11-a SAT-Kongreso, 1931).*

En sia bulteno la opoziciuloj, kun aprobo de la CK de SEU, alvokas sian sekvantaron partopreni la SAT-kongreson, por « sekurigi la klasbatalan unuecon kaj restarigi demokratecon en SAT ». La agitvorto restas la sama : « Ni ne devas eviti la batalon kontraŭ la uzurpuloj, sed senmaskigi ilin antaŭ la membraro kaj forpeli ilin el iliaj gvidpostenoj ». Oni proponas al la kongreso « senprokrastan eksigon de la plenumkomitato, kontrolkomitato, direkcio kaj redakcio de « S-ulo ». Senprokrastan

senvalidigon de ĉiuj faritaj eksigoj. Restarigon de la klasbatala bazo. Rerajtigon de ĉiuj ne-abonantaj membroj », ktp.

*Sennaciulo* atentigas siajn legantojn pri jena paradoksa bildo : « Dum *Internaciisto* (la opozicia organo) povas libere eniri kapitalistajn landojn, *Sennaciulo* estas malpermesita en Sovetio ! ! … Kiu(j) kaŭzis tian monstran situacion, tiu(j) estas plej danĝeraj malamikoj de Sovetio ». Ĉu ĉiuj tiutempe ekkomprenas la tutan tragikon entenitan en tiuj frazoj ? Ni dubas. Eĉ nuntempe ankoraŭ ekzistas laboristaj esperantistoj, kiuj kontraŭ ĉiu racia konstato provas pravigi la absolutismon kaj ne toleras, ke oni komparu la gradojn de libereco ĉe la du flankoj de la Fera Kurteno.

Kaj nun alvenis Amsterdamon 404 gekamaradoj el 14 landoj (el 504 aliĝintoj el 18 landoj). Inter ili estas 3 neeŭropanoj. El Nederlando mem partoprenas 252 gek-doj, do la plimulto, nur duavice venas Britio kun 56, kaj poste Germanio kun 37 partoprenantoj. La Kongreso decidas per granda plimulto remeti ĝis la *lasta* kunsido la pledojn de eksigitaj opoziciuloj, kiuj ĉeestas sur la tribuno. Tiuj eksigitoj ĝenas daŭre la kongreslaborojn per bruaj intervokoj. En la diskutado pri la raportoj parolantoj de l'opozicio plene *aprobas* la retenon de l' monsumoj, la kredito de SAT en Moskvo. Ili *aprobas,* ke la ideoj de SAT propagandataj en *Sennaciulo* ne plu penetru Sovetion. Ŝajnas, ke vere ili timas, ke S-ulo povus efiki sur la cerbojn de sovetianoj en senco malfavora al la tiea reĝimo ! Ĉu tiu « proletŝtato » estas do tiel malforte bazita, ke informoj en SAT-gazeto povus endanĝerigi ĝian ekziston ?… Ni ofte demandis nin pri tio, kaj ankoraŭ demandas…

Ĵus antaŭ la fino de la kvara laborkunsido, kiam k-do Lanti ricevas la rajton por paroli konklude pri la debato rilate la raportojn, k-do *Kibl* (Keable) el Londono, opozicia gvidanto,

provas eldevigi decidon pri la eksigitoj. La Kongreso konsentas duan fojon voĉdoni pri tiu afero kaj konfirmas la antaŭan decidon prokrasti la demandon ĝis la fino de l'kongreso, kontraŭ 217 voĉoj.

Tiam Kibl saltas sur seĝon kaj laŭtlegas Deklaron de la Opozicio ; liaj paroloj perdiĝas en la reganta bruego. Post la laŭtlego la opoziciuloj ekkantas la Internacion kaj forlasas la salonon. La restantoj siavice kunkantas la saman himnon. « Post tio regas granda trankvilo, kaj spiro de malpremiĝo liberiĝas el la brustoj », skribas la protokolinto.

Kaj *Lanti* faras sian finparolon, tre emociite de la okazintaĵoj. Li rezignas rebati la unuopajn akuzojn de la kontraŭuloj ; li nur elmontras klare la makiavelan taktikon, kiun aplikis monaton post monato, pacience detruante, la Centra Komitato de SEU en sia batalo kontraŭ SAT. La forŝtelo de l'mono estas nur ero en tiu taktiko. Ĝi devis trovi pravigon, kaj en « Arbeiter-Esperantist », organo de germ. LEA de Aŭgusto, diras Lanti, oni povis legi « la verdikton de la SAT-anaro » :

> *« Rezulto de ĝenerala voĉdonado en SAT, iniciatita kaj organizita de la SAT-opozicio (Berlina Rondo) pri malfido al la Plenum-Komitato kaj Direkcio de SAT kaj tuja eksigo el iliaj funkcioj ».*

Ĝi estis akceptita preskaŭ unuanime (1 218 el 1 256 voĉoj) rimarkigas Lanti kun sarkasma tono. Kaj al tiu nombro aldoniĝas 1 486 sovetiaj SAT-anoj, kiuj subskribis apartajn rezoluciojn (pli da voĉoj ol anoj !). — Tiajn komunikojn faras la « organiza oficejo de la klasbatala SAT-Plimulto. La redakcia kolegio de Internaciisto, EKRELO. Proleta Esperanto-Korespondservo (PEK) kaj la SAT-rondo Berlin ».

Kaj Lanti diras, ke en normalaj kondiĉoj ni havus grandan plimulton en Sovetio mem. La CK de SEU scias tion kaj pro

tio ĝi denunce atingis, ke « S-ulo » kaj la SAT-eldonaĵoj ne plu povas eniri Sovetion.

> *« Se fakte ni estus malamikoj de Sovetio, vi devus forpeli nin, – emfazas Lanti ; sed mi deziregas, ke vi foriru el ĉi tie kun la konvinko, ke male ni estas la plej bonaj defendantoj de Sovetio ».*

La Raportoj de la Plenum-Komitato estas aprobitaj per granda plimulto.

La Gvidrezolucio de la Kongreso esprimas speciale la bedaŭron pri la fakto, ke la skismo ekzistanta en nia movado jam de unu jaro, disigas nin de niaj amikoj en Sovetio ; gardas la esperon, ke tiu stato ne daŭros dum tre longa tempo kaj ke baldaŭ reebliĝos al la sovetiaj gekamaradoj aliĝi al SAT…

> *« La kongresanaro malgraŭ tiuj konstatoj deklaras resti preta kiel antaŭe batali por malebligi, ke kapitalistaj landoj ataku Sovetion kaj malebligu, ke la nuna grandioza kaj ĉiel subteninda provo pri konstruado de socialismo sur unu sesono de l'mondo estu sukcesa ».*

Amare finiĝas tiu ĉi periodo de la historio de SAT. Tamen ĝi alportis esencajn konstru-elementojn al la finstarigo de la organizo. Forta kerno de la SAT-anaro akiris sennaciecan konscion kaj sekvis firman direkton. Ĉiujare aperis ne nur la organoj de SAT, sed ankaŭ libroj atestantaj pri la kultura valoro de l'asocio. La « disputoj kaj kvereloj, kiuj ja tre ĝenis la disvolviĝon, tamen ne povis malhelpi la kreskadon de l'pozitivaj faktoroj, kiuj fortigis la SAT-aparaton. La pasieco de l'kongresdebatoj estis al multaj nekredemuloj okulfrapa pruvo pri la vivanteco de esperanto.

# DUA PERIODO : 1932-1939

Numero 358 de *Sennaciulo* (13.8.1931) estis la lasta presita en la lejpciga komunista presejo. De tiam la gazeto estas presata ĉe la firmo Wettig en Gelnhausen. Jam en n-ro 360 (27.8.1931) la Plenum-Komitato deklaris sian deziron submeti, malgraŭ la aproba voĉdono en Amsterdamo, la demandon pri fido aŭ malfido al la estraro al ĝenerala voĉdono, por povi rekomenci pozitivan laboron aŭ transdoni la gvidadon en aliajn manojn.

La 1-an de Oktobro 1931 aperas la unua limiga decido de l'Direkcio rilate monpagojn : la SAT-akcioj (de la Eldon-kooperativo) ne plu estas kontante repagataj, sed ili validas ankoraŭ por pagi SAT-membrecon, abonon al « S-ulo » kaj librojn eldonitajn de SAT. La unua listo de donacintoj « por ŝtopi la breĉon faritan pro la rabo de la CK de SEU » aperas en la sekvanta numero. La 22.10. la Plenum-Komitato, bazante sin sur la fid-esprimo ricevita per la ĵusa referendumo, konigas neeviteblajn kaj necesajn decidojn por savi SAT-on el bankroto kaj resanigi la financan staton. *Sennaciulo* aperos plu nur *du*semajne, tamen la ampleksa « Protokolaro pri la 11-a Kongreso », dume presata, estas liverata kontraŭ nura pago de l'sendkostoj. La « Nova Epoko » provizore ĉesas aperi, sed prospekto estas enmetita en la sama numero de « S-ulo », sub titolo « Por ke la Nova Epoko pluvivu ! », kun alvoko por kolekti ĝis fino de 1932 la nombron de almenaŭ mil abonantoj.

Tiumomente la presejo (komunista) en Lejpcigo minacis procesi kontraŭ SAT ĉe la (burĝa) tribunalo por elakiri tuj, per unu pago, la tutan restŝuldon por la gazetpresado : ni presigis dum multaj jaroj ĉe tiu entrepreno. Temis pri 3 643.59 mk. Germ. (867.50 dolaroj). Ĉu la skismuloj per tia rimedo esperis

atingi la celon, kiun ili ne atingis en la kongresoj – la frakason de SAT ?… Nu, du semajnojn poste la Direkcio povis komuniki pri la evito de tiu danĝera rifo sur la vojo. Ĉiuj informitoj streĉis siajn fortojn kaj pruntis monon. Multaj SAT-anoj, kaj tute aparte kelkaj k-doj en Francio kaj Svedio kontribuis malavare. Tiel la necesa sumo estis kolektita, antaŭ ol la firmo povis efektivigi sian neproletecan minacpostulon.

En la Brusela Kontrol-Komitato k-do Basteels anstataŭas k-don Berĵje.

*
* *

La okazo de la jarfina referendumo pri fido al la gvidantaro de SAT estis uzata de multaj kamaradoj por sendi kun sia voĉdonilo leterojn. Al tiuj k-do Lanti respondas publike, ja en « S-ulo », ekde la jarfino 1931. La unua letero estas kvazaŭ deklaro persona pri lia rolo en SAT.

> *« Neniam mi konsideris gvidpostenon kiel honorigan. Mi cetere ne havas talenton por okupi honoran lokon. Ĉeesti kongresojn, kunsidojn, ktp. estas por mi kvazaŭ turmento. Mi ĉiam sopiras al izoleco kaj nekonateco. Sed nenial mi konsentus : ne plenumi – eĉ se ne bone – taskon, kiu sin trudas al mi por la bono de komuna afero… ».*

En la dua li demandas la kamaradojn, ĉu oni havas en SAT la rajton erari.

> *« Kaj se ne », li daŭrigas, « tio signifas, ke en nia Asocio oni ne plu devas akcepti ĉiujn tendencojn. Estas evidente, ke la socialistoj eraras, se la anarkistoj estas pravaj ; ne povas esti dubo, ke ĉi tiuj lastaj eraras, se pravas la komunistoj ktp… ».*

En la tria letero ni trovas jenajn verojn:

*« ... la granda eraro de la k-doj, kiuj propagandas la ideon pri partiecigo de la esperanta movado kuŝas en tio, ke ili prijuĝas la aferon laŭ nacieca – mi ne diras naciisma – vidpunkto. Ili tro atentas la situacion en sia propra lando... kaj forgesas, ke la esp. movado devas ĉiam esti tutmonde prikonsiderata ».*

Per tiuj vortoj Lanti celis aparte la aŭstriajn k-dojn, kiuj metis sian movadon senkaŝe sub la ŝildon de la 2-a Internacio.

Lanti konkludas :

*« Mi kredas, ke SAT jam entenas sufiĉe fortan kernon el elementoj, kiuj en ordinaraj cirkonstancoj sentas sin unue esperantistoj kaj nur due partianoj ; tiu kerno povas teni la ekvilibron inter la partiecaj tendencoj, kiuj ĉiam pli malpli forte kunpuŝiĝos en niaj vicoj ».*

En kvara letero Lanti riproĉas al Stalin lian « iel reakcian » sintenon rilate lian ignoron al nia movado mondlingva. Tiutempe Stalin estis ĵus proklaminta la unuan Kvinjaran planon de industriigo ; kaj Lanti demandas, kial li ne samtempe trudis la enkondukon de esperanto en la sovetiaj lernejoj. *Hodiaŭ – en 1952 – ni scias, ke Stalin donas absolutan preferon al la neneŭtrala, imperia rusa lingvo.*

Tiu kvara publika letero aperis en Februaro 1932 (n-ro 382 de S-ulo). En la kvina letero Lanti daŭrigas la argumentadon kontraŭ la sinteno stalina.

Interesa por la nuntempuloj estas la konstato (en Direkcia komuniko de Aprilo 1932), ke jam en tiu momento « la ŝtatoj ĉiam pli kaj pli ĉirkaŭas sin per dikaj muroj, izolas sin unu de l'alia. « Elektive oni jam ne povas sendi monon eksterlanden en centr- kaj orient-eŭropaj landoj. Tamen reaperas, post vigla

tamburado, « La Nova Epoko » kiel literatur-scienca gazeto, represiĝas nova eldono de « Petro », la ŝatata SAT-lernolibro, publikiĝas « Unua Legolibro » de SAT…

Kaj oni preparas la 12-an Kongreson en Ŝtutgarto, kvankam jam konturiĝas la minaco de l'faŝismo, kies anaro kreskegas en tiu jaro, kaj interpuŝiĝoj sangaj estas ĉiutagaj okazaĵoj en la stratoj de germanaj urboj. Stranga koincido ! Preskaŭ en la sama dato, en kiu komencas malaperi la sovetia esperantismo, danki al la eksterleĝigo de SAT kaj de ĝia aktiveco, prepariĝas ankaŭ en Germanio la militiro kontraŭ la esperanto-movado, kaj unuavice ĝia laborista alo.

Unua noto pri la komenciĝanta disfalo de l'esperantismo en Sovetio aperas en n-ro 387 de « S-ulo ». La Bulteno de SEU skribas :

> *« Alarmo ! Laŭ la statistiko de CK SEU je 1-a Febr. 1932 estas reanigitaj al SEU nur 524 membroj ! Ĝis nun ankoraŭ neniun kotizon donis Leningrada, Moskva kaj Ukraina Komitatoj… aliflanke la statistiko montras, ke ĝis nun reaniĝis 61 % da oficistoj kaj nur 24 % da laboristoj. Tiu ĉi fakto ankaŭ estas tre malkontentiga ».*

*Delegit-sistemo en SAT-kongresoj ?*

Responde al tiurilata demando de membro k-do Lanti klarigas en deka publika letero, kial delegit-sistemo ne taŭgas por SAT. Li diras, ke la Kongreso de SAT ne havas rajton ŝanĝi la statuton, ke ĝiaj rajtoj estas tre limigitaj kaj rilatas preskaŭ nur al administraciaj aferoj ; ke ĉiu ano povas fari proponojn kaj skribe pledi por ili antaŭ la kongresanoj ; fine, ke ĉiu ano havas la eblon per laŭcela agitado okazigi referendumon. Se funkcius delegit-sistemo, rezultus, ke la delegito estos ĉiam

elektita inter malgranda nombro da parolkapabluloj ; ne la unuopa SAT-ano reale povus influi sur la decidojn de niaj kongresoj. La nuna sistemo (ke ĉiu aktiva membro povas ĉeesti kongreson kun voĉdonrajto) estas certe pli konforma al la stato, karaktero kaj celoj de nia movado kaj fakte entenas pli da demokrateco ol alia.

*La kongrestagoj en Ŝtutgarto (1932).*

Malgraŭ la tre malfavoraj ekonomiaj cirkonstancoj, precipe en Germanio, kaj malgraŭ la perturbo, kiun elvokis la skismo en Amsterdamo, aliĝis la kongreson 311 kaj fakte ĉeestis 245 gekamaradoj. La laborkunsidoj okazis en trankvilo kaj paco, kun disciplino de l'spiritoj, sen kriado kaj insultado. La hitleranoj ne perturbis la kunvenojn, kiel oni povis timi prave, ĉar la kongreso staris sub la signo de batalo kontraŭ la faŝismo. Granda ruĝa banderolo estis etendita fronte ĉe l'enirpordo al la kongresejo, kaj la kongresanoj decidis partopreni al manifestacio, organizata en tombejo, okaze de la cindrigo al komunisto murdita de faŝistoj.

La statutkomisiono elektita en Amsterdamo (1931) prezentis al la Kongreso sian projekton de nova statuto, plisimpligita en multaj partoj, pli preciza rilate kelkajn paragrafojn. Ĉiuj mankoj, kiuj montris sin dum la ŝtormegaj kongresoj de la pasintaj jaroj, estis eliminitaj, precipe kio koncernas la elekton de la gvid-instancoj (Plenum-Komitato kaj Ĝenerala Konsilantaro). Oni pacience prilaboris dum la kunsidoj paragrafon post paragrafo kaj forĝis tiel la statut-tekston, kiu nuntempe – en 1952 – ankoraŭ validas. Oni diskutadis ankaŭ longe pri la praktikeco kaj dezirindeco de mandatitaj delegitoj al kongresoj de SAT, kaj fine malakceptis tiun sistemon, kiu prezentus unuan paŝon al ŝanĝo de la strukturo de SAT.

Lanti jam antaŭ la kongreso skribis en « S-ulo », ke en Ŝtutgarto oni devos klare decidi, ĉu oni volas daŭrigi laŭ la nunaj principoj, per strukturo sennacieca ĉiutendenca, aŭ ĉu oni deziras transformi SAT en unutendencan (socialistan) internacion. Nu, la kongreso decidis, per grandega plimulto, ke la sennacieca strukturo de SAT restu neŝanĝita, kaj esprimis la deziron, ke diskutoj pri tiu demando ĉesu en la gazeto (3-a alineo de la Gvidrezolucio).

Notinda estas la granda nombro da nederlandaj partoprenantoj en la 12-a Kongreso, kies programlibro havis tre plaĉan aspekton.

*Ŝanĝoj kaj reduktoj.*

En lia n-ro 397 de *Sennaciulo* (17.11.1932) ni legas pri fondo de Internacio de Proletaj Esperantistoj (IPE) per la bonvolo de 46 delegitoj reprezentantaj nekonatan nombron da LEA-oj kaj « Unuigaj » Komitatoj. Ĝia ideologio estas « la marksisma mondkoncepto, la dialektika materialismo ». Tio signifas, ke anarkistoj kaj aliaj klasbatalaj nemarksistoj ne rajtas aliĝi tiun novan « Verdan » internacion.

*Sennaciulo* raportas ankaŭ, ke la unua eldono de « Plena Vortaro » estas preskaŭ elvendita, fine de 1932, kaj ke dua eldono, pli perfekta, estas en preparo.

Jarfine la Direkcio komunikas, ke, pro la malfacilaj vivcirkonstancoj laboristaj, por multaj la nuna tarifo ŝajnas tro alta : tial la aktiva membreco estu ligata nur al ricevo de unu monata numero de *Sennaciulo* en amplekso de 8 paĝoj (eldono B). Kiuj konsentas pagi la ĝisnunan tarifon duoble pli altan, abonu la 16-paĝan numeron alterne aperanta (eldono A).

La 400-a numero aperas dukolore, 16-paĝa, bele ilustrita, je la 12-an de Januaro 1933, kun tre varia enhavo. Oni trovas en ĝi leterojn ricevitajn el Sovetio de kamaradoj nun disigitaj de nia organizo. Oni legas ankaŭ verkaĵojn de eminentaj reprezentantoj de diversaj laboristaj parti-tendencoj (Stalin, Bernŝtajn, Trocki). – La unua B-numero enhavas alvokon por kongreso en Stokholmo, kie estas preparata la dektria en la vico de la SAT-kongresoj.

Nu, jam en Februaro tiu duparteco de « S-ulo » estas nuligita favore al nova organo : « Sennacieca Revuo », kiu anstataŭos la eldonon A kaj ensorbos la *Novan Epokon,* kiu en Februaro 1933 ĉesas aperi.

La stato de l'aktiva membraro je 1-a de Januaro estas nur 1 947.

*La « cigna kanto » de Lanti.*

Forte vundita anime de la konstantaj atakoj kaj kalumnioj de la bolŝevistoj, afliktita pri la malfortiĝo de la movado, precipe de la paroliloj (monateco de *Sennaciulo,* redukto de la amplekso de la jarlibroj), k-do Lanti firme decidiĝis forlasi la gvidpostenon. Li komunikas tion ekde la marta numero de « S-ulo », en tri sinsekvaj numeroj, sub la titolo « Epiloge ». Li restos la gvidanto ĝis la Stokholma kongreso, kaj tiam li reprenos sian liberecon, por dediĉi sin al studado kaj verkado. Li jam delonge intencis fari tion, sed la ardo de la batalo detenis lin forlasi la postenon kvazaŭ-fuĝe.

> *« Movado deuvs ekzisti sen kuratoroj kaj vole nevole ĝis nun la fondintoj de SAT ludis tiun rolon. Ĝi eble estis necesa en la komenca tempo, sed mi opinias, ke nun ĝia pluigo povus eĉ esti malbona. Estas necese, ke aliaj manoj ekprenu la direktilon ».*

Sed tuj li aldonas, ke la fakto, ke li ne plu tenos la direktilon, neniel signifas, ke li malinteresiĝos pri la gvidado…

Jen fino de ĉapitro en la SAT-historio ! tragika ĉapitro !

Oni scias, ke tiu fratbatalo inter socialistoj firmigis la poziciojn de la Faŝismo, kiu baldaŭ poste ekvenkis en Germanio kaj alianciĝis kun Musolini, tiutempe en apogeo. Ni nun troviĝas sufiĉe for tempe de tiu epoko por malvarmsente prijuĝi la faktojn : certe estus eraro voli malgrandigi la efikon de tiu bolado en SAT pro partiecaj konsideroj kaj instigoj ; sed estus eraro ankaŭ kondamni bloke kiel malhonestulojn la tutan tiaman komunistan opozicion ! Certe la plej multaj inter tiuj kamaradoj agis pro sincera konvinko ke ili estas pravaj kaj agas trafe kaj ĝuste por la celo de tutmonde starigota socialismo aŭ komunismo. Tiuj kontraŭantoj al la tiama direktado de SAT agis kiel prolet-esperantistoj, sub impulso fortega kaj kredantaj servi al sia idealo.

*La SAT-administracio transkondukiĝas al Parizo.*

Nur en la numero de la 25-a de Marto 1933 aperas unua noto koncerne la okazintaĵojn en Germanio. « K-doj ekstergermaniaj faru neniajn monpagojn nek mendojn, aliĝojn k. c. al Lejpcigo. ĉion direktu al Parizo… ». Tiu numero estas ankoraŭ presita ĉe Wettig, do en Germanio !

La du sekvantaj numeroj havas la pres-markon de Brodard kaj Taupin en Kulomje (Coulommiers), Francio. Tiu firmo presigis la esperantajn librojn eldonitajn de la firmo Hachette. Nebele aspektas tiuj numeroj laŭ teknika vidpunkto. Ekde junio la du gazetoj – « S-ulo » kaj « Senn. Revuo » – estas produktataj ĉe Granchamp en Annemasse, Francio, kiu tre kontentige laboras.

En la Aprila numero estas konigataj la novaj poŝtĉekaj kontoj de SAT, kies sidejo kaj administrejo estas nun ĉe la

sama adreso : 23, rue Boyer, Paris-20 (Sidejo de la kooperativo « La Bellevilloise »). Feliĉe la antaŭa administranto en Lejpcigo, k-do Lerĥner, sukcesis savi la librostokon plej grandparte kaj transsendis ĝin al Parizo kaj al Stokholmo.

Tamen perdiĝis ankaŭ multaj dokumentoj kaj libroj, pro prudenta detruo fare de la lejpcigaj respondeculoj, kaj la ĵus presita eldono de « Petro » ĉe Wettig estas konfiskita…

K-doj Banje kaj Bartelmes ekde nun prizorgas la sekretariajn kaj administrajn laborojn : Ĝis tiam k-do Bartelmes, la sola dungito de la Asocio post la likvido de la Lejpciga administrejo, prizorgis nur la redaktajn laborojn sub gvido de k-do Lanti. Sed nun li devis plenumi ankaŭ la administrajn laborojn rilatajn al la gazetoj.

*La aŭstriaj lab. esperantistaj gvidantoj fondas sian Internacion.*

Dum Junio 1933 okazis en Vieno fondkongreso de ISE (Internacio de Socialistaj Esprerantistoj), pri kiu tre severe juĝis proprapartianoj, ekz. la sekretario de l'Nederlanda LEA, k-do *Veen*, ankaŭ la socialistaj SAT-anoj en Germanio (kiam ili povis ankoraŭ esprimi sin), kaj Stokholma socialisto, kiu skribas :

> *« La socialista frakcio inter SAT-anoj sufiĉas, kaj ĝi ankaŭ estas malfermita por la aŭstriaj gekamaradoj... Do la socialista mondorganizo restu interne de la aŭstria limo ».*

*La 13-a kongreso en Stokholmo (1933).*

Tiu ĉi kongreso de SAT signifas grandan sukceson, se oni konsideras la tiujarajn mondajn cirkonstancojn ; ĝin partoprenis 600 gekamaradoj el 16 landoj. Eĉ el Germanio ne malpli ol 16 k-doj sukcesis trafi Stokholmon. Ĉe la malfermo parol-

adis i. a. la sveda ministro por klerigaj aferoj. Ankaŭ k-do Lanti faris longan propagandan paroladon. La prezidanto de la urbkonsilantaro, K. Tengdalh, akceptis la kongresanojn en la urbdomo. Unuafoje aranĝita laborist-esperantista altlernejo dum la kongreso plene sukcesis. Lekciis k-doj Neergaard, Sulski, Ruus, Hirdman kaj John Johanson Lundberg, V. Ahde, S. Aarse kaj Lanti (ĉi-lasta pri sia ŝatata aŭtoro Rabelais). Precipe pri leĝoj kaj movadoj en Svedio la kongresanoj tiel ricevis tre ampleksajn informojn, ĉar pluraj prelegantoj traktis tiujn temojn.




Pri la situacio intern-esperantista Lanti diris interalie :

*« Ni devas senlace celi al la rekuniĝo de la tuta laborista esp. movado, ĉion eblan tiucele ni ja devas fari. Kiam la homoj estos spertintaj, ke ili iris eraran vojon, espereble ili revenos al la malnova tendaro. En Sovetio la rekuniĝo eble ne estos baldaŭa… Se ni havus liberon disvastigi en Sovetio niajn organojn ktp., ni havus tie la granitan plimulton ».*

Pri sia eksiĝo el gvidposteno li rimarkigis :

*« Ĉiu devas havi la rajton herezumi. La danĝero estas, ke multaj opinias, ke miaj personaj ideoj estas la oficialaj SAT-ideoj. Ili ankoraŭ ne komprenas, ke nia Asocio ne havas kaj ne devas havi oficialan socipolitikan programon ».*

Post kiam Amsterdamo malakceptis formi la novan Plenum-Komitaton, restas plue la tasko al Parizo. La Kongreso unuanime akceptas tiun solan kandidaton. Roterdamo konsentas formi la *Konflikt-Komisionon ;* tiel nomiĝas laŭ la nova statuta teksto la antaŭa Kontrol-Komitato. En la sekvonta paca evoluo de la organizo ĝia tasko estos malpli peza ol ĝi estis ĝis tiu ĉi dato.

La Gvidrezolucio de la Kongreso konstatas kun bedaŭro la decidon de k-do Lanti forlasi sian gvidpostenon ; « esprimas kun kora danko al li pro la farita laboro la deziron, ke la nomita k-do restu aktiva en nia movado ».

La prezidantecon en la Direkcio akceptas k-do Platiel, el Germanio, politika rifuĝinto, kiu venis al Parizo post restado en Hispanio kaj kiu jam de multaj jaroj aktivas en la organizo.

*Nova eldonplano de SAT.*

Sub la titolo ADLEL (Asocio por Disvastigo de Laborist-tendenea Esperanto-Literaturo) stariĝas eldonsocieto de SAT, kiu varbas abonantojn al ĉiujaraj libro-serioj. Laŭ tiu plano devas aperi kvin libroj kun proks. 1 200 paĝoj entute dum la jaro 1934. Oni partopagas la kotizojn kaj ricevas la librojn je difinitaj datoj. Du el tiuj planitaj eldonaĵoj fakte aperas sufiĉe rapide : « La Brava Soldato Ŝvejk » kaj « Jimmie Higgins ». La tri aliaj ĝis hodiaŭ ankoraŭ ne estas publikigitaj, eĉ ne verkitaj. Ja la kvarcent nepre necesaj abonantoj ne estis trovitaj. Kaj tio estis la minimuma nombro por certigi la sukceson de la entrepreno.(1)

(1) Por montri, kiom da tempo estas bezonata por finvendi unu esperantan verkon, eldonitan en 2 000 ekzempleroj, ni citu la du suprajn librojn ; la *Brava Soldato* estis elvendita en 1950, *Jimmie Higgins* en 1951.

*La 14-a Kongreso de SAT en Valencio (1934).*

Por tiu sudlanda kongreso oni apenaŭ atendis pli ol 300 partoprenantojn. Sed efektive 376 kamaradoj el 13 landoj manifestaciis impone por la SAT-ideoj. El la raporto prezentita de la Plenum-Komitato al la Kongreso lumas iagrada optimismo. La perspektivoj financaj estas pli favoraj, precipe dank' al apero de la dua eldono de la « Plena Vortaro », kies profito servas por likvidi longjarajn ŝuldojn. Neniam cetere pruntintoj al SAT bezonis havi timon perdi sian monon : ĉiam SAT povis repagi al ili, post pli malpli longa tempo.

Ankaŭ « Sennacieca Revuo » aperadas regule ĉiumonate, kun 16 paĝoj. La raportaron prezentis k-do Bartelmes ; ĝi akiris unuaniman aprobon de la Kongreso. Post vigla diskuto oni preskaŭ unuanime akceptis proponon el Malmö pri rezolucio sendota al la Soveta registaro kaj al ĉiuj Laboristaj esperantistoj en la mondo, por altiri la atenton pri la atenco farita de la Centra Komitato de SEU kontraŭ nia Asocio.

> *« La Kongreso… konsideras favora la tempon por la reunuiĝo de la laborista esp. movado kaj alvokas ĉiujn laboristajn esperantistojn kunlabori en tiu ĉi tasko ».*

Rimarkinda estis la ĝenerala atmosfero reganta en tiu ĉi kongreso, la impona solena malfermo en la Universitato, la forta impreso de niaj manifestacioj sur la publikon. Ankaŭ incidentoj ne mankis. En la fino de la malferma soleno parolis, hispanlingve, iu valenciano nome de la sindikata unuiĝo ĝenerala (UCT) ; li ne nur salutis, sed denuncis samtempe la mankon de libereco en tiu tamen respublika lando, kies registaro agadas kontraŭ la laboristaro. En tiu momento la polico intervenis kaj fermis abrupte la kunvenon. Restis enskribitaj nur ankoraŭ du parolontoj (reprezentantoj de la

sindikataro kaj de partio). Estis la unua horo nokte. La kunveno finiĝis per orkestraĵo.

La Laborista Altlernejo funkciis por la dua fojo, sukcese, kun tri lekcioj, de k-ino Pähn el Estonio pri nuntempa soveta literaturo, de Grau Casas pri kataluna literaturo kaj lingvo, de k-do Bartelmes pri muziko, enkadrita de muzikaĵoj de esperantista loka orkestro. Krome k-do Pâris propagande paroladis pri « edukado de gvidantoj en la laborista movado ».

*Starigi la kreaĵon super la persono !…*




En tiu periodo instruisto A. Pâris, nomita jam en la Valencia kongresprotokolo, elektiĝis prezidanto de l'Organiza Kongres-Komitato por la 15-a SAT-Kongreso, okazigota en Parizo, urbo de l'SAT-Sidejo. Tage kaj nokte tiu k-do estis preta labori por nia afero… kiel montriĝis pli malfrue, por rikolti personan gloron. Sed la SAT-movado ne estas taŭga tereno por tia ekspluatado ; ĝi ne estas ŝtuparo kondukanta supren al persona troestimo ; ĝi ne estas akuŝejo por karieristoj. La pedanteca elokvento de Pâris, kiu

kapablis ĝissvene kontraŭ-argumentadi en diskutoj klopodante konvinki la teditajn aŭskultantojn, regis plurajn jarojn en la franclingva Federacio de Laboristaj Esperantistoj, kaj iagrade malbonigis ankaŭ la tiaman SAT-vivon. Lia nekompatemo al la bolŝevista opozicio iom post iom transformiĝis en simpatiantan « unuecfrontemon » ; sed la SAT-kongresoj ĉiam denove konfirmis la ĝustecon de la bazaj principoj de la Asocio, kaj fine parizaj SAT-anoj ne plu tolerantaj la pestumitan aeron en la « unuecfronta » FET (franca LEA) starigis novan varborganizon : SAT-AMIKARO, hodiaŭ pli ampleksa kaj pli efika en agado ol en la jaroj ĵus antaŭirintaj la militon.

Pâris, kiu koncerne organizadon de l'15-a Kongreso deziris ĉion fari sola, kaj projektis multon, devis fine registri la plenan fiaskon de l'antaŭkongresa somerlernejo kaj de l'loĝproblemo.

*Preludo al la pariza kongreso (1935).*

En la oficiala gazeto la kreskado de la nederlanda anaro estas sentebla : pli oftas la kunlaboraĵoj el tiu lando. La fakto, ke ĉiuj anoj de Federacio de Laboristaj Esperantistoj en la nederlanda lingvoteritorio ricevas laŭkontrakte « S-ulo »-n, kontribuas multe al la propagando de l'SAT-principoj en tiu regiono, kie ardas kaj progresadas la Laborista Esperantismo.

Lanti, kvankam pli observanto kaj admonanto en tiu ĉi periodo ol konstanta kunlaboranto al « S-ulo », prezentas gravan front-artikolon, en la februara n-ro de 1935, sub titolo « Principoj de Unueco ». Ĝin kaŭzis la tiutempa diskutado en laboristaj esp.-gazetoj pri ebla rekuniĝo de ĉiuj prolet-esperantistoj. Lanti klare kaj precize difinas la tri bazajn principojn de SAT, pri kiuj cedo ne povus esti konsentata en okazo de eventuala unuigo : la principo pri *laŭklasa* dispartigo, kiu kondukis al la fondo de SAT ; la principo pri la super-

tendenceco de SAT ; la principo pri dufakeco de la movado : poresperanta aparato (LEA-oj) kaj peresperanta (SAT).

La plenumkomitato deklaras sin solidara kun la enhavo de tiu artikolo. Ĝi turnis sin, laŭ la deziresprimo de la lasta kongreso, al la IPE-Centro, tiumomente en Leningrado, por ke oni konsideru tiuflanke eventualan rekuniĝon de la tutmonda lab. esp. movado. La respondo de la Centro estis polemikeca, celanta altiri la SAT-anojn al laboro ĉirkaŭ la tielnomata PEK-aparato (Proleta Esperanto-Konrespondado), kreitaĵo de IPE, sed sur *laŭlanda* bazo, ne mondskala ! En la tuta respondo manifestiĝas la tendenco delogi for la lojalajn SAT-anojn el la malnova domo, en kiu okazas eduka kaj kleriga laboro favoranta la evoluon al socialisma socio, trans la kapojn de la elektitaj gvidistoj.

Tiuj manovristoj puŝiĝis kontraŭ muro, kiu estis pli forta ol la partipolitika, doktrineca pensmaniero movanta ilin : la idea trezoro de SAT…

Tiu idea supereco lume brilas el la artikolo de Lanti en aprila « S-ulo » (1935) titolita « Mi ĝojas esti Esperantisto ». Li elmontras, ke al la plago de nia epoko, al la naciismo, oni povas kontraŭmeti nur unu vere etikan spiritan obstaklon : la Esperantismon.

> *« Por detrui, ekstermi la naciismon, ne ekzistas pli bona, pli efika rimedo ol faligi unue la lingvajn barojn, kiuj apart-igas la popolojn… ni estu veraj ĝisostaj esperantistoj… nia lingvo estas* necesa *pacigilo, se ne tute sufiĉa… ».*

Samdate aperas, verkita de k-do Platiel, « Historio pri la Skismo en la laborist-esperanta movado », dokumentoj, faktoj, citoj, kiuj rilatas tiun bedaŭrindan disiĝon volitan de parti-fanatikuloj. Ĝi resumas tiun negativan periodon en la SAT-vivo, dum kiu la gvidantoj de la Asocio estis devigataj oferi

tiom multe da tempo kaj energio al la lukto kontraŭ la malsano de la proletara movado : politika disŝiriteco.

*La 15-a SAT-Kongreso en Parizo (1935).*

La Kongreson partoprenis 343 gekamaradoj el 15 landoj (aliĝis 430 el 17 landoj). La Kongreso estis unuanima rilate la proponojn pri supertendenceco kaj pri Frakcia Regularo, kiu lasta montriĝis tre necesa, post kiam la frakcia laboro ĉe SAT komencis ree vigliĝi. La Regularo fiksas la rajtojn kaj limojn de la frakcioj ; cetere ĉiu sekvanta kongreso rekonfirmis tiun Regularon, kontrolinte, ĉu ĝia enhavo ankoraŭ plene validas. Oni trovas la tekston en la jarlibroj de SAT.

Al la manovroj de la IPE-gvidantoj la kongreso decidis respondi, pere de la Plenum-Komitato, kaj publikigante tiun respondon en « S-ulo » demonstri, kiu vere deziras la laboristan unuecon:

> *« Nia organizo ĉiam estis malferma al ĉiuj, kiuj agnoskas la klasbatalon kaj celas al la malaperigo de l'klasoj per la forrenverso de la kapitalisma regsistemo ĉu privata, ĉu ŝtata ».*

Tiel oni legas en la Gvidrezolucio de la 15-a Kongreso. Plue :

> *« La Statuto kaj gvidprincipoj, kiuj estis akceptataj de la foririntoj* [(1)] *ĝis la jaro 1931, restas la samaj kaj daŭre aplikataj ĝis nun ; sekure la plej bona kaj laŭcela rimedo por meti finon al la nuna, bedaŭrinda malunueco estus, ke la foririntoj retrovu la ĝustan direkton kaj revenu al la malnova organizo… ».*

Aliflanke la Kongreso konsentas la sendon de tri delegitoj kiel observantoj al la IPE-kongreso en Antverpeno, je kondiĉo ke la kostoj de tiu sendo ne ŝarĝu la SAT-kason.

---

(1) « Voj-erarantoj » estis unue proponita.

Pri la fiasko de la antaŭkongresa Somerlernejo en Bulonjo-ĉe-Sejno, k-do Pâris aperigis embarasan raporton en Sennaciulo, en kiu li donas la kulpon al la … neinteresiĝo de la kongresanoj !

La administranto de SAT, k-do Banje, montras la financajn malfacilojn, precipe koncerne libro-eldonadon. La eldon-entrepreno ADLEL devis esti likvidata, ĉar la merkato mal-larĝiĝis, sed ĝi ne bankrotis ; la likvido okazis en regulaj kondiĉoj.

Pâris kritikas la nuntempan laboron de k-do Lanti, kiu aperigas en periodaĵo, pri kiu li respondecas, « Herezulo », – akrajn riproĉojn kontraŭ la gvidantoj de unu tendenco (la 3-a Internacio). Li kritikas, ke anoncoj – kvankam pagataj – aperas pri tio en « S-ulo ». Dume Lanti mem, kvankam estanta en Parizo, evitas ĉeesti la kongreson.

> *« Li sentas doloron », diras Banje, « pro la supozo, ke multaj pensas, ke li mem estas kaŭzo de skismo… SAT neniam estis pli unueca ol nun ».*

La Kongreso akceptas, ke la Fakaj Sekcioj de nun troviĝu en la Statuto kiel organoj de SAT.

K-do Lanti ĉeestas dum la lasta kongresa kunsido, laŭ peto de la Kongreso, kaj respondas al la propono de Pâris pri restarigo de l'unueco:

> *« La unuiĝo okazas per forlaso de la eraraj principoj, en la lastaj jaroj truditaj al la laborista movado. K-do Pâris devus malkaŝe deklari : Mi deziras la likvidon de SAT… ».*

Tio estis la lasta persona interveno de k-do Lanti en SAT-kongreso. Lanti nun preparas sian mondvojaĝon, per propraj rimedoj, kaj, sur la literatura tereno, li daŭrigas la verkadon por senmaskigi la ŝajnsocialismon en Sovetio.

*Person-ŝanĝoj en la Plenum-Komitato.*

Dum la pariza kongreso montriĝis mal-interkonsento inter la koncepto de k-do Platiel (pseŭdonimo : Ĝermen) kaj tiu de la PK-kolegoj pri la taskoj kaj la rolo de la Asocio. Li do eksiĝis el la Komitato, kaj de tiu tempo k-do Banje estas prezidanto de la Plenum-Komitato. K-doj Avid kaj Piron anstataŭas k-dojn Platiel kaj Bubo, kiu lasta foriris el Parizo. Bubo estas kamarado el la juna generacio, kiu entuziasme akceptis la sennaciecajn ideojn kune kun la paro Ozre-Gallo, kiuj tragike pereis revenante de la Stokholma kongreso. Bubo mem finis sian vivon per memmortigo, mallonge antaŭ la dua milito, heredinte malsanon nekuraceblan kaj influite de pesimismaj konsideroj.

Pri la IPE-kongreso en Antverpeno la tri delegitoj raportis, ke neniu venis tien el Sovetio, kaj entute estis nur 40 personoj (el ili 20 delegitoj kun mandato) ; laŭ IPE-a fonto ĉeestis ĉ. 90 personoj. Du el la SAT-delegitoj parolis kiel gastoj kaj kaŭzis debaton pri statutparagrafo, kiu limigas la aliĝon al IPE je kamaradoj, kiuj akceptas la « dialektikan materialismon ».

La respondo de la IPE-estraro en Leningrado al la letero adresita al ĝi de la 15-a SAT-Kongreso, rilate eventualan rekunigon de la movado, estis tute malkontentiga, ĉar la IPE-gvidantoj ne deziras allasi en la proponita nova unueca organizo individuojn, « kiuj klopodas pri starigo de novaj internacioj, ekzemple la 4-a, aŭ kiuj kontraŭbatalas la fortikaĵon de la tutmonda proletaro : Sovet-unio ».

Sekve oni deziris teni for de la organizo ne nur trockistojn, sed ankaŭ sennaciistojn, kies tiutempe aperanta organo « Herezulo » tre forte kritikis la politikon de Sovetio.

La Plenum-Komitato atentigis en sia respondo pri tiu manko de supertendenceco ; ĝi rimarkigis, ke « la tutmonda laborist-

esperantista movado devas resti sendependa de la ŝanĝiĝema taktiko de politikaj organizoj, ĉar ĝia disvolviĝo sekvas aliajn leĝojn ». Ankaŭ neakceptebla ĝi juĝas la proponon rekomendi al la por-esperantaj propagand-asocioj aperigon de *peresperantaj* informoj (t. n. PEK-servo).

La membraro akceptas tiun ĉi vidpunkton, kiel vidigas ekz. rezolucio de la antverpena SAT-Rondo, aperigita en la januara *Sennaciulo* 1936.

En februara « S-ulo » k-do Lanti ankoraŭfoje klarigas, kial la organizado de l'laborista esperantistaro ne devas esti farata laŭpartie, kaj kial unu klasa organizo supertendenca estas tute konforma al la nuna stato de l'Esperanta movado.

Li titolas tiun klaran artikolon pri rolo kaj signifo de mondlingvo « Ne utilas denove ektrovi Amerikon ».

*SAT tenas sian 16-an Kongreson en Manĉestro (1936).*




Tiu ĉi 16-a Kongreso staras sub la signo de politika agitiĝo en la tuta mondo. Registaro Blum kaj strikoj en Francio, eksplodo de civitana milito en Hispanio, definitiva malpermeso al ĉiaspeca esperanto-movado en Germanio (la gazeto « Heroldo » transloĝiĝas al Hago). Ankaŭ la milit-fantomo minacanta per ĝenerala konflikto aperas ĉe la horizonto. La PK-raporto al la kongreso montras ekvilibriĝon de la spezoj, senŝuldiĝon de la Asocio. Pruntoj faritaj en la jaroj de la skismo por savi la ŝipon el la ŝtormo, estas repagitaj : signo, ke SAT meritas la fidon de tiuj, kiuj pretas helpi finance, kiam neceso montriĝas !

La bilanco, unuafoje depost jaroj, montras profiton. Ĉe la sojlo de la Kongreso, en la julia n-ro de *Sennaciulo*, la PK vokas ankoraŭfoje, fruntpaĝe, por lasta fortostreĉo por forigi *tute* la « Breĉon », kiun lasis la malbelaj jaroj de la skismo en la organizo, kaj – ne laste – ankaŭ la faŝismo en Germanio.



*Kongresanoj en Manĉestro antaŭ la Urbdomo*

Ĉeestas en Manĉestro nur ĉ. 170 gekamaradoj el sep landoj, sed la propagando farata estas grava. Unuafoje en la historio, la Brita Disaŭdiga Kompanio (ŝtata radio) akceptis disaŭdigi propagandon pri esperanto, fruvespere, en favora horo. Ĝi estis aŭskultata de pluraj milionoj da homoj en Britio. La anstataŭa urbestro, laborpartiano Binns, kun sia edzino, akceptis solene

kaj regalis la kongresanojn. Sindikataj kaj kooperativaj reprezentantoj salutparolis. Oni monkolektis por la hispana proletaro. Senpaga estis la veturado per tramoj kaj aŭtobusoj de la Urbo. La PK-raporto trovis preskaŭ unuaniman aprobon.

En sia Gvidrezolucio la Kongreso rekonfirmis la ĝustecon de la aplikitaj gvidprincipoj. La Kongreso pridebatis « ekster la tagordo », post solvo de la tagordaj problemoj, proponon pri unueco, kiu eĉ parole estis subtenata de unu el la ĉefaj skismigintoj, Kibl (Keable), al kiu oni lasis la parolrajton. Tiu propono estis malakceptita per granda plimulto da voĉdonantoj, ĉar – « la unueco devas okazi sur la bazoj de SAT ». Pri tio insistas, en la oktobra n-ro de « S-ulo », la Plenum-Komitato en « Manifesto al la Esperantistaj laboristoj ». La kvintesenco speguliĝas en ĉi tiu alineo :

> *« Ni ne malŝatas opozicion en SAT kaj ne timas la komparan kontraŭstarigon de diversaj vidpunktoj en diskutado… Estas nur unu kondiĉo, nome ke la opoziciantoj apliku lojalajn, honestajn rimedojn kaj estu sinceraj en siaj paroloj kaj agoj ».*

*
* *

K-do Lanti dume ekforiris por longa vojaĝo, el kiu li ne plu revenos… Jam li trapasis Hispanion, antaŭ eksplodo de la interna milito, kaj Portugalion ; kaj tiam li enŝipiĝis kun celo : Japanio. Eŭropon li elkonis ; nun li volis konatiĝi kun aliaj rasoj, aliaj kontinentoj…

*Nova danĝero : La Devaluo (Aŭtuno 1936)* (*)

La septembra n-ro de Sennaciulo ne plu estas presita en Francio (ĉe la firmo Granchamp). La Komitato trovis pli

(*) Malplivalorigo de monvaluto kompare al la ora normo.

malkaran presiston en Belgio (Les Arts Graphiques, kooperativa presejo). En la novembra numero k-do Banje pritraktas la problemon de la devaluo, kiu okazis en 5 landoj, inter ili en du, kie SAT havas la plimulton de siaj membroj : Francio kaj Nederlando. Banje ne timas por SAT mortbaton kiel por multaj entreprenoj. La jaro 1937 promesas novajn aliĝojn de membroj en Nederlando, kie prepariĝas la 17-a Kongreso. La administranto decidas ne ŝanĝi la libroprezojn por akceli la disvendadon.

*La Roterdama SAT-Kongreso (1937).*

La raporto al la Kongreso entenas jenon:

> *« Malgraŭ la pliiĝinta laboro, sekve de kresko ĉe membraro kaj abonantaro, la laboroj estas normale plenumitaj de la du k-doj »*.

Temas pri k-doj Banje kaj Bartelmes, ĉe la sidejo ; el ili la lastnomita denove reprezentas la Komitaton ĉe la 17-a Kongreso, same kiel li jam faris ĉe la 14-a kaj 16-a.

La Roterdama Kongreso fariĝis la ĝis tiam plej granda SAT-kongreso ; ĝi superis laŭnombre kaj certe ankaŭ laŭ propaganda vidpunkto la Lejpcigan el 1929. Sentiĝis la impresa kreskado de la nederlanda laborista esperantismo en la ĵus pasintaj jaroj, realigita pere de metoda kaj grandskala varbado en laboristaj medioj. Ĉeestis en Roterdamo 806 gekamaradoj el 16 landoj (aliĝis 865 el 19 landoj).

Oni akceptis, post longaj debatoj, fine unuanime la PK-raportaron ; plenan kunsidon oni dediĉis al la nova regularo pri Kongresa gvidado (kies tekston oni trovas en la sekvantaj jarlibroj ĝis la hodiaŭa dato). Sed ankaŭ pri eta statutŝanĝo, en la unua paragrafo, oni diskutis longe kaj funde. La Kongreso fine akceptis la pliprecizigon : « SAT ne estante *partipoli-*

*tika…* » anstataŭ la malpli preciza « politika ». En la finrezolucio la Kongreso tiras la konkludon, ke la karaktero de la organizo devas resti plue « interhelpa, kultura, eduka kaj informa, sed neniel partipolitikeca ».

Nur *post* la debatoj, tute ĉe la fino de la kongreso, montriĝis denove la profunda fendo partieca, kiu disigas la laboristan movadon, kiam temis doni celon al la mono kolektita por la hispanaj militantaj laboristoj. Iuj volis, ke ĝi servu por aĉeto de armiloj, aliaj deziris, ke ĝi aplikiĝu al funkciigo de postfronta hospitalo. La tono de l'debato fariĝis akra kaj malamikeca super tiu ĉi demando, ĉar oni legis tiutempe en la laborista gazetaro tute kontraŭdirajn tendencajn informojn pri interpartiaj disputoj kaj eĉ bataloj ! Necesis akcepti ordo- proponon por ĉesigi tiun debaton kaj lasi al la Roterdama SAT-Rondo la decidon pri uzo de la kolektita monsumo.

Notinde estas ankaŭ, ke la urbestraro de Roterdamo tre favore atentis nian kongreson, subtenis la propagandon, aranĝis akcepton ĉe la urbdomo, kie k-do Faulhaber lerte respondis al la paroloj de la urbestro, kaj la kongreskomitato organizis plurajn aranĝojn por la kongresanaro, interalie viziton al oceana luksŝipego.

*La taskoj de Organiza Kongres-Komitato.*

Kun la kresko de l'nombro da partoprenantoj en la kongresoj graviĝis ankaŭ la taskoj de la Organizaj Komitatoj. Precipe la loĝiga demando fariĝis malfacila kaj starigis problemojn al la OKK-oj. Hoteloj estas tro kostaj por proletoj. Privata loĝado ĉe esperantistoj fariĝas escepta kaj ebla nur, kie familioj disponas pri multe da loĝospaco. La solvon trovis la OKK-oj en la aranĝo de tiel nomataj « amasloĝejoj », pli bone ni nomu ilin « kolektivaj loĝejoj ». Tia ejo funkciis unuafoje

grandskale en Roterdamo, kun atentinda sukceso. La avantaĝoj estas evidentaj : 1°) Malmultekosteco, 2°) konstanta praktikado de esperanto, ankaŭ ekster la kongresa salono.

Ekde 1937 la « amasloĝejo » fariĝas kutima konsistoparto de niaj kongresoj. Krome la OKK-oj ofte zorgas ankaŭ pri tendlokoj ; en 1938, Bruselo, 100 kongresanoj kunloĝis en tendejo.

*La opozicio perdos pli kaj pli la grundon.*

La ekzisto de kontraŭaj tendencoj kaj fluoj en la laborista movado neniam ĉesis reflektiĝi ankaŭ en la vivo de l'esperantistaj organizoj. Sed SAT pli kaj pli mastris, dank' al sia strukturo kaj al sia sennacieca idealo, ĉi tiujn interbatalojn. Nur en la kongresoj, kaj iafoje en la paĝoj de la gazetoj, eksplodas ankoraŭ senbridaj polemikoj, kiujn la raciemo de la plimulto malaprobe repuŝas, por lasi vojon liberan al pli sana evoluo. Nek IPE, nek ISE kiel memstaraj organizoj tendencaj sukcesis mortige trafi SAT aŭ senvalidigi per pruvo pri supereco ĝian principaron. Ilia malprosperado kaj likvidiĝo konfirmis nur la ĝustecon de l'SAT-tezoj.

En Francio, okaze de la registaro Blum, restariĝis la sindikata unueco, kiu estis rompita tuj post la milito. Ĝi povus esti instiga, por restarigi unuecon ankaŭ ĉe laborist-esperantistoj. Almenaŭ unu el la estraranoj de la franclingva LEA argumentadis tiel, influita de la komunista agitado. La senbazecon de tiu argumentado bone demonstris k-do Kaŝon (Cachon) en longa artikol-serio pri la « unueco » en Francio, el kiu evidentiĝas, ke ĝi estas nur *ŝajna, formala* unueco, dum interne de la organizoj unuigitaj la disputoj kaj manovroj kontinuas.

Ĉe la laboristaj esperantistoj estas same ; oni provas perforte kungrupigi en la sama organizo tiujn, kiuj funde malsamopinias

pro la konstanta influo de la partia gazetaro. El tiu netolerebla stato rezultis la fondo de aparta Rondo el parizaj SAT-anoj sub nomo « SAT-Amikaro », kun propra informilo.(*)

*
* *

Lanti daŭrigis sian kunlaboron al la SAT-gazetoj per skribaĵoj el Japanio:

> *« ... mi kredas povi prave aserti », li skribas al la verkisto Han Riner (n-ro 458 de* Sennaciulo), *« ke ne ekzistas ... abismo inter la animo de la flavhaŭtuloj kaj tia de la blankhaŭtuloj. Ekzistas nur diferencoj en la esprimado, en la elmontro, sed la homoj, ŝajnas al mi, estas esence la samaj ĉe ĉiuj latitudoj ».*

Ekde Novembro 1937 *Sennaciulo* aperas ĉiumonate kun 10 (anstataŭ 8) paĝoj, sen plialtigo de l'kotizo. La financa perspektivo estas pli bona, la abonantaro progresas.

*La 18-a Kongreso de SAT en Bruselo (1938).*

659 gekamaradoj el 16 landoj ĉeestis tiun ĉi Kongreson (el 709 aliĝintoj el 18 landoj). La plimulton konsistigis nederlandanoj (432), sekvis Francio kun 112 gek-doj. El la kongresdebatoj naskiĝis komisiono el LEA-reprezentantoj por pristudi pli konkretan aplikadon de la Gotenburga Konvencio, pli intiman kunlaboron de la SAT-amikaj LEA-oj. Germana kamarado Kaŝo (K. Schmidt) – li pereis dum la milito volante fuĝi Svision – lerte pledis por ŝanĝo de la Statuto tiele, ke

(*) El ĝi evoluis postmilite la tut-teritoria « SAT-Amikaro », kiu disponas pri propra monata organo presita.

malaperu la linioj pri klasaj celoj kaj klasbatalo [(*)]. Fine de longa debato tiu propono estis malakceptata per grandega plimulto. Notinde, ke tiu debato okazis senpasie kaj kun granda objektivemo de ĉiuj parolantoj. La Gvidrezolucio de la Kongreso

> *« konstatas kun kontento la lastatempan plifortiĝon de la Asocio kaj ĝian viglan aktivecon rilate la plenumadon de ĝiaj laŭstatutaj taskoj... ».*

kaj vokas al aparte starantaj LEA-oj, ke ili aliĝu al la Gotenburga Konvencio.

K-do Bartelmes en sia prikongresa raporto (Aŭgusto 1938) konkludas:

> *« Ni tiras el tiu ĉi Kongreso jenan lecionon : Kio ajn okazos en la mondo sur la politika tereno, la SAT-ideo vivas profunde enradikigita en la koroj ; ĝi ne plu povas perei ».*

K-do Neergaard invitis la venontan kongreson al Kopenhago, kaj k-do Koc el Pilzeno la 20-an al … Ĉeĥoslovakio : ĉi tiu lasta invito, forte aplaŭdita, estas kvazaŭ provoko al la Fatalo… ĉar jam Hitler etendas siajn ungegojn al tiu teritorio.

*Sub la signo de l'mortanta Paco.*

> *« Ni preparu nin al neeviteblo », skribas Lanti sub pseŭdonomo « A. Tirlarigo » en oktobra « S-ulo » (1938). « Nur kelkaj revuloj, utopiuloj ĝeme kaj bombaste parolas pri eterna paco ».*

---

(*) La motivigo de k-do Kaŝo estis jena : « La internacia laborista movado montris sin malkapabla regi la cirkonstancojn postmilitajn kaj krei novan ordon. La klasbatala ideologio estis necesa por lukte plibonigi la vivkondiĉojn antaŭ duonjarcento. Sed nuntempe tiu opinio ne plu estas absolute laŭtempa. Multaj el la plej gravaj landoj estas faŝisme regataj... ».

*« Tial ke ekzistas nacioj, kies sendependeco devas nepre esti defendata, milito estas neevitebla... ».*

Ekde Decembro aperas *Romanserio* sub la komuna ŝildo de SAT kaj FLE, planita kaj realigata en Amsterdamo. La volumoj komencas aperi regule ; ili estas belaspektaj, bone presitaj kaj kun inda literatura enhavo. La unua estas represo, kun diskuteblaj stilkorektoj, de la Kabe-a traduko de « Patroj kaj Filoj » (Turgenjev) ; sekvas « Kulio » (Szekely-Lulofs), « Fontamara » (Silone), « La Hispana Tragedio » (Jef Last), « Homoj en Milito » (Latzko), kaj aliaj.

Plua ĝojiga novaĵo : « Sennacieca Revuo » eliras ekde Decembro en nova bela vesto, kun kolora kovrilo ; ĝi aspektas impona, kiel vere serioza, grandformata revuo. La abonprezo ne estas ŝanĝita, escepte por Francio, kie la devaluo postulas prez-adapton. Rezulte tiu plaĉa eldonaĵo gajnas multajn novajn simpatiantojn kaj abonantojn…

Dume la Internacio de Proletaj Esperantistoj, misnaskita produkto de la skismo, anoncas sian morton per cirkulero de la estraro al komunist-frakciaj esperantistoj, en Oktobro 1938 (1). La Plenum-Komitato de SAT tiras la konkludojn el tiu okazaĵo en la januara n-ro de « S-ulo » (1939).

K-do Lanti dume daŭrigis sian mondvojaĝon ; li nun troviĝas en Oceanio. En Velingtono li faris paroladon propagandan por SAT antaŭ neŭtrala publiko, okaze de Novzelanda esperanto-kongreso. Ĝi aperis en la marta n-ro de « S-ulo ». En tiu parolado ni trovas jenan agnoskon de la *vivanta* lingvo esperanto :

*« ... plej forte impresis min la fakto, ke sep-jara knabo bele deklamis kaj kantis en nia lingvo. Mi fidas al la generacio de homoj, kies lulila lingvo estos esperanto ».*

---

(1) Ĝi rekomendas al siaj anoj aliĝon al... UEA !

*La Interhelpa Tasko.*

Pli forte reliefiĝas tiu ĉi tasko post la malvenko de l'hispana proletaro ; multaj fuĝis al suda Francio kaj estis tie ŝlosataj en koncentrejojn, en kiuj regas mizeraj vivkondiĉoj. SAT komencas larĝskale apliki proletan solidaron. *Sennaciulo* kvitancas la ricevatajn mondonacojn kaj libropakojn. Ĝis januaro 1939 nutropakoj grandnombre iris al Hispanio ; nun ĉefe libropakoj trafas la koncentrejojn, kie legmaterialo estas pleje deziregata. En ĉiu numero de « S-ulo » aperas emociaj leteroj el la koncentrejoj.

En maja front-artikolo oni sentas la angoron de la horo :

> *« ... neniu el ni devas forgesi, ke la batalo kiun ni komencis kontraŭ pereanta mond-ordo, estas longdaŭra kaj interrompata iam kaj tiam per malvenkoj kaj regresoj... »*

skribas la redaktoro.

*La 19-a Kongreso de SAT en Kopenhago (1939).*

Tiu ĉi Kongreso, kiu okazis inter la 5-a kaj la 10-a Aŭgusto, unuigis en la dana ĉefurbo 568 partoprenantojn el 13 landoj (enskribiĝis 622 el 15 landoj). Ĝiaj aranĝoj estis multnombraj, ankaŭ rilate propagandon : plenaera kunvenego en popola parko, vizito ĉe la urbestraro, ktp. Bedaŭrinde tiu bone planita propagando ne lasis gravan efikon ĉe la kopenhaga publiko, kiu staris plene sub la timosento ; tiun kaŭzis la kuntiriĝanta fulmotondro sur la politika ĉielo…

La ĉefurbestro esprimis tiun angoron en sia parolado, en kiu li cetere agnoskis senvuale la valoron de nia penado.

La raportoj de la PK estis unuanime akceptitaj post detala pridiskuto. En la gvidrezolucio la kongreso esprimis sian solidaron kun ĉiuj suferantaj kaj batalantaj esperantistoj en landoj, kie la libero estas subpremata, kaj aparte al la rifuĝintoj troviĝantaj nun en koncentrejoj.

La komisiono el LEA-reprezentantoj elektita en Bruselo prezentis regular-projekton por funkciado de LEA-Komitato, kiun defendis k-do Kroonder el Amsterdamo. La ideo estas, ke fortaj LEA-oj helpu per konsiloj al la pli malfortaj.

> *« La LEA-oj faru laboron naciskale, sed tiu laboro nur valoras, se ĝi trovas eĥon en aliaj landoj ».* (Kroonder)

Kelkaj kamaradoj en la diskuto esprimas sian timon, ke SAT ne havos sufiĉe da influpovo sur tiu ĉi Komitato, kaj ke ĝi formos kvazaŭ novan Internacion apud SAT. Kroonder rebatas, ke SAT havas influon delegante al tiu komitato PK-anojn. Cetere ĉe la komitato valoros nur unuanimaj decidoj. Oni fine per unuanimeco akceptas la proponon de la komisiono.

Oni kunfandis kelkajn proponojn rilatajn al komuna elpaŝo kun aliaj tutmondaj esperanto-organizoj al la registaroj de la mondo. Unuj deziras, ke la Plenum-Komitato havu la rajton subteni tian elpaŝon. Aliaj kontraŭproponas, ke la kongreso de SAT *iniciatu* tiun komunan elpaŝon. Tiu lasta vidpunkto malvenkas en la voĉdono per malgranda malplio da voĉoj.

La Laborista Universitato denove funkciis tre vigle en la kadro de tiu ĉi 19-a Kongreso. Interalie okazis unuafoje altnivela politika diskutkunveno, en kiu ĉiu povis prezenti sian vidpunkton. Ĉiutage aperis numero de Kongresa Gazeto. La prezento de la historio pri « Petro » kiel muzikdramo rikoltis grandan sukceson.

La Kongreso akceptas la inviton de Nancio, Francio, por 1940, – jam kun sekretaj duboj pri ĝia okazigeblo…

# TRIA PERIODO : SEPTEMBRO 1939 ĜIS 1952

*La Milito.*

En la numero de Septembro/Oktobro 1939 (n-roj 481/482) de *Sennaciulo*, kiu cetere entenas la kongresprotokolon pri Kopenhago, la Plenum-Komitato komunikas sian decidon komisii la taskon de gvidado de SAT provizore al la SAT-Rondo de Roterdamo, ĉar el Parizo ne plu eblas gvidi la Asocian ŝipon. La unuajn tagojn de septembro 1939 la redaktoro N. Bartelmes, leĝe germano kvankam spirite sennaciulo, devas sin prezenti al francia militpolico kiel ĉiuj germanoj en Francio. Li migras de koncentrejo al koncentrejo : Parizo, Normandio, fine apud Bordozo, atingita de la germanaj trupoj fine de Junio 1940. Tiam la Gestapo ankoraŭ ne malkovris la nenazistan pasinton de Bartelmes en Francio, kaj tial li estas normale repuŝita al Germanio. Bartelmes restas en poŝtaj rilatoj kun la parizaj amikoj dum pluraj jaroj ; eble pro tio la Gestapo interesiĝas pri li (komence de 1942) kaj ĵetas lin en malliberejon en Norda Francio, kien li estis direktita de la ŝtata Laborperantejo, dum sia oficado kiel librotenisto, kaj de tie en koncentrejon germanian, dum la somero 1942. Post grava malsano li mobiliziĝas en la armeo, kiel ambulancisto, dum unu jaro, 1944-1945. Denove li fariĝas kaptito de la usona armeo, same kiel en 1918. Tuj kiam eblas, post la armistico, li rekontaktas kun siaj amikoj parizaj.

Fakte nur tri el ses PK-anoj restas en Parizo, post Junio 1940. Sed ekde militkomenco la poŝta servo malbone funkcias, multaj dokumentoj estas forlokitaj el Parizo al sekura loko, sekve administradi fariĝas malfacile, se ne maleble. La Sidejo restas tamen malfermita dum la tuta daŭro de la milito, en-

tenanta la plej grandan parton de la librostoko, posedaĵo de SAT. Dum la tempo de okupado, al scivoluloj estas dirate, ke tiun ejon posedas « sinjorino Desat ». Post la milito la tuta lumono por la ejo estas postpagita retro-efike.

En Nederlando ĝis la invado (1940) ĉio ankoraŭ funkcias normale ; ne regas milit-leĝoj kaj dekretoj, kiel en Francio, kiuj katenas la liberan esprimadon.

En la nomita numero (Sept./Okt. 1939) la Provizora Komitato el Roterdamo publikigas unuan komunikon, subskribitan de k-do Bas Wels, kiu redaktos la gazeton. K-do C. van Essen fariĝas administranto, k-do v. d. Pols kasisto.

La n-ro 483 aperas en Decembro 1939. « Sennacieca Revuo » estas ĉesigita. Sed sesa volumo de la Romanserio eliris : « La Senlingvulo » (Korolenko). Kaj ankaŭ « Leteroj de E. Lanti » aperos monaton sekvantan. En Amsterdamo oni planas Duan Romanserion SAT-FLE, kaj fakte la unuaj volumoj (« La Perfido », « Judoj sen Mono », ktp.) komencas aperi, antaŭ ol la militkatastrofo atingas Nederlandon…

En la Februara n-ro (1940) lokiĝas rimarkinda artikolo de k-do Lanti, verkita en Mendoza, Argentinio, en kiu li esprimas sian ĉagrenon scii siajn eŭropajn geamikojn en danĝero. Kaj li daŭrigas :

> *« Certe venos la tempo, kiam la eŭropaj popoloj sentos dolorojn, post la terura ebriiĝo nuntempa, kiu kaŭzas, ke ili buĉas unuj la aliajn kaj detruas siajn riĉaĵojn. Sed la ebrio eble daŭros longe kaj rezultigos neripareblajn difektojn… ».*

En la marta n-ro (1940) la nova PK, laŭ sugesto de la parizaj k-doj, vokas al monofero por « La viktimoj de la milito », koncentrejanoj, finance malfortiĝintaj k-doj ktp. Ĉefe temas pri sendado de la gazeto kaj de libroj, pli malofte pri materiala helpo (nutraĵoj, vestaĵoj).

Lanti montras en artikolo titolita « Trompo, nebulo, ekbrileto » la verajn kaŭzojn – ekonomiajn – de la militoj. Li ankaŭ ne indulgas la moskvajn registojn, majstroj en la arto trompi kaj blufi, helpate de la « marksa dialektiko ».

La aprila n-ro, la lasta, kiu aperas dum la milito – en Majo Nederlando jam estas militscenejo – ne plu estas presita en Bruselo, sed en Hago.

Ankoraŭ diskutas SAT-anoj libere pri aktualaj problemoj ; multaj kuraĝe subtenas la tezon de strikta neŭtraleco rilate la militon ; aliaj asertas, ke nur la venko de l'Brit-Franca ligo garantios la pacon de l'mondo kaj la demokratajn rajtojn.

Lanti finas sian artikolon, antaŭe menciitan, insistante pri la necesego, ke la homeco superregu la naciecon :

> *« Mia migrado tra la mondo estas giganta pruvo pri la reala forto kaj taŭgeco de nia movado. Ekzistas neniu neceso malesperi pri tiu movado, kvankam la milito terure obstaklas ĝin ».*

La Plenumkomitato sendis dokumentojn al Suda Ameriko, por ke ili saviĝu el la katastrofo, kaj por ke la tieaj kamaradoj provu ion fari por SAT dum la eŭropa interbuĉado.

*Perditaj kaj retrovitaj kontaktoj.*

Pri tiu ĉapitro oni trovas kelkajn notojn en la « Manifesto al la Tutmonda SAT-anaro », kiu estas publikigita en julio 1945 de la restariĝinta pariza Plenum-Komitato, inter kiuj troviĝas tri malnovaj pioniroj (Banje, Glodo kaj Piron) ; la tri aliaj estas pli novdataj aktivuloj : Andreo, Dazun kaj Mejer. Ĝi estas la unua vivsigno de l'postmilita epoko, dissendita de SAT-respondeculoj al la anaro tra la mondo. La Manifesto insistas pri la taskoj, la rolo de SAT :

*« ... la statuto de SAT estos pli aktuala ol iam ajn ». – « La milito solvas nenion », konstatos la komitatanoj.*

Kaj la pozitiva tasko unua estas la restarigo de l' kontaktoj intermembraj. Kotizo estas fiksita por la diversaj landoj. Listo de landaj perantoj estas konigata.

Sur la tria paĝo de tiu kvarpaĝa folio ni informiĝas pri la SAT-historio dummilita, post la germana invado en Nederlandon, Belgion kaj Francion… Fakte dum la tuta milito kamaradoj en Francio daŭrigis kotizi al SAT ; la sumoj estis enkasigitaj ; ĉiusabate kelkaj aktivuloj deĵoris en la oficejo pariza, kaj aliaj venis tien vizite. Banje revenis Parizon en Septembro 1942 kaj denove administris. Komence de 1943 aperis hektografa « letero » dissendita al ĉiuj poŝte trafeblaj SAT-anoj. Aperis sep numeroj du- aŭ kvar-paĝaj, sub formo de privata korespondado por trompi la policon. La kontakto kun Lanti kaj multaj aliaj nefrancianoj estis rompita post 1941. Sed usonaj kaj britiaj kamaradoj informis la parizajn pri la pli malpli bona farto de la gvidinto de SAT en Meksikio.

Ekde Septembro 1944 la pariza Centro reprenis sian komunikadon kun kamaradoj el multaj eŭropaj landoj kaj el Usono. En tiu monato la « Letero » fariĝis monata « Bulteno de la SAT-Amikaro », hektografita, sespaĝa. Tiu propagandilo por SAT portis fruktojn : en nura Francio estas registritaj 400 aliĝoj por la jaro 1945 (pli ol antaŭ la milito). Tiuj 400 anoj venis memvole, memdecide, plenkonscie.

Decas ĉi tie rimarkigi, ke la daŭrado, la kontinueco, la stabileco de SAT estas ŝuldata grandparte al la harmonio, kiu ĉiam regis inter la respondeculoj ĉe la Centro, – al tio, ke ili estis animataj ne de profitemo, sed de idealismo, – ankaŭ al tio, ke la origina principaro de l'Asocio alportis al la laboristoj ion esence *novan*.

*Reaperas monata organo ekde Januaro 1946.*

La unua numero, kiu eliras en Januaro, estas 4-paĝa « SAT-Bulteno » ; modesta folieto, kiun ni svingis triumfe en niaj manoj : palpebla pruvo pri la renaskiĝo ! … Redaktoroj estas k-doj Banje kaj B. Vels (Wels), la unua en Parizo, la dua en Roterdamo. La Plenum-Komitato povas sciigi, ke ĝia agado dummilita estas aprobita de kvar LEA-oj (Sveda, Nederlanda, SAT en Britio kaj SAT-Amikaro en Francio), kiuj decidas plue amike rilati kun SAT laŭ spirito kaj litero de la Gotenburga Konvencio el la jaro 1928. La PK konfirmas en sia Deklaro la ĝisnunajn principojn de la Asocio kaj citas larĝe la Statuton (paragrafo pri la Celo). Estas komuniko pri la elsaviĝo de Bartelmes el la katastrofo.

La titolo de la komence kvar-, poste sespaĝa monatgazeto estas provizore « La Kosmopolito ». Nur ekde Julio la gazeto alprenas sian malnovan kaj ŝatatan titolon « Sennaciulo ». Estis diversaj leĝaj malhelpoj por tuj reuzi la malnovan nomon. Plue la paperdemando restas malfacila, kaj la administranto vokas al helpado konstanta per libervolaj kontribuoj de mono.

*Malnovaj demandoj en nova tempo.*

La 19-a Kongreso, kelkajn tagojn antaŭ la mondmilito (Aŭgusto 1939), fondis novan instancon ĉe SAT : la LEA-Komitato de SAT, aparato, kies celo estas : interligi la LEA-ojn subskribintajn la Gotenburgan Konvencion en la kadro de SAT.

> *« Sekve ĝi povos plenumi la 'internacian poresperantan laboron' », konkludas k-do Kruit,*

certigante, ke neniu devas malfide rigardi tiun novan kreaĵon, vidante en ĝi kaŝitan provon ŝanĝi la strukturon de la mond-organizo.

*« Jam la fakto, ke la propono venis el gvidantaj rondoj de FLE en Nederlando kun plena aprobo de ĝia estraro, kiu ja dufoje energie rebatis tiucelajn klopodojn kaj en tiu tempo formis bastionon de SAT, devus esti signo, ke la propono ne kovras insidon ».*

La artikolo, verkita jam en 1940, troviĝas fruntpaĝe en la februara numero de la SAT-organo. – Kaj en la junia n-ro (1946) aperas komuniko pri kunveno en Amsterdamo, de reprezentantoj de la dana, brita, nederlanda kaj sveda LEA-oj kaj de la PK de SAT, por priparoli la organizadon de la LEA-Komitato kaj firmigi ĝian bazon. K-do Kruit estas elektita kiel sekretario.

En la marta n-ro (1946) k-do Lanti leterumas el Meksiko al siaj parizaj amikoj. Oni legas lian bedaŭron esti … ekzilita, jam de preskaŭ kvin jaroj, el Esperantio : precipe en Meksiko tute ne okazas esperantistaj kunvenoj (*), kaj la fondinto de SAT vivas solecan vivon. Li esprimas sian firman konvinkon, post paso de tiu dua mondmilito, ke prava estas la maksimo, kiun li esprimis en la « Manifesto de la Sennaciistoj » : *Klas-* kaj ne *naci-*batalo !

*Morto de k-do Lanti.*

Apenaŭ pasis jaro post apero de tiu Letero … kaj la SAT-anojn frapas, per mallonga komuniko en februara n-ro de « S-ulo » (1947), la sciigo pri memmortigo de k-do Lanti, la 17-an de Januaro 1947, en franca hospitalo de Meksiko ; li aĝis nur 67 jarojn ; liajn suferojn kaŭzis la sekvo de insekta piko el la jaro 1938, kiu provokis tumorojn kaj ĝeneralan kaĥeksion

(*) Nur depost 1951 la grupa vivo esperantista en Meksiko komencis rimarkinde vigliĝi.

(disfalemon). Lanti pendigis sin sur duŝilo super bankuvo en la hospitalo.

La Marta n-ro de « S-ulo » entenas ampleksan nekrologan artikolon subskribitan de liaj plej intimaj kunlaborintoj, Banje, Glodo kaj Bartelmes (*), la aprila n-ro tiun de k-do Varingien, kunaŭtoro de « Plena Vortaro ». Ambaŭ verkaĵoj reliefigas vivon kaj agadon de la fondinto de SAT ; la lasta precipe insistas pri lia trafa verkmaniero, lia bona stilo.

Lanti intencis reveni al Eŭropo, – eble post nelonga restado en Usono, kie k-do Falgier proponis al li loĝadon. Tie en Meksiko mankis al li la pli vasta esperantista medio. Li sentis sin izolita, kaj la fizikaj doloroj grave pliiĝis en la lastaj monatoj. Ĉekapa operacio estis decidita, sed Lanti, unu tagon antaŭe, solvis la problemon per sinmortigo. Li restis ĝislaste en konstanta kontakto skriba kun la parizaj kaj eŭropaj amikoj kaj helpis per siaj konsiloj al la SAT-direktantoj.

*La Laborista Solidareco.*

En aprila n-ro (1946) ni legis, ke svedaj esperantistaj gekamaradoj kolektis monon kaj vestaĵojn por la nederlandaj laborfratoj, esp-istaj. En la maja n-ro sekvis raporto (de k-do Neergaard) pri la « Dana-Nederlanda Esperanto-interhelpo », kiu ekspedis entute 4 617 kg (nete) da varoj al Nederlando.

En Februaro 1947 aperas alvoko de Petro Ĵajer (Jayer), Parizo, por sennacieca solidareco. Per ĝi ni sciiĝas, ke SAT-Amikaro, la franclingva LEA, jam donis gravan ekzemplon tiurilate, dum tuta jaro ekspedinte nutropakojn al Aŭstrio kaj Germanio.

Ekde Junio 1947 tiu Servo transiras en la manojn de k-do R. Bonesper, en Novjorko, kiu kolektadas la monon kaj send-

(*) Vidu la suplementan parton !

adas de tiu tempo, dum jaroj, diversajn nutropakojn, ankaŭ vestojn, al Centra Eŭropo, krome al Bulgario kaj Japanio, kaj fine – en 1951 – al Jugoslavio, – mallonge, ĉie kie urĝa bezono montriĝas. En raporto al la Kongreso de SAT, 1949, Bonesper statistikis la sendon de entute 167 pakoj kun nutraĵo inter Februaro 1948 kaj Februaro 1949, do dum unu sola jaro. Tiuj ciferoj montru la amplekson de tiu helpagado, pri kies efikeco atestas la multnombraj dankleteroj ricevitaj de la prizorgitoj.

La elspezo en tiu sola jaro estis dolaroj 1 237,11. Ne mirige, ke ĝis la dato de l'verkado de tiu ĉi Historio la Servo restas ankoraŭ deficita, t. e. ĝi ŝuldas sumon al la Asocia kaso.

*Problemoj de gvidado kaj redaktado.*

En la februara n-ro 1947 de « S-ulo » iuj Kopenhagaj anoj de SAT, sub iniciato de k-do P. Thorsen, rememorigas, laŭ formo kaj enhavo de siaj kritikoj, bildojn el la skisma periodo inter la du militoj. Tiuj komunist-partianoj ripetas la konatan devizon : « Problemo pri reunuiĝo estas la plej grava. Ni evitu la skismon ». – La Plenum-Komitato respondas, ke la problemo pri Unueco estas antaŭ longe solvita. Ĝi estas solvita de kiam SAT fondiĝis, almenaŭ sur la proleta tereno.

Pasos ankoraŭ preskaŭ du jaroj, ĝis Thorsen kaj liaj dudek sekvantoj definitive konvinkiĝis, ke SAT lernis el la unua skismo kaj ne estas preta disponigi sian dorson por reludi la saman ludon. La areto eksiĝos el la Asocio, por aliĝi al la … neŭtrala esperanto-movado (UEA).

K-do Bartelmes sendis plurajn kunlaboraĵojn al « S-ulo », reveninte sana el la katastrofo al sia nask-urbo Duseldorfo. La unua verketo aperis frontpaĝe en « La Kosmopolito » de Majo 1946 sub titolo « Post la Uragano ». Ĝin sekvas postnoto de la redakcio :

*« ... Ni sopiras je lia reveno al ni, por ke li reprenu la tiom delikatan postenon de redaktoro. Bartelmes estas nek germano, nek franco : li estas unu el la relative nemultaj sennaciuloj nunaj ».*

La administracia laboro ĉe SAT kreskegis ; k-do Banje estas superŝutata de korespondaĵoj el ĉiuj mondpartoj, – signo pri la kreskanta reviglиĝo kaj fortiĝo de la SAT-movado. Precipe multaj estas la leteroj el Germanio, kie la movado rapide restariĝas, dank' al la ekagado de l'veteranoj. Multaj ja transvivis la militon, inter ili ankaŭ gravaj kolektivoj el la iamaj fokusoj de SAT, Lejpcigo kaj Dresdeno, kaj aliaj « transkurtenaj » urboj ; ni citu nur la nomojn Lerĥner (administranto de SAT ĝisj 1933) kaj Kekeric (Köckeritz), kiu lasta transprenas la perantecon por la orienta zono de Germanio, sub rusa okupo.

En Marto 1947 la Plenum-Komitato trovis fine en k-do Kotro (Cottereau) kapablan laborhelpanton konstantan ĉe la Oficejo, kontraŭ salajro.

Kaj ekde Aprilo 1947 « Sennaciulo » regule aperas *ok*-paĝa. Tio estas grava progreso. La eldonkvanto atingis 4 000 ekzemplerojn. Sed la fakto, ke la ĉefa redaktlaboro kaj la definitiva aranĝo de l'numeroj de « S-ulo » estas farataj for de la Sidejo, nome en Roterdamo (fare de k-do Vels), kondukas al incidentoj inter la Plenum-Komitato kaj tiu redaktanto, kiuj trovas eĥon en la kolonoj de la oficiala organo.

Per stranga voko de l'usona kristano J. Sayers, fuŝe lokita kiel ĉefartikolo en la maja numero de « S-ulo » 1947 sub la devizo « For la ĉenojn de la Racio ! », la prireligia debato estas malfermita en la kolonoj de la gazeto, kaj ĝi estas nutrata krome per propono tiurilata de kvar nederlandaj SAT-anoj al la 20-a Kongreso de SAT.

*La unua postmilita SAT-Kongreso en Arhuzo (1947).*

En la Raporto al tiu ĉi 20-a Kongreso de SAT la Plenum-Komitato montras la ankoraŭ regantajn obstaklojn kaj malfacilaĵojn, kiuj baras la liberan vojon al la SAT-laborantoj. La rekontakto kun la anoj en la diversaj landoj okazis nur iom post iom, laŭgrade, la poŝta trafiko enreliĝis, sed ankoraŭ ne estas tute normala.

La Arhuza Kongreso fariĝis neforgesebla travivaĵo por la partoprenintoj : 662 homoj el 9 landoj estis kvazaŭ transportitaj en utopian landon, kie regas konkordo kaj amo, – tiel notas entuziasme la verkinto de l'fruntartikolo en la postkongresa numero. El Centra Eŭropo nur unu reprezentanto pene sukcesis ĉeesti (el Aŭstrio). Mankis tute anoj el Germanio, Italio, Polio, Ĉeĥoslovakio, Balkanaj landoj. La Gvidrezolucio akcentas la sennaciecan karakteron de la Asocio, kiu ne permesas al ĝi

> *« alpreni pozicion en problemo specife nacieca, tamen lasante al ĉiu SAT-ano aparte ĉian liberon por decidi pri sia individua agado ekster la Asocio ».*

La simpation al tiuj, kiuj ne povis veni pro la limbaroj, la Kongreso formulis jene :

> *« ... esprimas sian senrezervan simpation al la fratoj SAT-anoj, kiuj, kvankam jam suferinte kruele sub la faŝista reĝimo, daŭre suferas pro la suspekto devenanta el erara ĝeneraligo koncerne la respondecon pri la milito. Al tiuj malfeliĉaj fratoj, la SAT-anoj en Aarhus premas kore la manon kaj esperas akcepti ilin en la proksima Kongreso ».*

Cetere, sur la praktika tereno, la SAT-karavanoj trapasantaj ire kaj reire Germanion, kunportis pakaĵojn da manĝaĵo kaj

vestaĵo por la tieaj suferantaj kamaradoj. Sinteno eksterordinara en tiu tempo de ŝovinista furiozo, sed kiom SAT-eca !

Post invito al ĉiuj klaskonsciaj laboristoj esperantistaj enviciĝi en SAT, la Kongreso en sia rezolucio

> *« ... deklaras ke SAT denove reprenis sian lokon en decida batalo por la homrajtoj kaj por la libereco de la homaro kontraŭ rasaj, religiaj, imperiismaj kaj lingvaj hegemonioj, kaj kontraŭ la ĉefaj malamikoj de la homaro : ĉiaj faŝismoj, kies ĉieaj krimoj postulis milojn da viktimoj ankaŭ en la esperantistaro. (Ĝi) pretas kontraŭbatali tendencojn fatalismajn, kiuj konsideras novan militon neevitebla... ».*

La Kongreso akceptis per 185 kontraŭ 36 kaj 3 sindetenoj proponon de 4 nederlandaj k-doj (Kruit, v. Haren, v. Essen kaj Vels) komisii al la PK subteni la fondon de « Internacia Centra Komitato », kiu, ne entrudante sin en la internan vivon de la diversaj asocioj kaj ne endanĝerigante la organizan kaj ideologian liberecon de la apartaj grupiĝoj, okupu sin pri tiuj taskoj kaj entreprenoj, kiuj posedas komunan gravecon por ĉiuj esperantistoj, sendepende de ilia politika aŭ religia starpunkto. Kruit klarigas, ke tia partopreno en la kreota Internacia Centra Komitato okazu pere de la LEA-Komitato de SAT.

Propono de la samaj k-doj pri aliĝo de religianoj al SAT estas fine de longa debato, en kiu la kontraŭuloj insistas pri la superflueco de tiu propono, kiu povus nur kuraĝigi religianojn veni al SAT, – akceptata per 96 kontraŭ 94 voĉoj, 20 sindetenoj.

Nur laŭdojn ricevis la loka Kongres-Komitato, kiu perfekte organizis tiun ĉi kongreson kaj kontribuis tiel grave al la harmonia, frateca atmosfero, kiu regis en la unua postmilita manifestacio de SAT.

Cetere okazis ankaŭ pluraj prelegoj en kadro de la Laborista Universitato.

*Periodo de kreskado ; SAT sur la ĝusta vojo.*

En la januara Sennaciulo (1948) k-do v. Essen unuapaĝe komparas en artikolo titolita « Kie troviĝas la veraj Zamenhofanoj ? » la spiriton regintan ĉe nia laborist-esperantista kongreso de SAT en Arhuzo al tiu de la « neŭtralaj » esperantistoj en Berno, kie regis naciismo kaj malamo. « Kiam unu el la germanaj « samideanoj » volis salutparoli en la kongreso, tuj protestis jugoslavaj, polaj kaj palestinaj ĉeestantoj minacante per tuja foriro ».

Bedaŭrinde en la februara « S-ulo » aperas simila atako, naskita el malamo, de pola esperantisto kontraŭ senescepte la tuta germana popolo. Kvankam la redaktoro Vels mem tuj respondas per larĝa enkonduko, tiuj linioj makulas kiel venenaj gutoj la kolonojn de *Sennaciulo.* Luise Karlsson esprimas tion tre nete en la aprila n-ro:

> *« Ŝajnas al mi, – ŝi respondas al St. Dziwlik el Krakovo, – « ke vi per via malamo al ĉiu germano tro multe proksimiĝas al la nazia pensmaniero, kiu kondamnis ĉiun judon ne ĉar li faris malbonaĵon, sed nur ĉar li estas denaska judo ».*

Bartelmes montras per pluraj artikoloj, ideologiaj, nian celon kaj nian taskon : ankri la SAT-spiriton precipe ĉe tiuj multaj novaj membroj, kiuj aliĝis post la milito kaj ne mem travivis en niaj vicoj la periodon inter la du militoj.

La aliĝoj al SAT daŭre plimultiĝas. La Plenum-Komitato vokas al prunto de monsumoj por financi la eldonplanon, unuavice la du volumojn « Leteroj de Zamenhof », kies unua parto jam troviĝas en la presejo ekde Majo 1948.

*La 21-a Kongreso en Amsterdamo (1948).*

La jara raporto de la Plenum-Komitato al tiu ĉi kongreso konstatas membrokreskon kun jenaj komparaj ciferoj :

1939 : 2 002, 1947 : 4 284, 1948 : 4 978.

La progresado estas precipe intensa en Germanio ; sekvas Nederlando.

Sed ekonomie la mondo ne evoluis dum tiuj dekdu monatoj, konstatas la Plenum-Komitato, – « nek la spiritoj ekster la esperantista medio ». Amara konstato, kiu ne lasas kampon al mem-iluziigo kaj blufo ! Jam pluraj monoj suferis devaluon. La Komitato rekomendas la revekon kaj restarigon de la Ĝenerala Konsilantaro, la supera instanco en SAT. La kongreso konsilu referendumon samtempan pri la elektoj de Ĝeneralaj Konsilantoj kaj Plenum-Komitato. Kaj PK liveras la necesajn klarigojn pri la horzona sistemo en SAT (vidu paĝon 151).

1 219 kongresanoj el 16 landoj partoprenas tiun imponan renkontiĝon de SAT-anoj ; ilin salutis la vic-urbestro de Amsterdamo, pluraj sindikat-gvidantoj kaj aliaj eminentaj personoj.

La Gvidrezolucio akcentas la glatan kaj firman kunlaboron inter SAT kaj la LEA-oj ; ĝi bedaŭre konstatas la refojan foreston de kamaradoj el Germanio kaj Aŭstrio (tri kamaradoj germaniaj venis kaŝe, el ili unu el la soveta zono), kaj ĝojas, ke en la kadro de la SAT-kongresoj multaj fakaj kunvenoj sukcese starigis planojn…

Kelkaj diskutparolantoj kritikis la redaktadon de B. Vels, ne tre funde, kiel tiu k-do Kastelejn, kiu rimarkigas, ke unuflanke B.V. asertas, ke la kunlaboraĵoj tiel abundas, ke li ne scias kion elekti, dum aliflanke troviĝas en la gazeto amaso da artikoloj verkitaj de la redaktoro mem. – Vels respondas, tamen ne refutas tiujn kritikojn, kaj la tuta raportaro de la instancoj trovas unuaniman aprobon.

Al tria paragrafo de la Gotenburga Konvencio oni aldonas specialan suplementon, por forigi la malfacilaĵojn rilate eldonadon kaj vendadon.

> *« Sur ia bazo de tia paragrafo povos aperi tri specoj de eldonoj, nome :*
>
> *« 1. Esperanto-eldonoj sub la ŝildo de SAT, eldonitaj de SAT mem ;*
>
> *« 2. Esperanto-eldonoj sub la ŝildo de SAT, elektitaj kaj eldonitaj de LEA-oj post interkonsento kun SAT ;*
>
> *« 3. Esperanto-eldonoj elektitaj kaj eldonitaj de LEA-oj mem, post interkonsento kun SAT ».*
>
> *« La LEA-oj havas konsilan voĉon koncerne la eldonojn de SAT mem, rilate la enhavon kaj teknikan aranĝon. La eldonoj aperos sub kontrolo de Literatura Komitato de SAT. La membroj de tiu ĉi komitato estas elektitaj post konsento de la Plenum-Komitato ».*

Sekve de tiu regulo voĉdonita de la kongreso kaj ankaŭ akceptita voĉdone per la sekvanta tutmembrara referendumo, la Asocio de Lab. Esperantistoj en la nederlandlingva teritorio konfirmis la validecon de la tria paragrafo de la Konvencio por si, en siaj rilatoj kun SAT, kaj konsekvence la ĝistiama Literatura Komitato de FLE transformiĝis en *Literaturan Komitaton* de SAT, kies sekretario fariĝas la lingvosperta k-do F. Faulhaber (Amsterdamo).

La debato pri la venontjara kongresurbo finiĝas per jena voĉdona rezultato : 274 voĉoj por Parizo, 159 por Pilzeno (Ĉeĥoslovakio).

Dum tiu ĉi kongreso en Amsterdamo okazis du prelegoj en la kadro de la Laborista Universitato (pri Bellamy, de k-do v. d. Starre, kaj pri la Ido-krizo, de k-do prof. Varingien). Ekaperis kongresa gazeto « La Voĉo de l'Kongreso », kiu de tiam pluaperados okaze de ĉiuj sekvantaj kongresoj de SAT, kun utilaj informoj por la kongresanoj, praktikaj konsiloj, kongres-programo, ktp.

*Redakcio kaj Gvid-instanco kunigitaj en unu loko.*

Depost la militfino la Komitato klopodis revenigi Bartelmes al Parizo, sed plurfoje fiaskis tiuj klopodoj ĉe la ministeriaj instancoj. Nur sukcesis fine la interveno de k-do Kotro ĉe konato sidanta en la « ĝusta » instanco. Kaj tiun intervenon faris k-do Kotro malgraŭ la certeco, ke la reveno de Bartelmes signifas por li, Kotro, maldungon ĉe SAT (kie li estis salajrata oficisto de 1947). Li ja bone sciis, ke la financaj rimedoj de SAT ne permesus pagi du salajrojn. Post tio Kotro daŭre ankoraŭ helpadas ĉe la SAT-sidejo, en vesperaj horoj, senpage.

Dum la PK-anoj kunsidis en Amsterdamo, Bartelmes troviĝis survoje al Parizo, 17 tagojn en transira kampejo retenata apud la landlimo por plej detala kontrolo pri « indeco » reveni Francion. La Plenum-Komitato konfidas al la malnova ĝis-milita redaktoro de la SAT-gazetoj, longjara kunlaboranto de k-do Lanti ĉe la redakcio, la salajratan oficon ĉe la Sidejo, kiel sekretario kaj redaktoro. La PK profitas la okazon por mal-aperigi la du-redaktorecon de « S-ulo » (Banje-B. Vels), kiu ne funkciis kontentige pro la loka disigiteco inter PK kaj ĉefa redaktoro. K-do Banje rezignas tuj post reveno de Bartelmes, B. Vels fine de la jaro, post insista deziresprimo de la PK. Ekde januaro 1949 N. Bartelmes sola respondecas pri la redakta

laboro, apogante sin, en malfacilaj kazoj, sur la konsiloj kaj rekomendoj de la PK-anoj, kun kiuj li konstante rilatas.

Cetere k-do Vels montris sin en la sekvantaj jaroj daŭra kunlaboranto al Sennaciulo, per plej diversaspecaj artikoloj.

*Novaj libroj ĉe SAT.*

La malnova librostoko konsiderinde reduktiĝas de jaro al jaro, almenaŭ kio koncernas la facile legeblajn kaj ĉiam aktualajn eldonaĵojn. Kelkaj verketoj ja apenaŭ estas dezirataj (kiel « Prologo », « Poemo de l'Plugisto » aŭ « La Profeto »), kvankam ilia literatura valoro estas nekontestebla. Libroj el la Romanserio kaj « Jimmie Higgins » plej rapide elvendiĝas. Necesas pensi pri renovigo de la stoko, per novaj eldonoj. Sed ve ! tio postulas gravajn mon-investojn. Nu, antaŭ la fino de 1948 la financa povo de SAT permesas al ĝi aperigi la unuan volumon de « Leteroj de L. L. Zamenhof », dokumentoriĉa, grandioza verko kompilita kaj komentita de profesoro Varingien, ano de SAT. La libro trovas konsiderindan eĥon en la esperanto-gazetaro tra la mondo kaj grave kontribuas levi la prestiĝon de SAT. La recenzoj estas unuanime laŭdaj kaj aprobaj. Ekzemple en « The British Esperantist » (Novembro-Decembro 1949) ni legas pri la libro jenan konkludan prijuĝon :

> *« Ĉi tiu leterkolekto – grava fonto por la estonta studanto de la movado kaj de la lingvo mem – certe reprezentas tre longan kaj konsciencan laboron fare de Waringhien, al kiu ĉiu serioza Esperantisto sentos profundan dankon. La verko nepre trovos sian lokon inter la gravaj referenclibroj ».*

La libro estas tre zorge presita, kaj ĝia aranĝo estas tiel farita, ke oni facile trovas la opinion de Zamenhof pri ĉiaj

demandoj. Sed precipe speguliĝas en tiuj Leteroj liaj personaj rilatoj kun la francaj gvidantoj de la unua-epoka Movado, liaj spertoj ofte malĝojigaj, eĉ tragediaj.

La dua volumo, jaron poste, sekvas la unuan : same ampleksa, same enhavoriĉa kaj instrua.

En 1949 Ziegler-eldonejo en Munkeno aperigas la duan eldonon de « Faŭsto I » (Goethe, traduko de N. Bartelmes), en luksa vestaĵo, reviziita ; SAT havas la vendmonopolon por la merkato ekster Germanio. Same kiel por la unua eldono (SAT, 1923), oni devas kalkuli longan periodon por la disvendado de la stoko, ĉar kvankam populara klasika libro, ĝia versa formo, la simbolaj aludoj, la cerbostreĉa filozofia parto, postulas de la leganto plenan posedon de la lingvo kaj altan spiritan nivelon.

Fine, samjare, en Julio, aperas ĉe SAT« Roza Luksemburg » de Henrieta Roland-Holsto, traduko de Vels, – interesa, valora biografio pri tiu socialistino-pensulino pereinta en la perturboj, kiuj sekvis la unuan mondmiliton.

*La Akademio de Esperanto ricevas proteston.*

Dum la eldon-agado de SAT estas rimarkinda, la Akademio, oficiala instanco de la esperanto-movado, prisilentas nian Asocion en siaj komunikoj, en kiuj UEA havas mencion, okaze de la restarigo de tiu ĉi organismo. Ĉiam la SAT-gvidantoj akcentis, ke sur la *lingva tereno* kunlaboro kun la neŭtraluloj estas utila, eĉ necesa. Kaj kiam la movado floris en Sovetio, tie estis elektitaj pluraj membroj de SAT kiel lingvo-komitatanoj (nunaj akademianoj). Ankoraŭ en la nuna tempo pluraj SAT-anoj (Waringhien, Neergaard) estas akademianoj, tamen ne oficiale delegitaj de SAT al tiu ĉi instanco.

Okaze de la reorganizo de la instanco, SAT oficiale decidas prezenti du kandidatojn (Bartelmes, Faulhaber) ; krome kan-

didatas k-do Degenkamp, por la nederlanda LEA. Pro la malmultigo de la kandidatnombro, laŭ la nova regularo, kaj novelekto de nur 21 kandidatoj el tuta nombro de 47, ĉiuj tri kandidatoj nomitaj malsukcesas. En la pariza kongreso k-do Kruit estigas debaton pri tiu ĉi sinteno de la Akademio, kiu finiĝas per la akcepto de Rezolucio, en kiu la kongreso konstatas la fakton, ke la

> *« nuntempa pozicio de la ĵus restarigita Akademio (antaŭa Lingva Komitato kaj Akademio) en la Esperanta movado ne estas kontentiga laŭ organiza vidpunkto kaj opinias tial necesa doni al ĝi pli firman kaj regulan bazon. Plie ĝi konstatas malaprobe, ke plimulto el la nunaj Akademianoj miope kontraŭas la eniron de kompetentuloj el la Laborista Esperanto-Movado en tiun organismon, kio nepre malutilos al la prestiĝo de la oficiala lingva instanco de la Movado kaj endanĝerigas ĝian ĝeneralan kaj pure lingvan karakteron ».*

La prezidanto de la Akademio ne baldaŭ reagis rilate al tiu klara opini-esprimo. Fine li insistis pri la reguleco de la elektoj faritaj kaj pri sia persona malkompetento interveni en la solvo de tiu konflikto.

*La 22-a SAT-Kongreso en Parizo (1949).*

Partoprenas tiun plej grandan SAT-kongreson 1 385 kongresanoj el 15 nacioj (1 630 personoj enskribiĝis) ; inter ili estis ĉ. 30 germanoj kaj 27 aŭstroj. La ĉeesto de l'germanaj kamaradoj estis oficiala, ne kaŝita kiel en Amsterdamo, kie la tri partoprenantoj devis gardi la anonimecon. Okaze de la urbdoma akcepto germana reprezentanto ricevis oficialan priatenton, – unuafoje depost la milito en tiu ĉi domo, – kiel la reprezentantoj de aliaj naciaj lingvogrupoj.

La ĉeĥaj amikoj ne ricevis la vojaĝpermeson, ĉefe pro la intrigoj de la neŭtralulo Malik, prezidanto de la Ĉeĥa Esperanto-Asocio, kiu persone sukcesis eksterlandiĝi por partopreni la neŭtralan esperanto-kongreson en Burnemuto (Bournemouth) !

Preskaŭ l00 deĵorantoj estis necesaj por certigi la glatan funkciadon de la organizaj aranĝoj. Dank' al komuna loĝado kaj manĝado, en liceoj, kunlabore kun la Edukministerio, tiuj organizaj problemoj solviĝis por ĉies kontentigo. Nur la fakto, ke tro da personoj venis kiel gastoj, kun turisma celo, kelkaj eĉ ne parolantaj esperanton, sed pezantaj sur la servoj de l'organiza komitato, sentiĝis kiel netolereblaĵo. Tial estis starigata propono pri Kongresa Regularo, kiu difinas la kategoriojn de personoj, kiuj rajtas ĉeesti kaj ĝui la organizajn avantaĝojn de l'SAT-kongresoj. La granda plimulto akceptis, en Torino (1950), tiujn proponojn, kiuj celas konservi al niaj kongresoj la pure esperantistan kaj SAT-ecan karakteron.

K-do Banje en enkonduka parolado difinis denove la taskojn de SAT en la formado de nova socio, parolis pri ĝia agado en tutplaneda skalo. Okaze de l'debato pri la redaktora raporto leviĝas plendoj de anoj de la « popoldemokratia » ideologio pri pluraj artikoloj aperintaj, malfavoraj al tiu sistemo de regado. Sed fine la tuta raportaro de la Plenum-Komitato, inkluzive tiun de la redakcio, estas akceptita per 350 voĉoj kontraŭ 1, kaj 6 sindetenoj.

Inter la proponoj estas akceptita tiu pri deviga skriba Aliĝdeklaro post lego de la statuto, por gardi la *kvaliton* de la anaro kaj konsciecon. La Kongreso akceptis tiun regulon kontraŭ malplimulto.

Kvar prelegoj kaj tri komunaj debatoj riĉigis la kongresprogramon. Ili okazis pri la plej variaj temoj, kaj precipe la

debato pri koloniismo distingiĝis per alta nivelo kaj multnombra partopreno, precipe de junuloj.

La Gvidrezolucio komisias al la PK :

> *« zorgi pri tio, ke nia Asocio malgraŭ ĉiuj eksteraj obstakloj rezultantaj de la politikaj kaj sociaj situacioj, daŭrigu firme kaj neŝanceliĝe la klopodojn disvastigi la SAT-ideojn tra ĉiuj zonoj de la terglobo, sendepende de la karaktero de la aktualaj reĝimoj ».*

*Niaj rilatoj al la neŭtrala movado.*

En la antaŭmilita movado, staranta ĉiam sub la signo de la fonda devizo « For la neŭtralismon ! », ofte Lanti mem aŭ aliaj membroj el la unuaj jaroj de la asocia vivo formulis en la oficiala gazeto sian starpunkton, agitante por la absoluta memstareco kaj originaleco de nia organizo.

Ankoraŭ en la jaro 1929 Lanti povis esprimi en la gazeto tiel sian vidpunkton : « Ĉiu ero da energio, ĉiu monero elspezata por la neŭtrala esperanta movado signifas samproporcian perfidon al la SAT-movado ». Tiun sufiĉe drastan sentencon represigis k-do Bartelmes en Sennaciulo de Novembro 1949. Ĝi elvokis proksimume dudek kritikojn el inter la SAT-membroj mem, eĉ inter malnovaj anoj. Montriĝis, ke en la spiritoj de iuj homoj okazis ŝanĝoj, certe ne senkaŭzaj. Restis rezervita al k-do R. Laval, demonstri en la januara numero (1950) de Sennaciulo la tuŝpunktojn kaj la esencajn diferencojn inter UEA kaj SAT. Li montris, ke la klasa kriterio ne plu estas la decida, ĉar tiel en SAT kiel en UEA troviĝas salajruloj. La nuntempa kriterio (distingo) troviĝas en la respektivaj titoloj de la du asocioj ; ambaŭ estas tutmondaj, sed unu rutine baziĝas sur la arkaika strukturo nacieca, – la alia pionire organiziĝis kaj aktivas sur fundamento pure sennacieca.

*« Ne ĉiuj SAT-anoj estas sennaciistoj ... Sed tre verŝajne ĉiuj nepre volas konservi la sennaciecan strukturon de nia asocio, kaj kredeble ĉiuj rigardas kiel plene konforman al ĝia karaktero la moton : « SAT-anoj kutimiĝu al eksternacia sent-, pens- agadkapablo ». Tiurilate SAT neniam kaj neniel deflankiĝis… Dume, UEA tiurilate tre evoluis ».*

(Li montras la historian vojon de UEA, ĝian transformiĝon en internacion, IEL, la malaperon de ĝia sub Hodler akceptita sennacieca strukturo kaj de la responda spirito).

Laval konkludas tiele :

*« Ni ne deziras delogi de UEA ĝiajn membrojn. Kelkajn el ili ni eĉ tre volonte al ĝi lasas. Sed ni pretendas : ĉiu esperantisto, kiu estas nek ŝovinisto, nek absolutisto, nek ekspluatisto, – kiu estas liberama, liberpensema, tolerema, – kiu konscias, ke la nuna « sociordo » fakte estas perforta malordo, kaj sopiras al vere homeca socio, – kiu ankaŭ sopiras al sincera neŭtraleco, intergenta kaj intertendenca : tiu sin deturnu de la neŭtralismo, kiu pli kaj pli aspektas kiel karikaturo de tiu vera neŭtraleco kaj venu al ni, ĉar inter ni, en SAT, estas lia loko. Tiu aŭdu la daŭre validan vokon : For la Neŭtralismon !... ».*

La neŭtrala gazetaro reagis tre pikite, tute male al ĝia sinteno de 1929, kiam ĝi ignoris nian movadon. Hodiaŭ temis pri asocio, kiu kapablis organizi kongreson kun preskaŭ 1 400 partoprenantoj kaj kiu ĝuas la estimon eĉ inter anoj de aliaj esperanto-asocioj. UEA-estraranoj kredis trovi en la sinsekvo de tiuj presitaĵoj, en la sentenco de l’novembra n-ro, en la artikoloj de Laval (Januaro kaj Marto) kaj tiu de Glodo (Marto), plane aranĝitan atakon kontraŭ la neŭtrala esperantismo !

Tial en la aprila n-ro (1950) aperas deklaro de la Plenum-Komitato, ke la nomitaj artikoloj volas nur montri objektive, per cito de faktoj, per referencoj, la netan diferencon, kiu distingigas la du movadojn. Ili ne celas subfosi la pozicion de la neŭtrala esperanto-movado.

*Profesianoj en Fakoj.*

Post la milito la disvolviĝo de esperantistaj fak-organizoj profesiaj atingis altan stadion. Korporacia spirito superregas en tiuj fakoj, spirito kiu iafoje forgesigas al la anoj la neceson de tutlaboristara kooperado. Multaj el tiuj fak-organizitoj (fervojistoj, grafikistoj, maristoj, instruistoj, poŝtistoj) ne trovas la vojon al SAT, komuna organizo de ĉiuj laboristaj esperantistoj.

La Torina Kongreso (1950) unuafoje, laŭ propono de Lionaj kamaradoj, traktis tiun ĉi problemon, sen trovi por la praktiko tuj-ireblan vojon, sed rekomendante plifortigon de la faka aktiveco en la kadro de SAT.

Aliaj fakoj stariĝis kaj stariĝas interne de SAT, laŭ komunaj inklinoj, sendepende de metia kunaparteneco : Junuloj havas sian viglan kaj progresantan Fakon en SAT. Inter la du militoj vegetaranoj, sportuloj, radio-amatoroj, studentoj kaj diversaj aliaj sam-interesitoj funkciigis sian fakon. Restarigon de l'SAT-fakoj en granda nombro subtenas la gvidinstancoj, ĉar tiuj organismoj alportas nutran substancon al la tuta korpo.

*La 23-a Kongreso de SAT en Torino (1950).*

Jam pli forte sentiĝas la signoj de ekonomia krizo kaj de malfortiĝo de la intereso por kulturaj movadoj. La membrostato havas regresan tendencon. En Julio 1949 ni registris

5 134 membrojn, en Julio 1950 nur 4 623 ; la regreso rilatas precipe (proporcie) al Danio kaj Ĉeĥoslovakio, sed ankaŭ en Nederlando kaj Germanio ĝi estas perceptebla. – La Ĝenerala Konsilantaro komencis normale funkcii, helpante al la PK per konsiloj. Malgraŭ la ekonomiaj malfaciloj la deziro ekzistas reaperigi la malnovan, ampleksan « Sennacieca Revuo », se eĉ nur per dumonataj kajeroj. Estas decidite enketi pri tio okaze de « ĝenerala membrara referendumo ». Unu bela libro pliriĉigas la kolekton de SAT-eldonoj : « La nuna stato de l'Evoluismo » de J. Rostand.

Al Torino venas nur 290 gekamaradoj el dek-unu landoj ; la longa distanco malebligas al multaj ĉeesti tiun kongreson. Tamen la propaganda efiko estas grava ; la kongresejo estas la Madam-palaco en la urbocentro. La sekvaj rezultoj, multnombraj aliĝoj, montris, ke SAT-kongreso en Italio fariĝis absolute necesa. Ja SAT tie ne plu ekzistis de la jaro 1923.

La Urbo oficiale akceptis la kongresanojn. En la kvar laborkunsidoj oni traktis la Raportaron de la Plenum-Komitato kaj aliaj instancoj, kaj la proponojn. Leviĝas kiel en preskaŭ ĉiu kongreso la jam kutimaj kritikoj rilate tendencajn artikolojn en *Sennaciulo*. Ja estas malfacilege teni la ekvilibron en super- kaj divers-tendencana organizo. Ankaŭ pri la drasta agitvorto rilate subtenon al la neŭtrala esperanto-movado (sentenco de Lanti el la jaro 1929) oni aŭdas eĥon en la kongreso, kaj la redaktoro promesas eviti estonte tiajn ŝokajn esprimojn, kiaj « perfido ». La raportoj trovas unuaniman akcepton.

La *Literatura Komitato* de SAT defendas siajn rajtojn kiel kontrol-organo kaj sian, cetere de longa tempo establitan, reputacion.

La *Koresponda Servo* de SAT, relative novdata fondaĵo, centrigita en la manoj de k-do Bitzer, Munkeno, laŭ la plimulto

de la diskutantoj ne sufiĉe kontentige solvas la problemon pri interkorespondado. Tamen, ĉe la fino de la debato, oni rekomendas ĝin paralele kun la anoncetoj en *Sennaciulo.*

Ĉirkaŭ *regularo pri aliĝoj al SAT-kongresoj* la debato estas aparte vigla kaj kontraŭeca. Sed fine granda plimulto troviĝas por akcepti la tutan paragrafon. Estos de nun malfacile por ne-




esperantistoj profiti el la avantaĝoj, kiujn donas la kongres-karavanoj al SAT-anoj kaj esperanton parolantaj gastoj. Niaj infanoj ne pagos kongreskotizon.

Por 1951 Stokholmo estas elektita kiel kongres-urbo, kaj principe la kongresanoj esprimas sian preferon kunveni en 1952 en Centra Eŭropo, anstataŭ duan fojon en Arhuzo, al kiu nordlanda urbo invitas la loka SAT-Rondo subtenata de la urbestro.

La Gvidrezolucio de la 23-a Kongreso substrekas :

*« vid-al-vide de nova militdanĝero en la mondo, la voton de la SAT-anaro persisti en sia kleriga kaj kultura tasko, ne influate de partitendencaj konsideroj, spite ĉiujn obstaklojn kaj malfacilojn, – petas ĉiujn SAT-anojn en la mondo, meti siajn fortojn senlace je la servo de raciaj ideoj, kies dis-volvon akcelas la konstanta uzado de esperanto, por mal-helpi, sur la spirita kampo, la detruajn efikojn de la Naci-ismo furiozanta ankoraŭ en la nuna tempo kun granda intenso kaj minacanta la homaron per novaj katastrofoj, ĉu lokaj konfliktoj, ĉu mondvastaj militoj... ».*

*Tridek Jarojn SAT-Movado.*

La 24-a Kongreso de SAT en Stokholmo, 28-a Julio ĝis 3-a Aŭgusto 1951, memoras en brila aranĝo la tridekjaran ekziston de SAT. Ĝin partoprenas 584 gekamaradoj el 12 landoj (aliĝis 680 el 15 landoj). Oni povas konsideri tiun ĉi kongreson, per-fekte organizitan, kiel indan posteulon de la antaŭirintaj. La atmosfero estas harmonia kaj la SAT-spirito regis en koroj kaj cerboj. Tiun impreson akiris ankaŭ la ĵurnalistoj, kiuj liveris al siaj gazetoj longajn raportojn. La Kongreso montris la volon de ĉiuj, ankaŭ en malfacila tempo kiel la nuna, eltenadi, ne ŝan-celiĝi en la celado al pli bona, pli hominda soci-aranĝo kaj sennacieca kulturo.

Tri prelegoj riĉigis la kongresprogramon : de k-do Szilagi pri moderna sveda literatur-evoluo, de k-do Faulhaber pri la taskoj de Literatura Komitato de SAT kaj de k-do Bartelmes pri « Fluoj kaj refluoj en la Historio de SAT ». Unu debato, pri la sindikatoj en la batalo por la mondpaco trovas grandan intereson pro sia aktualeco, kaj ĝiaj ideoj, zorgi pri kunagado de ĉiuj sindikataj movadoj cele al konservado de la mondpaco, speguliĝas en la Gvidrezolucio de tiu ĉi kongreso.

Akceptita estis unuanime la invito de *Duseldorfo* kiel urbo de la 25-a, jubilea Kongreso de la Asocio. Unuafoje SAT ree kongresos en Germanio, depost la jaro 1932. Laŭ ĉiuj antaŭvidoj ĝi estos reliefa kongreso. La *Junulfako* de SAT, montrante novan ekvigliĝon, preparas por la postkongresaj tagoj *renkontiĝon* proksime de Duseldorfo, en Ratingeno.

*
* *

En Aŭgusto 1951 aperas sur la esperantista libromerkato la Lanti-a « Manifesto de la sennaciistoj », dua eldono, broŝuro ampleksigita per multaj aliaj dokumentoj pri Sennaciismo. La unuajn ekzemplerojn oni disvendis okaze de la Stokholma kongreso. Dank' al esperanto kaj SAT tiel la tute novaj ideoj pri planeda unueco estas konigataj al la homoj de nia epoko.

*La jaro 1952.*

Alian gravan iniciaton entreprenis SAT, reaperigante « Sennacieca Revuo », provizore kiel jaran kajeron 60-paĝan, ilustritan kaj varian laŭ enhavo, kun verkoj permesantaj akiri imagon pri la kultura kaj socia vivo de nia generacio. La unua

kajero trovis gravan sukceson, kaj la sekvonta numero estas certigita por la jaro 1953.

*La Duseldorfa SAT-Kongreso*, en Aŭgusto, kunvenigis preskaŭ 700 gekamaradojn el 11 nacioj, inter ili eĉ po unu k-do el Usono kaj el Hispanio. Aliaj devis rezigni, ĉu pro valuta malriĉeco (aŭstroj, finoj), ĉu pro la fera limkurteno oriente. La Kongreso distingiĝis precipe per la granda, eĉ rekorda nombro de prelegoj (1) ; ĝi similis siajn antaŭulojn per la bona, harmonia atmosfero reganta dum ĉiuj manifestacioj, kunvenoj kaj ekskursoj, kaj la fruktodona interŝanĝo de ideoj. La Junularo kunvenis 40-ope tutan semajnon en junulara gastejo proksime de la kongres-urbo. Ankaŭ tie okazis pluraj prelegoj.

Ĉe la fino de la jaro ni funebras pri unu el niaj plej aktivaj kamaradoj, Ludoviko *Glodo*, unu el la starigintoj de SAT, konstanta konstruinto ĉe la SAT-fondaĵo, kies valorajn konsilojn Lanti multe atentis. Li mortis la 13-an de Novembro, sekve de kancera operacio, kiu okazis malmultajn tagojn antaŭ la 25-a Kongreso, al kiu li preparis sin partopreni kun Glodino, lia meritplena kunulino. K-do Glodo alportis al tiu ĉi verketo siajn brikojn, kaj precipe estas li, kiu insistis pri la integra publikigo de kelkaj bazaj dokumentoj el la fonda periodo de la Asocio.

La rompo kun la kolektivo en Ĉeĥoslovakio fariĝis definitiva. Malofte ekzemplero de « Sennaciulo » atingas kamaradon en tiu regno ; evidente oni denuncis la « kosmopolitecon » de SAT al la regaj instancoj, kaj niaj eldonoj troviĝas sur la nigra listo. La « kosmopolita ideo » ja estas speciale kondamnata kaj persekutata en Sovetio kaj ĝia influsfero.

Tiu forbaro de grava esperantista kolektivo el la ekstera universo, kaj precipe la disigo de la tieaj SAT-anoj disde iliaj

(1) K-doj Varingien, Laurat, M. Starr, Bartelmes, Jacobsen, v. d. Starre prelegas oficiale, krome k-doj Nölle kaj Thimm antaŭ elektita cirklo.

fratoj tra la mondo estas doloriga bato, aparte por tiuj rezistemaj kamaradoj en tiu lando, kiuj dediĉis sian idealismon al esperanto kaj al la SAT-ideoj.

*
* *

Ĉi tie haltas la plumo de la historiisto. Ĝuste ĉe la sojlo de la kvara jardeko de tiu Asocio, kies tri komencliteroj, en la mallongigo SAT, inspiras al ĉiu esperantisto en la mondo senton de respekto, de estimo, de entuziasmo, aŭ… de timo, ĉagreniĝo, eĉ iranta ĝis malamo en kelkaj apartaj kazoj. Tio montras, ke SAT estas batal-organizo. Batalante ĝi malfermis al si sian vojon, batalante ĝi konkeris la pozicion, kiun ĝi nun tenas, por pli kaj pli efike vulgarigi siajn ideojn, penetrigi sian spiriton en la mondon sennaciiĝontan.

*ANEKSAĴOJ (Historio de SAT).*

## La Plenum-Komitatoj de SAT de 1921-1951

1921 : Iniciatora Komitato: k-doj Bannier, Coldefy, Glodo, Lanti, Migny, Piron, k-dino Besnard.

1923 : Direkta Komitato (administra), en Parizo : k-doj Bannier, Glodo, Lanti, Mader, Migny ; en Leipzig : k-do Lerchner.

1924 : Same, en Parizo : k-doj Bannier, Glodo, Lanti, Piron, Migny, k-dino Noël; en Leipzig : k-do Lerchner.

1925 : Ekzekutiva Komisiono : en Parizo – k-doj Bannier, Glodo, Lanti, Piron, Migny, k-dino Noël ; en Leipzig : Lerchner.

1926 : Ekzekutiva Komitato : en Parizo – k-doj Bannier, Glodo, Lanti, C. Roux, k-ino Noël ; en Leipzig : Lerchner, Richter, en Moskvo : Nekrasov.

1927 : Ekzekutiva Komitato : en Parizo : k-doj Bannier, Cachon, Glodo, Lanti, C. Roux ; en Leipzig : Lerchner, Richter ; en Moskvo : Nekrasov.

1928 : Ekzekutiva Komitato : *Direkcio :* k-doj Bannier, Cachon, Glodo, Lanti. *Ceteraj membroj :* Lerchner, Richter, Nekrasov.

1929/30 : Plenum-Komitato : *Direkcio :* k-doj Bannier, Bartelmes, Cachon, Dessoit, Glodo, Lanti. *Ceteraj membroj :* Bäsler, Lerchner, Demidjuk, Rublov, H. Stay.

1932 : Plenum-Komitato : *Direkcio :* k-doj Bannier, Bartelmes, Cachon, Devarennes, Glodo, Lanti. *Ceteraj membroj :* Lerchner, Stay.

1933/34 : Plenum-Komitato : k-doj Bannier, Barow, Bartelmes, Bubo, Devarennes, Platiel.

1935 : Plenum-Komitato : k-doj Bannier, Barow, Bartelmes, Bubo, Glodo, Platiel.

1936/37 : P.-K. : k-doj Avid, Bannier, Barow, Bartelmes, Glodo, Piron.

1938/39 : P.-K. : k-doj Avid, Bannier, Barow, Bartelmes, Glodo, Piron.

1940 : P.-K. en Roterdamo : k-doj v. Essen, v. d. Pols. Wels, Prent-Moon, Vollegraaf k. Koppejan.

1945/46 : P.-K. en Parizo : k-doj Andreo, Bannier, Dazun, Glodo, Meyer, Piron.

1947/48 : P.-K. : k-doj Andreo, Bannier, Glodo, Meyer, Piron.

1949 : P.-K. : k-doj Bannier, Cuisinier, Glodo, Michaud, Piron, k-dino Dazun

1950 : P.-K. : k-doj Bannier, Cuisinier, Glodo, Ĝumakov, Piron, k-dino Dazun.

1951 : P.-K. : k-doj Bannier, Cuisinier, Glodo, Piron, k-dino Dazun

## Kreo de sennacieca Himno

Ekde la momento, en kiu SAT apartiĝis de la ĝenerala esperanto-movado, estis sentata la bezono je propraj kantoj, eĉ propra Himno, kiu povus esti kantata en SAT-kongresoj kaj SAT-kunvenoj je la loko de la pure verda himno « La Espero ». Ĝenerale oni kantis dum la Kongresoj de SAT en tiu tempo « Fratoj al Sun' » tradukita de Raŭŝenbaĥ, kaj ekde 1924 « La Internacio »-n en la tre bona, per konkurso elektita traduko de k-do Zilberfarb el Ĥarkovo. Ĝia teksto aperis en la jarlibroj ekde 1924 ; ĝi aperis ankaŭ en « Proletaria Kantaro », tiu ĉi riĉa kolekto da socialistaj batalkantoj, kiu bedaŭrinde ne estis presata duan fojon, pro perdiĝo de la muzik-kliŝoj en Lejpcigo.

Nur en 1939 la Plenum-Komitato de SAT okupis sin denove pri tiu manko de SAT-himno, kaj la redaktoro vokis al konkur-verkado en la marta numero 1939 de « Sennacieca Revuo ». En la maja n-ro aperis du projektoj, el kiuj almenaŭ la unua, verkita kaj komponita de du k-doj en Roterdamo, meritus esti akceptata de la SAT-anaro por ĝenerala uzo. Nu, la milito baris al la realigo baldaŭa de tiu ĉi projekto. Kaj nur post jaroj oni reekzamenis la demandon, sen trovi jam la efektivigon.

Ĉi tie sekvas la proponita Himno verkita de k-do L. C. Deij, kun muziko de k-do V. Geurtz.

SAT posedas ankaŭ sian propran insignon : verda stelo sur blanka fono kun ruĝa rando, sur kiu estas legeblaj la vortoj SAT kaj ESPERANTO. Tiu ĉi insigno estis kreita post pluraj provoj de aliaj modeloj, kiuj ne kontentigis pro diversaj kialoj.

La nun portata insigno disvastiĝis tra la tuta mondo, kie ajn vivas SAT-anoj.




La standardo de SAT, videbla ĉe niaj kongresoj, konsistas en ruĝkolora tuko, en kies supra maldekstra angulo troviĝas la verda stelo sur blanka kvadrato.

## La Propagandaj Asocioj Laborist-Esperantistaj (*)

La unuaj laboristaj esperanto-grupoj en la mondo stariĝis diverslande inter 1905-1910. El ili evoluis la tiel nomataj Laboristaj Esperanto-Asocioj (mallonge : LEA-oj).

En *AŬSTRIO* ekstaris en 1922 « Aŭstra Laborista Ligo », kiu nomiĝis ekde 1924, post reorganizo, « Aŭstra Laborista Ligo Esperantista » (ALLE ); estis preskaŭ ekskluzive socialist-tendenca kaj neniam akceptis la Gotenburgan Konvencion kun SAT. De 1926 ĝi eldonis propran organon « La socialisto ». En fino de 1932 ĝi nombris 53 grupojn kun 1 746 anoj. Postmilite la laborista alo formas nur sekcion en la kadro de la *Aŭstria Esperanto-Societo.* Multajn malnovajn aktivulojn retrovas la renaskiĝanta SAT-movado, apud kelkaj novaj kamaradoj, inter kiuj lastaj rekrutiĝas la nuna SAT-peranto landa, k-do d-ro Karner.

En *BRITIO* la laborista esperanto-movado ĉiam estis malforta ; stariĝis tie, en 1907, unue la centra organizo « BLES », kaj nur poste lokaj grupoj (inverse kiel en aliaj landoj !). Ĝi restariĝis tuj post la unua granda milito, en 1920, kaj nomŝanĝis je Brita LEA en 1927. Ĝi perdis en 1932 sian superpartiecon, aliĝante al Internacio de Proletaj Esperantistoj. Sekve parto de la membraro grupiĝis en SATEB – tio signifas : « SAT en Britio ». Ĉi tiu reekfunkciis tuj post fino de la dua mondmilito, kun regulaj jarkunvenoj kaj trimonata presita organo « The Worker Esperantist ».

(*) Komparu ankaŭ « G. P. de Bruin, Lab. Esp. Movado antaŭ la mondmilito » kaj « Gvidilo tra la Esp. Movado » (de la sama aŭtoro).

Inter la unuaj aktivuloj precipe elstaras k-do *C. W. SpiIIer,* Londono, kiu cetere ĝis hodiaŭ aktivas en SATEB kaj en SAT. Li multajn jarojn redaktis la organojn de BLES kaj de SATEB kaj kontribuis unuarange al la popularigo de l'SAT-ideoj en Britio. Alian gravan rolon en tiu tasko havas k-do *Rosenbloom*, Manĉestro, pri kiu ni aparte diru, ke eĉ dum la dua mondmilito li neniam ĉesis aktivi kaj tiel atingis, ke tuj post militfino la SATEB-movado povis rekomenci sian vojiron, repreni siajn kontaktojn kun la SAT-centro kaj la alilandaj Lab. Esp. Asocioj. Volonte ni nomas ĉi tie ankaŭ k-don *J. Sulski*, kiu lerninte esperanton pli malfrue ol la du nomitaj, rapide trovis sian lokon elstaran en la laborist-esperantista movado de tiu lando, partoprenis grandan nombron da SAT-kongresoj, ofte kiel kongresa prezidanto kaj intime konas la pulsobaton de nia movado.

En *ĈEĤOSLOVAKIO* fondiĝis LEA en Septembro 1911, kiel sekcio de Laborista Akademio en Prago. Post la unua milito malforta, preskaŭ sensignifa ĉeĥa LEA funkciadis vegete ; post la dua milito ne ekzistis aparta laborista asocio en tiu respubliko, malgraŭ ke diversaj aktivuloj plendis pri tiu stato kaj klopodis pri sendependigo de la propaganda laborista movado de la neŭtrala centro en Prago (SAT-anoj en Pilzeno kaj Brno).

En *ĈINIO* aperis antaŭ la unua milito en Ŝanĥajo « Ĥina Socialisto », en Kantono « La Voĉo de la Popolo » (anarkista). Post la dua milito naskiĝis du pure agitecaj gazetoj : « El Popola Ĉinio », Pekino, kaj « Popola Mondo », Ŝanĥajo, el kiuj nur la unua pluaperas, ne havante organizon kiel eldonanton.

En *DANIO* nur post la dua milito disvolviĝis atentinda LEA-movado kun Libroservo kaj jarkunveno, kaj kun monata Bulteno « Nia Voĉo », depost Januaro 1950, kiu subtenas SAT.

Kerno de aktivaj kamaradoj en Arhuzo kaj en Kopenhago vivigas la Laboristan Esperantismon en tiu lando. Ni nomu nur k-dojn *Jacobsen, Jörgensen, Holger Hansen, H. P. Larsen* kaj *N. P. Skyum*, kiuj organizis ankaŭ la unuan postmilitan Kongreson de SAT.

En *FINLANDO* post la unua, kaj denove post la dua milito ekkreskis memstara LEA-movado, ekde 1948 kun monata bulteno, kiu subtenas SAT kaj estas redaktata de la landa peranto de SAT, k-do *E. Mäntynen*.

En *FRANCIO* jam en 1905 fondiĝis Liberecana Grupo Esperantista en Parizo. Poste Parizo fariĝis centro de Internacia Asocio Paco-Libereco ; fine en 1911 naskiĝis ESFIO por la socialistoj kaj Sindikata Esperantista Federacio por sindikatistoj kun « Le Travailleur Espérantiste » kiel organo. Tiuj organizoj kunfandiĝis, 1914, en Franca Laborista Esperanto-Unuiĝo. Tuj postmilite la revolucia esp. movado restariĝis (legu pri tio en la « Antaŭhistorio de SAT », en la unuaj paĝoj de tiu ĉi libro) ; en 1923 la Federacio nomiĝis « Fédération Espérantiste Ouvrière » kun propra bulteno ekde 1927 (« Le Travailleur Espérantiste »). Membrostato en 1932 : ĉ. 900. Parto eksiĝis en tiu jaro kaj fondis « Fédération Espérantiste Prolétarienne » (FEP) kiel sekvo de la skismo en la internacia movado, kun organo « Proleta Esperantisto ». En 1936 okazis rekuniĝo en komuna organizo sub la nomo « Fédération Espérantiste du Travail » (FET). Sed jam en 1937 la oftaj kvereloj kondukis al fondo de « SAT-Amikaro »-Rondo en Parizo, el kiu postmilite evoluis la nuna LEA por franclingvaj regionoj « SAT-Amikaro » (ĉ. 500 anoj), kiu aperigas presitan bultenon, monate. Aktivuloj de SAT prizorgas ankaŭ la gvidlaboron por « SAT-Amikaro ».

En *GERMANIO* fondiĝis la Laborista Esperanto-Asocio (GLEA) en 1911, kun organo « Antaŭen ». Ĝi havis ĉe restariĝo en 1919 ĉ. 400 membrojn, sed jam en 1922 nombris ĉ. 2 000 anojn (organo : Arbeiter-Esperantist, redaktoro Konrad *Deubler).* En 1928 ĝi alinomiĝas *LEA por germanlingvaj regionoj*. Ĝi nombras en 1930 ĉ. 3 600 anojn. Okaze de l'skismo en la internacia movado kreiĝas Socialista Esperanto-Asocio (kun ĉ. 1 500 anoj). K-do *Ludoviko Puff* gvide elstaras en ĝi.

Post la dua mondmilito ne stariĝis aparta LEA en Germanio, sed depost la Stokholma SAT-Kongreso la SAT-amikoj eldonas trimonatan « Voĉoj de l'SAT-anoj en Germanio » (kiujn komisie redaktas k-do *Herm. Wagner).*

La fondodato de *HUNGARA* LEA estas 1909. Ĝi restariĝis en 1918 sub titolo « Hungara Esperantista Societo Laborista » (HESL). Ĝi suferis ĉiam pro malfacilaj ekzisto-kondiĉoj. Post la dua mondmilito nenia organizita movado ebliĝis en Hungario.

En *ITALIO* kelkaj kamaradoj provas vivigi « Italan Laborist-Esperantistan Asocion », post la lasta milito *(Guzzi, Merlo).*

En *NEDERLANDO* fondiĝis Nederlanda Federacio de Laboristaj Esperantistoj en la jaro 1911, en Amsterdamo. Ekde 1912 aperas « Arbeider Esperantist » (monate). Jam en 1918 ĝi estas restarigita, tuj post la unua milito ; ĝi spertas gravegan ekkreskon dum 1928-29, post ligiĝo kun SAT. La membrocifero atingas en oktobro 1938 : 5 027, en 153 sekcioj [1] « Laborista Esperantisto » estas eldonata 6000-ekzemplere. En 1945 la Federacio reekfunkcias, sed ne povis retrovi la membronombron de l'antaŭmilitaj jaroj. Cetere tiu regreso estas

(1) Ciferoj laŭ « Lab. Esperantisto », jan. 1939.

ĝenerala fenomeno kaj ne nur rilatas tiun ĉi regionon. La Federacio post 1927 tre firme apogas SAT, kaj iujn jarojn ĝia tuta membraro estis abonigita al « Sennaciulo »(*).

En *SOVETIO* estis fondata Sovetlanda Esp. Unuiĝo (SEU) en la jaro 1921. Ĝi aperigis monatan Bultenon kaj propagandan revuon « Mezdunarodny Jazyk ». Ĝi kunlaboradis kun SAT dum 7-8 jaroj ; ĝi havis en 1936, laŭ siaj propraj informoj, ĉ. 5 000 aktivajn membrojn kaj same multajn subtenantojn-kotizantojn. Sed jam en 1939, do antaŭ eksplodo de la dua mondmilito, oni nenion plu aŭdis pri esperanto-movado en Sovetio, nek pri ĝiaj gvidantoj, la fondintoj de SEU. La skisma organizo « Internacio de Proletaj Esperantistoj » samjare, tute senbrue, likvidiĝis. SEU ekde 1923 provis per ĉia rimedo akiri la regadon super la tutmonda laborist-esperantista movado, sed ial ĝi subite kolapsis, tiel ke ne restas plejeta spuro pri la iama ekzisto de tiu organizo, kiu ja estis gvidata de ortodoksaj komunist-partianoj.

*« SVEDA* Laborista Esperanto-Asocio » stariĝis en 1922 kun organo « Sveda Laborista Esperantisto » (monata), postmilite « Arbetar Esperantisten ». Evoluo de l'membraro : 200 en 1923, 1 800 en 1936. La Gotenburga SAT-Kongreso multe akcelis ĝian kreskadon. En 1948 ĝia membraro nombris iom pli ol 500.

(*) Granda nombro da aktivuloj, el kiuj citi iujn nomojn signifus ofendeti aliajn, eble same meritplenajn. Multaj el ili aktivas (aŭ aktivis) ankaŭ sur la tutmonda tereno, ofte kiel funkciuloj de la SAT-movado.

## Historio de LEA-Komitato de SAT

En la periodo de la skismoj fare de IPE kaj ISE la skismigantoj uzis unu argumenton, kiu posedis certan pravecon. Ili plendis, ke la organiza formo de SAT ne ebligas rektan kontakton por kunlaboro kaj interhelpo de la diversaj LEA-oj.

Por forigi tiun mankon, k-doj F. Faulhaber kaj A. Veen, tiamaj prezidanto kaj sekretario de la nederlanda LEA (FLE) prezentis al la SAT-Kongreso en Bruselo (1938) la proponon fondi « LEA-Komitaton », kiu neniel ŝanĝante la organizformon de SAT mem kaj neniel miksante sin en la per-esperanta agado de SAT, formos oportunan bazon por la kunlaboro de la konvencie al SAT ligitaj LEA-oj kaj okupos sin pri la internacia por- (propaganda) laboro. Kvankam la propono estis farata kun la celo forigi por la estonteco favoran argumenton por eblaj novaj skismigantoj, la ankoraŭ tro freŝaj rememoroj pri la skismoj kaŭzis malfidon al la propono, ĉar pluraj timis, ke malantaŭ tiu propono sin kaŝas nova formo de internacio. Precipe en rondoj de franca kaj brita LEA-oj, kiuj forte suferis pro la skismoj, estis tre malmulte da entuziasmo. La Brusela Kongreso forŝovis la definitivan decidon ĝis la sekvonta kongreso en Kopenhago (1939). Tie ĝi trovis plimulton, sed la baldaŭ poste eksplodanta milito malhelpis la efektivan konkretan ellaboriĝon de la propono.

Post la mondmilito la ideo pri LEA-Komitato estis restarigata, kaj en Arhuzo (1947) ĝi fine ekvivis. Dana, sveda kaj nederlanda LEA-oj tuj plenkonsente partoprenis kaj ankaŭ la brita kaj franca LEA-oj forlasis sian malfidan vidpunkton,

konvinkite per la praktika evoluo pri la sincereco de la iniciatintoj kaj iliaj samopiniantoj. Sinsekve aliĝis ankaŭ finlanda, itala kaj la provizore en Francio starigita hispana LEA. Krom tio ankaŭ SAT mem partoprenas en la komitato por tiel garantii anticipe la neeblon de konfliktoj kaj por plene interkonsentigi kaj interharmoniigi la agadterenojn de la internacia per- kaj por-laboro.

El la landoj, kie ne ekzistas LEA-oj, aliĝis reprezentantoj de la laboristaj esperantistoj el tiuj landoj. Tiel Aŭstrio, Norvegio, Argentinio, Belgio, Germanio kaj kelkaj landoj kie pro iu ajn kaŭzo ne ekzistas aparta LEA, estas reprezentitaj en la komitato kaj per tio pligrandigas kaj plivastigas ĝian internaciecon.

La ĉefaj rezultatoj de LEA-komitato de SAT estas la pli kaj pli fortiĝanta interligiteco de la LEA-oj, la klare fiksitaj linioj sur la tereno de eldonado kaj librovendado kaj la eldono de plurlingva flugfolio. Ankaŭ kun UEA kreiĝis elasta kaj nedeviga formo de kunlaboro, kiu en pli oportunaj momentoj povos pruvi sian utilecon kaj forigi jam certajn miskomprenojn kaj konfuziĝon, kiuj nur ĝenis klaran principan starpunkton de la laborista esperanto-movado.

Kvankam ne tre brue, LEA-komitato tamen montris sian utilon kaj akiris sian modestan, sed firman lokon en la kadro de SAT kaj la Gotenburga Konvencio.

## Apera Sekvo de la SAT-gazetoj

Esperantista Laboristo (dulingva), jaro 1 (dua serio), 6 numeroj, de aŭgusto 1919 ĝis dec./jan. 1920.

Esperantista Laboristo (dulingva), jaro 1 (tria serio), n-roj 1-11, februaro 1920 ĝis decembro 1920.

Esperantista Laboristo (nur esperanta), 2-a jaro, n-ro 1 (12), januaro 1921, monate ĝis aŭg./septembro 1921 (7-8).

Sennacieca Revuo, ekde oktobro 1921, du numeroj kiel 2-a jaro, n-roj 1 kaj 2 : ekde decembro 1921, 3-a jaro, n-roj 3/4 (dec./jan.) kaj regule monate ĝis la 5-a jaro, n-roj 11-12 (aŭg./sept. 1924).

Tiam *Sennaciulo* aperas kiel semajna oficiala organo, ekde 1-a oktobro 1924.

La 100-a numero aperas la 26-an de aŭgusto 1926
La 200-a « « 2-an de aŭgusto 1928
La 300-a « « 3-an de julio 1930

De n-ro 368 (22-a okt. 1931) la aperado fariĝas *dusemajna*.
De n-ro 400 (12-a jan. 1933) « « *duon-monata*.
De n-ro 402 (25-a febr. 1933) ĝi estas *monata*, alternanta kun « Sennacieca Revuo ».

« Sennacieca Revuo » kiel daŭrigo de la moskva « La Nova Epoko », jam unu jaron antaŭ la kreo de « Sennaciulo », kun subtitolo « Oficiala organo de SAT, Literatur-Scienca Aldono », n-roj 1 (9) - 11/12 (19/20), aŭg/sept. 1924. Poste kun subtitolo « Monata organo de SAT, Literaturo - Scienco - Pedagogio » de okt./nov. 1924 kun n-roj « Jaro II/VI, 1-2 » ĝis « Jaro VIII/XII, 10/11 (94/95) » en julio/aŭgusto 1931.

En 1932 ekaperas *dumonate* « La Nova Epoko », Literatur-Scienca Aldono al Sennaciulo, sub Jaro IX/XIII, n-ro 1 (97), je dato: 7-a aprilo 1932. Ĝia 6-a kaj lasta n-ro aperas 10-a febr. 1933.

De tiam sekvas *monate* « Sennacieca Revuo » (Nova Serio, 1-a jaro, n-ro 1, marto 1933, ĝis aŭg./sept. 1939, t. e. 7-a jaro, n-roj 78-79).

Post militfino : unu numero « SAT-Bulteno » (januaro 1946), poste « La Kosmopolito » (dum kvin monatoj), fine « Sennaciulo », monata, regula ĝis la nuna dato.


---

En la administrejon de SAT en Lejpcigo estis dungitaj jenaj gekamaradoj :

– R. Lerchner, ekde la starigo ĝis 1933 ;
– lia filino Lotte de 1.2.25-30.11.32 ;
– N. Bartelmes de 1.10.24-31.10.25 (en Parizo de 1.2.28 ĝis la milito 1939 kaj ree de aŭg. 1948 ĝis hodiaŭ) ;
– K-ino Lehmann de 21.2.26-1.10.28 ;
– H. Platiel, de 8.5.29 ĝis Pentekosto 1932 (en Parizo de majo 1934 ĝis sept. 1935) ;
– Heinz Thieme, de 17.7.30-28.2.32.


SAT
ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO
SENNACIULO
OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA
KULTURA KAJ INTERHELPA ORGANIZO DE PROLET-ESPERANTISTOJ


MONATA
Sennacieca Revuo
Monata Organo de Sennacieca Asocio Tutmonda
PARIS XI (Francio)
177 Rue de Bagnolet — PARIS XX (Francio)


Sennacieca Revuo
Monata Organo de Sennacieca Asocio Tutmonda
LITERATURO - SCIENCO - PEDAGOGIO
ENHAVO


Oktobro 1930
LA NOVA EPOKO
LITERATURO

## Jenan literaturon publikigis SAT ekde 1922 :

*(en kronologia ordo)*

Tolstoj, Tri Verkoj.
Barbusse, Eklumo en Abismo.
Brunulo, Ni Legu ! (2 eldonoj).
Goethe, Faŭsto I.
Marks-Engels, La Komunista Manifesto.
Dokumentoj de Komunismo.
E. Lanti, For la Neŭtralismon ! (3 eldonoj).
V. Elsudo, ABC de Sennaciismo.
Szerenyi, Malgranda Terbiblio.
Proletaria Kantaro.
D-ro Reiche, El la mondbildo de l'nova fiziko.
Bartelmes, Petro (lernolibro, 7 eldonoj).
Labor-kajero al Petro.
Prof. Fersman, La Kemio de l'Universo.
J. Tousseul, La Morto de Blanjo.
L. Ivn, Ruĝo kaj Blanko.
S. Ziegler, Sekspsikologio.
Karl Marx (biografio).
Kropotkin, Etiko.
En Katenoj de Maljusteco (virina krestomatieto).
Orienta Blovo (krestomatieto).
Lenin, Ŝtato kaj Revolucio.
Izgur, Je la Nomo de l'Vivo.
Izgur, Nur Volu !
H. Zur Mühlen, Fabeloj (Kion rakontas la amikoj de Peĉjo).
Fersman, La vojo al Scienco de Estonto.
Lanti, La Laborista Esperantismo.
Kvardek jaroj de Esperanto.
Bartelmes, Diablidoj.
Miĥalski, prologo.

Voltaire, Kandid.
L. Tolstoj, Ĥodinka.
Drezen, La voĵoj de formiĝo kaj disvastiĝo de la L. I.
Andreev, Revolucio en la Lingvoscienco.
Bogdanov, Ruĝa Stelo.
J. London, La Fera Kalkanumo.
Soveta Pedagogio.
Plena Vortaro de Esperanto (3 eldonoj).
Bergiers, Ili.
Ĥrima, Poemo de l'Plugisto.
Nia Teatro.
Tolstoj, Kristanismo kaj Patriotismo.
Lanti, Vortoj de k-do Lanti.
Lanti, Naciismo.
Veder, Komentoj al la Komunista Manifesto.
Hâŝek, La Brava soldato Ŝvejk.
Sinclair, Jimmie Higgins.
Manifesto de la Sennaciistoj (2 eldonoj).
Kropotkin, Al la junuloj kaj Biografio.
Gille, Skizo pri filozofio de la homa digno.
Bartelmes, Unua Legolibro (2 eldonoj).
Roland-Holst, Frateco en la vivpraktiko.
La Profeto (hungara literaturo).
Bastjen, La Liberecana Socio.
Bartelmes, Juneca Ardo.
Bartelmes, Vartejoj.
de Bruin, Laborista Esp. Movado antaŭmilita.
de Bruin, Gvidilo tra la Esp. Movado (kun Suplem. 1936-1948).
Horrabin, Skizo de Ekonomia Geografio.
Neergaard, Scienco kaj pseŭdoscienco pri heredo kaj raso.
E. Lanti, Leteroj.
Waringhien, Leteroj de Zamenhof (2 volumoj).
Gvidlibro pri Parizo.
Roland-Holst, Roza Luksemburg.

J. Rostand, La Nuna Stato de l'Evoluismo.
Iom pri Stokholmo.
M. Dekker, La Mondo ne havas Atendejon.

*Kun monopola vendo ĉe SAT :*

Lanti kaj Ivon, Ĉu socialismo konstruiĝas en Sovetio ?
S. L. P., Ĉu Socialisma Libereco aŭ Kapitalisma servuteco ?
Malaĥ, Misisipi.

Menciindaj ankaŭ la libroj el la du Romanserioj, kiuj same kiel « La mondo ne havas Atendejon » estas eldonitaj de FLE kaj SAT kune :

I. La Senlingvulo (Korolenko).
Patroj kaj Filoj (Turgenev).
Homoj en Milito kaj Marcia Reale (Latzko).
Kulio (Szekeli-Lulofs).
La Hispana Tragedio (J. Last).
Fontamara (Silone).

II. Judoj sen Mono (Gold).
Taglaboristoj.
La Batalo de l'Vivo (Dickens).
La vojoj estas nekonataj (Kassak).
La Lanternisto k. a. (Sienkewicz).
La Perfido (de Jong).
Neĝulino kaj aliaj fabeloj de fratoj Grimm.

## K-do Lanti lasis nin orfaj

*Ĉi tiu artikolo aperis en la Marta numero 1947 de « Sennaciulo ».*

Kiel fulmobato trafis nin la sciigo el Meksiko, ke k-do E. LANTI ne plu estas inter la vivantoj. La plej granda forpasis libervole el nia rondo, li kiu nin ĉiujn superegis je intelekto, intuicio k sagaco, li kies saĝajn konsilojn ni avidis dum angorplenaj situacioj !

K-do LANTI posedis la eksterordinaran kuraĝon de homo, kiu en la momento kiam li konsciiĝis pri la nerebonigeblo de sia fizika forfalo, decide forlasas per propra volo, per gesto kvazaŭ memkomprenebla la mondoscenejon.

Ke li kapablus agi tiel, pri tio ni ĉiuj estis konvinkitaj delonge, ĉar ni aŭdis ĝin pli ol unu fojon el lia buŝo. Ni ankaŭ memoras lian emocion, kiam la juna pariza k-do BUBO (Pakje), kiun LANTI multe ŝatis, en Majo 1939 estingis sin propravole, pro nekuracebla malsano, per kiu li ne volus « tedi siajn kunhomojn ». Nun li mem kredis sin ne plu en stato povi utili la grandan verkon de sia vivo… k lia voĉo silentiĝis por ĉiam. Sed liaj ideoj k lia verko komencis nur penetreti en la mondon ; al ili apartenas la estonto. Tiun certon k-do LANTI ja povis havi, kiam li decidis formalaperi.

K-do LANTI ne multe parolis pri sia persono, ekster la rilatoj kun la afero, al kiu li dediĉis sian potencan vivenergion. Ankaŭ en siaj LETEROJ la mencio de l'propra esto okazas nur lumige al iu kernproblemo – filozofia, socia aŭ politika – kiun li celas prezenti kiel eble plej klare al la leganto. Sed neniam

lia persono mem estas tiu kernproblemo. Tiel lia origino, familio, gento, profesio de civila vivo tute ne havas ian gravon en liaj konsideroj. Lin ne interesas scii, de kie lia miriga spirita forto doniĝis al li ; li nur scias ĝin disponebla, k tio sufiĉas por ke li senlace k malŝpare elspezu ĝin por la tasko de sia vivo.

Pro tio ni ankaŭ rezignas ĉi tie citi biografiajn detalojn, ĉar ili estas tute sensignifaj kompare kun la spirita mondo, kiu sin manifestis sub la pseŭdonomo LANTI. Ni nur substreku la fakton, kiun li mem ŝatis reliefigi : ke li estis aŭtodidakto, komencinte sian vivkarieron kiel simpla metiisto, k posedis nek universitatan titolon nek klerogradon atestitan. Tamen, kiom pli klera li estis ol multaj aŭtentaj profesoroj !

Kiu konis lin intime, scias kiom malmulte vantema li estis. Sed li ankaŭ malŝatis vantemon ĉe la aliaj k sentigis al tiaj personoj draste sian gigantan superecon. Tromemfidon li ne konis. Li nenion eldiris antaŭ publiko nek skribis, kio ne estis profunde antaŭmeditita k cerbumita ofte dum longa tempo. Ĉion publikigotan, eĉ la plej malgrandan artikolon, li ne nur mem plurfoje antaŭe kritike trarigardis k plibonigis, ĝis li estis konvinkita pri absoluta klareco de lingvo, stilo k senco, – ne, li ankaŭ legigis la manuskripton unue al siaj kunlaborantoj, por ricevi iliajn kritikojn.

Tiu skrupula konscienceco de LANTI reflektiĝas en lia filozofio sub la formo de la dubado pri ĉiu k ĉio. Nia filozofosaĝulo predikis la dubemon rilate ĉiujn vivo-koncernajn aferojn k sferojn. La dubemo savus nin kontraŭ kruelaj seniluziiĝoj. En liaj skribaĵoj ni do renkontas ofte la esprimmanieron de l'dubema homo, la sarkasmon k la ironion. Ni ekkomprenas lian ŝaton por spiritoj kiaj RABELEZO (RABELAIS), VOLTER (VOLTAIRE), kies *Kandid-on* li tiel genie tradukis, k aliaj raciemuloj de la pasinto.

LANTI funde konis la homojn. Eble pro tio lia malestimo al la plimulto el ili, ĉar li estis ĝismorta malamiko de la gregemo, de l'blinda sekvado, de l'sencerba, laŭinstinkta agado. Tial li sentis sin logata de la amara k severe juĝanta spirito de la filozofo NIĈE.

LANTI estis individuisto en la plej bona senco, kiun povas enhavi tiu vorto : li akcelis la kreadon de kapablaj k altvaloraj individuoj, kiuj formu la medolon riĉan k fruktigan de la socio ; li komprenis, ke socio libera k justa ne povus ekzisti, se la homoj restus malviglaj pense, se ili kontentiĝus per nuraj animalaj meĥanikaj ĝuoj. Li tial klare esprimis, ke la alveno de socialisma ideala epoko ne dependas unusole de la ekonomia liberiga batalo de la laboristaro, sed ke sampaŝe k same profunde devas okazi transformiĝo de la *spiritoj*. Kaj de tie la ektrovo de nia Zamenhofa Esperanto ; de tie lia konstato, ke lerte k metode uzata de liberecanoj, tiu mondlingvo estos la plej certa rimedo por plenumi la mensan revolucion ĉe la homoj ekspluatataj k amasbuĉataj – k por ebenigi al ili la vojon al pli feliĉa estonta homsocio.

La fondo de SAT (1921 ; okaze de mondkongreso en Prago) estas esence la verko de E. LANTI. *Sen li SAT ne ekzistus*. Eble ion alian laboristaj esperantistoj estus iniciatintaj, kion hodiaŭ oni verŝajne ne plu retrovus inter la disŝutitaj transsavaĵoj de l'lasta milito. Sed SAT, tia kia ĝi estis konceptita de LANTI k statute jam fiksita (laŭ sia principaro) en Prago en la nuna formo – pravigita de la fondinto per la broŝuroj *For la Neŭtralismon !* k *La Laborista Esperantismo*, ricevis ekde la komenco tian firman baziĝon, ke neniu uragano povus ĝin elradikigi aŭ frakasi. SAT transvivis internajn k eksterajn malfacilaĵojn, ĉar ĝiaj gvidprincipoj montriĝis sanaj k ĝustaj.

Nenio pli brile pravigis la anticipan spiriton de LANTI ol la spertoj de tiu ĵusa milito.

Povas esti, ke tiu aŭ alia k-do en la mondo malkonsentas kun la opinio de LANTI pri unu aŭ alia problemo de la vivo (LANTI neniam koleris pro tio, ĉar li ŝatis sinceran kritikon), sed neniu povas malkonfesi la absolutan klarecon de la Lanti-a rezonado k argumentado. Li starigis al la Asocio de li fondita malproksiman celon. Ĉu ne prave ? Ju pli alta, se eĉ fora la celo, des pli granda k pura la penado antaŭenpaŝi en ĝia direkto.

Ne estas la loko en tiu ĉi nekrologa skribo, por ĵeti anticipan rigardon sur la evoluon de SAT. Ankaŭ pri tiu lia plej amata infano, la *sennaciismo*, k ĝiaj perspektivoj ni silentu ĉi-loke. Tamen, en la momento kiam k-do LANTI adiaŭis por ĉiam de ni, ne povas ni preterlasi altiri la atenton de ĉiu esperantisto sur tiujn verkojn el la plumo de l'mortinto, kiuj montras plej klare la esencon de lia pensado : *Naciismo, Vortoj, Leteroj* k la *Manifesto*. Kiuj legis ilin atente, tiuj ekkomprenis, ke tie parolas homo, kiu staras mont-alte super la ordinara nivelo k el sia observejo donas konsilojn, proponas vojojn, sen pretendi esti absolute neerarema aŭ posedi la solan savilon. Ne, LANTI estis severa kontraŭ si mem, kiel kontraŭ aliaj. Kaj kiam, sekve de la akra skismo pro partieca agado (1931), ŝajnis al li, ke lia persono povus kaŭzi malutilon al la progreso de la SAT-afero, se li restus prezidanto de la Plenum-Komitato, li kun sia simpla, sed abrupta decidemo eksiĝis el la gvidado (fine de 1933), tamen daŭre zorgante patrece pri la bonfarto de sia ido – eĉ el plej granda malproksimo.

Kio pli karakteriza ol la ekmigro de l'preskaŭ 60-jara vagulo tra la mondo ? – Ekkoni, studi novajn popolojn, novajn regionojn, kompari, analizi, ĉiam profite al sia idealo – tio estis la

ĉefa fervoro de lia lasta vivjardeko. Aparte menciinda restas la scienceca laboro super la « *Plena Vortaro* », kiu estis verkata ja laŭ lia instigado k kun lia aktiva kunlaborado. Ni aŭdis dume pri preparo, en Meksiko, de tria eldono, tute nova, ilustrita, mil-paĝa de la « P. V. ». Jam la efektivigo de la du unuaj eldonoj signifis unikan pozitivan akiraĵon por la tuta esperantista mondo (k tute apartan kontentigon por la sennaciemuloj, kiuj celas al konstanta aplikado mondskale de sia lingvo).

Tiu zorgado pri la Vortaro montras, kiom alte LANTI taksis la purecon k unuecon de la lingvuzado. Ĉiam li klopodis trovi lingvan k pensan sintezon per esperanto k forigi nacilingvajn malglataĵojn el la cerboj de la adeptoj. Unueca lingvo, jen la antaŭkondiĉo k unua ŝtupo al la fincelo : sennacieca mondkulturo !

Ni ĉi tie nur fluge skizis la eksterordinarajn meritojn de k-do LANTI pri lingvo k ismo. Ofta legado de liaj verkoj estos nun pli ol iam varme rekomendata al la anaro. Estas nia sola konsolo en tiu ĉi horo, ke LANTI postlasis al ni riĉan trezoron da pensoj k ideoj. Se ni ĉiuj zorgos pri ilia disvastigo k pri aplikado de l'tezoj, ni povos rigardi trankvile en la estonton. Kaj kiel la nomo de D-ro ZAMENHOF neniam estingiĝos kiel aŭtoro de Esperanto k varmkora homarano, tiel la nomo de nia k-do LANTI ĉiam hele brilos tra la mondo, tiom longe kiom spiros k sopiros homoj, – kiel granda pioniro sur la vojo al pli alta, pli nobla kultura ŝtupo de la homaro.

BANJE, GLODO, BARTELMES.



Jen, en formato adaptita al la larĝo de tiu ĉi libro, la faksimilo de la unua karto de la SAT-sektoroj (Malnova Mondo), pri kiu ni aludis en pluraj lokoj de la « Historio ».

Ĝi estis modifita laŭ geografiaj horzonoj (meridianoj) ekde 1929. Pro la redukto de la formato, la loknomoj fariĝis tro malgrandaj por praktika uzado, kia cetere ne estas la celo de tiu ĉi pure dokumentuma reprodukto. Tial ankaŭ ne utilas prezenti la alian flankon : Ameriko-Aŭstralio ; la ĉi-supra sufiĉas por montri la principon.

La nova mondkarto, laŭ horzonoj, aperas, en pli granda formato, en ĉiu Jarlibro.

## LINGVAJ NOTOJ

Laŭ interkonsento farita ĉe la *Literatura Komitato de SAT* ĉi tiu instanco ne unuanime aprobas la uzon de l'formoj kun *ali-*, ekz. *aliel*, en la tabelo de korelativoj. Ni resendas tiurilate ankaŭ al la noto sur p. 29 de « Plena Vortaro » de SAT. Ĝi toleras tiujn formojn en la teksto, sed atentigas pri tio, ke ili ne estas ortodoksaj laŭ la Fundamento.

Sama tolero rilate la eliziadon de unu « i », kiu multe aplikiĝas en la lingva praktiko, ĉe la vortoj « anark(i)isto », « trock(i)isto ».

153

MODERNA PRESEJO
LANGRES, FRANCIO